

GVIDLIBRO DE ESPERANTA KONVERSACIO

世界语会话指南

De Laŭlum

李士俊 编著



e-Librigita de Elerno

septembro, 2012

李士俊简介



李士俊（1923.03.29 —）河北安国人，曾用名罗伦、孟凌。世界语笔名有 Laŭlum, V. Kanto, H.M., Laŭmul 等。曾从事汉语、英语、世界语教学、新闻及翻译工作。1939年开始学习世界语，1940年参加重庆世界语函授学社学习。1946年参与许寿真组织成都世界语协会，任秘书，并参加过国际世界语新闻记者协会。1950年从成都市女子中学调到北京参加中华全国世界语协会筹备工作。1951年当选该会候补理事。曾担任《中国报道》杂志社翻译组副组长、编委、总编室副主任、副总编辑，《世界》杂志副总编辑、中国世界语刊授学校校长，以及全国高级翻译任职资格评审委员会

委员会委员等职。1983年当选国际世界语学院院士、1992年和2001年又连续当选。1984年任国际世界语协会教育顾问委员会委员。从1979年起先后任中华全国世界语协会理事、常务理事、北京世界语协会副理事长兼教育委员会主任、北京老世界语者协会顾问等职。还担任过中国人民大学世界语专修班教授等工作。主要译著有：《中国文学作品选集》（三卷，合译，1959）、《鲁迅小说集》（合译）、《阿诗玛》（世译，1965）、《秋天里的春天》（世译，1981）、《王贵与李香香》（世译，1985）、《论人民民主专政》（世译）、《实践论》（世译）、《延安文艺座谈会上的讲话》（世译）、《湖南农民运动考察报告》（世译）、《寒夜》（巴金著，1988）、《Ĉinaj Klasikaj Poemoj Ilustritaj <配图古诗精选>》（世译，1990）、《聊斋志异选》（世译，1994）、《红楼梦》（世译本定稿，1996）、《中国古代小说选》（合译，1998）、《家》（世译本定稿）、《水浒传》（100回世译本，列入2001年出版计划）；编著有：《世界语会话》（1964）、《世界语初阶》（1983）、《世界语自修课本》（1984）、《世界语会话》（新编，1985）、《世界语歌曲集》（合著，1986）、《新编世界语课本》（合著，1986）、《世界语诗歌讲座》（1987）、《世界语初级教程》（1988）、《世界语新词典》（合编，1959）、《世界语汉语词典》（合著，1987）、《助学小唱》（世界语创作诗歌222首，1994）、《世汉英法中医学术语词典》（审稿，1997）、《世界语在中国一百年》（合著，1999）。此外，撰写有书评、杂文、小说诗歌数百篇，翻译各种稿件二百余万字发表在国内外杂志及文章中。另外还撰有《Rakontoj pri Afanti》（阿凡提的故事，韵文250篇）、《世汉翻译教程》和《世界语进修读本学习辅导》，翻译了茅盾的代表作《子夜》，编译了《中国谚语俗语（5000多条）》等书稿。

怎样学习世界语会话？

要想学好世界语会话，必须做三件事：第一、必须掌握字母的正确发音、词语的重音和句子的语调；第二、必须进行反复练习；第三、必须多读书。

一、语音问题

世界语的字母有的与汉语拼音字母读法相同，如 c, e, f, i, k, l, m, n, o, p, s, t, u 等。有的是汉语拼音字母所没有的，如 r 和 v；有些与汉语拼音的字母不同，但发音相同，如 ĥ=h, ĵ=y, ŭ=w；有些与汉语拼音写法相同，但发音不同，例如：b, d, g, h, z；还有几个字母的发音与汉语相似，却不相同，必须用心学习才能掌握，如：ĉ, ĝ, ĵ, ŝ。

r 是舌尖颤音。没有经过训练的舌头发硬，颤动不起来。可以先练习读 tr tr tr，等到舌头变得灵活了，再去读 tra, tre, tri, tro, tru, kra, kre, kri, kro, kru，经过一个时期的练习便可以读 bra, bre, bri, bro, bru, ar, er, ir, or, ur, ra, re, ri, ro, ru。练习一定要坚持，要有信心。一般人经过两个月的练习，就会发 r 的音。v 的音位和 f 的相同，但它是浊辅音，读时不送气，而要振动声带。

b, d, g 往往被误认为和汉语拼音字母的读音相同，其实不然。它们是浊辅音，在读的时候必须振动声带。因为北方话里没有这些浊辅音，所以练习起来有一定困难。必须认真揣摩，用手摸喉部声带的位置，感觉发音时声带的震颤。如果发 b, d, g 时声带不震动，就说明发出的音不是浊辅音。

h 是呼出的气流摩擦声带而发出的辅音。发音时不能摩擦小舌头。z 的音位和 s 相同，不要把它读成汉语拼音的 z。它也是浊辅音，读时要振动声带。

ĉ, ĝ, ĵ, ŝ 四个辅音的舌位相同。读时都要把前舌面顶住硬口盖靠近齿龈的部分。ĉ 和 ĝ 是摩擦爆发音。ĉ 是清辅音，不震动声带；ĝ 是浊辅音，要振动声带。ŝ 和 ĵ 是摩擦音。ŝ 是清辅音，不震动声带；ĵ 是浊辅音，振动声带。

二、重读问题

世界语的语法重音在倒数第二个音节。

这是不难掌握的。比较成问题的是逻辑重音，也就是按照词义应该作出的重读。例如 ne 是单音节词儿，没有语法重音，但是它代表的意思较重，所以经常需要重读，可以有逻辑重音。还有一些合成词的次要词素（flankelemento），例如合成词 skribotablo 中的 skribo，如果不和重读音节相邻，也要有次重音。skribotablo 便该读作 skri- bo- ta- blo。skri- 便是次重音节，ler- no- li- bro（课本）中的 ler- 便是次重音节。应该重读的地方如果没有重读，会使句子的意思模糊不清，甚至改变原意。所以必须认真思考，不要产生逻辑重音的错误。

三、语调问题

陈述句、疑问句、感叹句等等的语调不同。下面举例加以说明：

a. 陈述句（用句点结束的句子）应该用降调，句子的末尾语调下沉。例如：

1. Mi estas homo.

句子中的 homo 应该用降调。

2. Ili laboras tre diligente.

句中的 diligente 应该用降调。

较长的陈述句，往往含有逗号，需要暂停、换气，但是语调不能下沉，这样听者才知道话没有说完。

1. Mi legos la libron, kiun vi legas.

句中的 libron 不要用降调。

2. Ili rapide progresas, ĉar illi diligente lernas.

句中的 progresas 不要用降调。

3. Post longa laŭtlegado de tekstoj, li progresis ankaŭ en konversacio.

句中的 tekstoj 不要用降调。

4. Se vi helpados ŝin, certe ŝi venkos la malfacilojn kaj sukcesos.

句中的 ŝin 不要用降调。

b. 普通疑问句（用 ĉu 开头的句中）

应该用升调，句子的末尾语调上扬。

1. Ĉu vi konas ŝin?

句子中的 ŝin 要上扬语调。

2. Ĉu ĉiuj povos ĉeesti la kunsidon?

句中的 kunsidon 要上扬语调。

c. 特殊疑问句（用 kio, kia, kiu, kie, kial, kiam, kiel, kies, kiom 开头的句子）的疑问词应该用升调，句子的末尾用降调。

1. Kio estas via nomo?

句中 kio 要读升调，nomo 读降调。

2. En kiu jaro vi eklernis Esperanton?

句中 kiu 读升调，Esperanton 读降调。

ĉ. 感叹句的语调与陈述句大体相同。

1. Ne ŝovu la nazon en alies vazon!

句中 vazon 读降调。

2. Saĝa hundo post la vundo!

句中 hundo 读降调。

1. INTERKONATIĜO 相识

A: Saluton, kamarado!

同志，你好！

B: Saluton, kamaradino!

（女）同志，你好！

A: Mi nomiĝas Li Lin. Ĉu mi povus scii vian nomon?

我叫李林。请问你叫什么名字？

B: Mia nomo estas Lan Fen.

我叫兰芬。

A: Ĉu vi konas tiun junulon? Kiel li nomiĝas?

你认得那位青年吗？他叫什么？

B: Li estas Pan Lu. Mi prezentu vin al li. (Al C) Kamarado Pan, tiu ĉi estas kamarado Li Lin.

他叫潘路。（对 C）潘同志，这是李林同志。

C: Mi tre ĝojas konatiĝi kun vi.

认识你我很高兴。

A: Same mi.

我也很高兴。

C: Bonvole konigu min al viaj geamikoj.

请你把我介绍给你的朋友吧。

A: Volonte.

我当然愿意。

C: Delonge mi jam konas vian nomon, sed nur hodiaŭ mi havas la feliĉon vidi vin. Kie vi loĝas?

我早已知道你的名字，只有今天才有幸见到你。你住在哪儿？

A: En la okcidenta kvartalo. Kaj vi?

在西城区。你呢？

C: En la suda.

在南城区。

A: Oni diras, ke tie funkcias Esperanto-kurso, ĉu ne?

听说那儿有个世界语班，是吗？

C: Jes. Kaj ni ankaŭ fondis amatoran teatran grupon.

是的。我们还成立了一个业余话剧组呢。

A: Ĉu vere? Kiu gvidas ĝin?

真的吗？谁是负责人？

C: Kamarado Liu. Jen li! Kamarado Liu, venu konatiĝi kun ĉi tiuj gekamaradoj.

刘同志。瞧，就是他！刘同志，请来和这几位同志认识认识。

C: Kiel ĝojinde, ke mi povas konatiĝi kun vi!

能和你们认识真高兴！

A: Kia ĝojo, ke ni havas la honoron interkonatiĝi kun nia teatra artisto! Nu, kie estas viaj grupanoj?

Ĉu vi povas prezenti ilin al ni?

我们能和我们的舞台艺术家结识有多高兴啊！你的组员们在哪儿？可以介绍给我们吗？

Ĉ: Kompreneble. Tiu ĉi estas k-do Sun, nia rekvizitisto; tiu ĉi, k-dino Jan, nia anoncistino; tiu ĉi...

当然啦。这是孙同志，我们的道具保管员；这是闫同志，我们的报幕员；这是.....

D: Mi prezentu al vi min mem. Oni kromnomas min Malfeliĉulo pro tio, ke mi ofte ludas tiajn

rolojn. Mia vera nomo estas Su Min.

让我自己介绍一下吧。人们送给我一个绰号叫“不幸者”，因为我常演这种角色。我的真名叫苏民。

E: Mi, Gao Ge, laboristo. Krom dramludo mi ŝatas muzikon.

我是高歌，工人。除了演剧还爱好音乐。

F: Tiu ĉi estas Malgranda Hua, la plej juna el la grupanoj. Li estas ankaŭ amato de pentrado.

这位是小华，是组员中最年轻的。他也是一位绘画爱好者。

备用词语

Familia nomo 姓, baptonomo 教名(基督徒施洗时得到的名字,如 Petro, Johano, Maria 等), antaŭnomo 本名(中国、日本、朝鲜、越南等亚洲国家和东欧的匈牙利习惯把姓写在前面,而西方人则大都把姓写在后面,所以把名叫 antaŭnomo), kromnomo 别名, moknomo 外号、绰号, plumnomo 笔名, honora titolo 称号, 封号, prapatroj 祖先, avo 祖父(欧美各国把祖父、外祖父统称 avo, 必要时可用 patrinflanka avo 表示“外祖父”), praavo 曾祖父, patro 父亲, patrino 母亲, gepatroj 双亲, frato 兄弟, fratino 姊妹, gefratoj 兄弟姊妹, kuzo 堂兄弟、表兄弟, pranepoj 子孙后代, boparencoj 姻亲, bopatro 公公, 岳父, bofrato 小叔子、大伯子、小舅子、姐(妹)夫, bofratino 小姨子、小姑子、大嫂、弟妹, bofilino 儿媳妇, onklo 叔父、伯父, patrinflanka onklo 舅父, nevo 侄子, nepo 孙子

2. SALUTOJ, BONDEZIROJ, GRATULOJ

问候, 祝福, 祝贺

Bonan matenon, kamarado!

早安, 同志!

Bonan tagon, kamaradino!

日安, (女) 同志!

Bonan vesperon, sinjoro Ma!

晚安, 马先生!

Bonan nokton, fraŭlino Su!

晚安, 苏小姐!

Salunton!

你好!

Feliĉan Novjaron!

新年好!

Ĝojan Printempan Feston!

春节快乐!

Agrablan ekskurson!

祝郊游愉快!

Bonan vojaĝon!

一路平安!

Korajn bondezirojn!

衷心祝愿您好!

Ĉion bonan!

万事如意!

Plenan sukceson al via kongreso!

祝你们的大会圆满成功!

Brilajn sukcesojn en via laboro!

祝你们的工作取得辉煌成就!

Rapidan progreson!

祝你迅速进步!

Pacon kaj feliĉon al vi ĉiuj!

祝你们大家和平幸福!

Bonan apetiton!

祝您胃口好!

Baldaŭan resaniĝon!

愿您早日康复!

Ĝojon kaj feliĉon!

祝您快乐幸福!

Fortan sanon!

祝您健康!

Korajn gratulojn!

衷心祝贺你(们)!

Transdonu miajn varmajn gratulojn al via frato pro lia ĉampioniĝo!

请代我热烈祝贺你哥哥得了冠军!

Mirinde vi ludis! Gratulon!

您表演的好极了! 祝贺您!

Ni drinku pro la amikeco inter niaj popoloj.

让我们为我们两国人民的友谊干杯!

Ni tostu por la solidareco inter niaj landoj!

让我们为我们两国的团结干杯!

Bonan tagon, kamarado Sun! Kiel vi fartas?

日安, 孙同志! 你好吗?

Tre bone. Dankon! Kaj vi?

很好。谢谢! 你呢?

Ankaŭ bone. Mi jam longe ne vidis vian patron. Kiel li fartas?

我也好。好久未见你父亲了, 他好吗?

Ne tiel bone kiel antaŭe. Sed li ankoraŭ persiste laboras. Li eĉ inventis precizan mezurilon.

不及以前了, 可是他仍在坚持工作。他甚至还发明了一种精密的量具呢。

Ĉu vere? Gratulinde! Li ankaŭ bone zorgu sian sanon, por ke li pli multe faru por la patrolando.

真的吗? 真值得祝贺他! 愿他也要保重身体, 好为祖国作更多的事情!

Dankon! Kiel iras via fabriko?

谢谢! 你们的工厂怎样?

Renoviĝis la ekipaĵoj kaj teknologio. Pli kaj pli altiĝas la laborproduktivo. Ni klopodos por plenumi la taskon antaŭdate.

设备和技术更新了，劳动生产率在日益提高。我们要努力争取提前完成任务。

Vere ĝojinda novaĵo! Brilan rezulton vi atingu!

真是好消息！祝你们取得光辉的成就！

Kiel statas via kultivejo?

你们的农场如何？

Ĉio iras glate.

一切顺利。

Transdonu miajn bondezirojn al viaj familianoj kaj gekolegoj!

请代表我祝愿你们全家和同事们好！

Korajn dankojn! Mi volonte tion fros. Ĝis la revido!

衷心感谢！我一定照办。再见吧！

Ĝis la!

再见！

3. Aĝo 年龄

Kian aĝon havas via frato?

你兄弟多大年纪？

Li estas dudek-jara.

他二十岁。

Kiun aĝon havas via patro?

你父亲多大岁数？

Li estas kvindek-jara.

他五十岁。

Kiom da jaroj havas via fileto

你的小儿子几岁了？

Li havas apenaŭ tri jarojn.

他刚刚三岁。

En kiu aĝo vi estas?

你年纪多大了？

Mi estas en la dudekses-jara aĝo.

我二十六。

Do ni estas samaĝaj!

那我们是同岁了！

Ĉu homoj en nia aĝo povas ellerni lingvon?

我们这样年龄的人能学会语言吗？

Jes, oni povas tion fari eĉ en pli granda aĝo. Ne gravas la aĝo, sed la kuraĝo!

能，就是年龄再大些也能。不在乎年龄，重要的是勇气。

Ŝi estas pli aĝa, sed malpli saĝa.

她年纪比人大，智力比人差。

Kvankam nur dektri-jara, ŝi tamen jam fariĝis ĉampiono en la konkurso.

虽然只有十三岁她却已经在比赛中得了冠军。

Lia pli aĝa frato estas pianisto kaj lia pli juna fratino estas violonisto.

他哥哥是位钢琴家，他妹妹是位小提琴家。

La blankharulo estas unu el la veteranaj esperantistoj de nia urbo. Baldaŭ ni celebros la oran jubileon (50-dekjariĝon) de lia esperantiĝo.

那位白发老人是我们市的老世界语者之一。不久我们要庆祝他从事世界语五十年。

Lastjare ili festis la arĝentan jubileon de sia geedzeco.

去年他们庆祝了自己结婚二十五周年。

Ŝajnas al mi, ke li estas ĉirkaŭ sesdek-jara, sed efektive li jam superis la aĝon de okdek jaroj.

我看他大约有六十岁，实际上他已经八十多岁了。

Jes, vere. Li aspektas multe pli juna ol li fakte estas.

啊，的确是，他样子看起来比实际上年轻得多。

Tamen lia penso jam ne estas tiel rapida kiel en lia bela aĝo. Liaj manoj ĉiam tremetas.

可是他的脑筋已经没有正当年那样敏捷了。他的手经常发抖。

La aĝo maljuna ne estas oportuna, ĉu ne?

俗话说年高多不便，不是吗？

Jes. Tamen la maljunaj ofte havas valorajn spertojn.

不错。可是老人往往有宝贵经验。

Li estas la plej aĝa, do li prenu la honoran lokon.

他最年长，就请他坐上席吧。

备用词语

Diamante jubileo (60-jariĝo aŭ 75-jariĝo) 60 大庆或 75 大庆, feto 胎儿, bebo、infaneto 婴儿, suĉinfano 奶娃娃, infano 儿童, knabo 男孩, knabino 女孩, geknaboj 少年, 啊的哦论坛 哦、plenaĝulo 成人, grandaĝulo、maljunulo、oldulo 老人, gejunuloj 青年, bubo 顽童、小淘气, plenkreskulo 大人, infanaĝo, infaneco 童年, knabeco 少年时期, juneco 青年时期, adoleskanteco 青春期, viraĝo 壮年, maljuneco、oldeco 老年, mortema 早晚要死的, plejaĝulo 族长, kadukulo 衰老的人, longvivulo 长寿者, novnaskito 新生儿, eternulo 永生的人

4. PROFESIOJ, OKUPOJ 职业, 职务

Kio vi estas?

您，什么工作？

Ĵurnalisto.

新闻记者。

Kio estas via okupo?

您是做什么的？

Edukado. Mi estas mezlerneja instruisto.

教育工作。我是中学教员。

Kio estas via profesia laboro?

您干哪一行工作？

Mi laboras kiel ŝtatoficisto.

我是公务员。

Kie vi laboras?

您在哪儿工作？

Mi laboras en scienca instituto.

我在一个科学研究所工作。

Do vi estas sciencisto?

那么说您是科学家了？

Ne. Mi okupiĝas pri administrado.

不，我搞的是行政（管理）工作。

Ĉu vi interesiĝas ankaŭ pri sciencoj?

您对科学有兴趣吗？

Jes, mi estas amatoro de radio kaj televizio.

有，我是无线电和电视的业余爱好者。

Ĉu troviĝas esperantistoj inter viaj kolegoj?

您的同事当中有世界语者吗？

Jes, profesoro A estas tre fervora esperantisto.

有，A 教授是一位热心的世界语者呢。

Ĉu Esperanto utilas al lia scienca laboro?

世界语有助于他的科学工作吗？

Jes, li korespondas kun eksterlandaj kolegoj kaj ricevis de ili multe da utilaj materialoj en naciaj lingvoj.

是的，他和外国的同行们通信，得到了许多民族语的有用的资料。

Ĉu ankaŭ vi korespondas per Esperanto kun eksterlandanoj?

您也用世界语和外国人通信吗？

Jes, kun radio-amatoroj. Kelkaj el ili multe min helpis en la ŝatokupo.

是的，和无线电业余爱好者通信。有的对我的爱好帮助很大。

Ĉu vi legis la libron *Fine Mi Komprenis la Radion*?

您读过《我终于懂得了无线电》这本书吗？

Jes, ĝi estas tre bone skribita kaj tiu libro verkita en Esperanto estas tradukita en dek kelkajn lingvojn.

读过，它写得很好，这本用世界语写的书已经翻译十几种文字。

Ĉu la verkinto estas profesia esperantisto?

书的作者是职业世界语者吗？

Ne, li estas scienca laboranto.

不，他是一位科学工作者。

备用词语

A. Industrio 工业

Laboristo 工人, tornisto 车工, rabotisto 刨工, muldisto 铸工, stabllaboristo 钳工, ŝtalfandisto 炼钢工人, laminatisto 轧钢工人, vendisto 电焊工, 气焊工, lutisto (用焊锡焊接的) 焊工, muntisto 装配工, riparisto 修理工, forĝisto 锻工, 铁匠, hejtisto 司炉, ministo 矿工, arganisto 吊车工人, elektristo 电工, ŝpinistino 纺纱女工, teksisto 织布工人, presisto 印刷工人, kompostisto 排字工人, bindisto 装订工人, kemiindustria laboristo 化工工人, konstruisto

建筑工人, nasonisto 泥水匠, 瓦匠, ĉarpentisto 木匠, 木工, lignaĵisto 细木工, 家具工人, fervojisto 铁路工人, lokomotivisto 火车司机, ŝoforo 汽车司机, piloto 引水员, 领航员, 飞机驾驶员, signalisto 信号员, konduktoro 乘务员, tramisto 电车司机, trolebusisto 无轨电车司机, ŝargisto 装卸工, portisto 搬运工, transportisto 运输工人, poŝtoficisto 投递员, telefonisto 电话员, telegrafisto 报务员, termezuristo 测量员, teknikisto 技术员, inĝeniero 工程师, frezisto 铣工, arkitekto 建筑师, dompentristo 粉刷工人, ŝtonhakisto 石匠, metiisto 手艺人, okaklasa laboristo 八级工, maŝindeseĝnisto 制图员

B. Agrikulturo, Bestobredado k.a. 农牧业

kampanano 农民, terkulturisto 农夫, kampulo 种田人, ĝardenisto 园丁, traktoristo 拖拉机手, bredisto 饲养员, paŝtisto 牧民, ŝafisto 羊倌, melkistino 女挤奶员, kamplaboristo 农业工人, kombajnisto 康拜因手, fiŝisto 渔夫, semanto 播种者, rikoltanto 收割者, greftisto 接种者, agronomo 农学家, forstisto 林业工人, direktoro de ŝtata kultivejo 国营农场场长

C. Komerco 商业

komercisto 商人, kolportisto 小贩, 货郎, bazarvendisto 摊贩, detal(vend)isto 零售商, eksponisto 叫卖员, agento 代理, komizo 店员, vendisto 售货员, brokantisto 卖旧货的, kontoristo 账房先生, librotenisto 簿记, kontisto 会计, spekulanto 投机商, borsisto 证券交易商, makleristo 经纪人, peranto 中间商, kontrabandisto 走私犯

Ĉ. KULTURO,SCIENCO, HIGIENO k.s. 文化、科技、卫生等

instruisto 教师, profesoro 教授, asistanta profesoro 助教, docento 讲师, rektoro 大学校长, lernejestro 校长, dekano 主任教授, fakultestro 系主任, lektoro 中学教师, 大学教员, sciencisto 科学家, filozofo 哲学家, astronomo 天文学家, geologo 地质学家, zoologo 动物学家, botanikisto 植物学家, biologo 生物学家, matematikisto 数学家, fizikisto 物理学家, kemiisto 化学家, historiisto 历史学家, geografo 地理学家, pedagogo 教育家, filologo 语言学家, arkeologo 考古学家, medicinisto 医学家, kuracisto 医生, doktoro 大夫, 医学博士, farmakologo 药学家, okulisto (oftalmologo) 眼科医生, dentisto 牙科医生, otorinolaringologo 眼耳鼻喉科医生, kirurgo 外科医生, internkuracisto 内科医生, ĉinmedicina kuracisto 中医大夫, apotekisto 药剂师, ginekologo 妇科大夫, pediatro 小儿科大夫, akuŝistino 助产士, flegistino 护士, aktoro 演员, dancistino 舞女, kantisto 歌唱家, dramisto 戏剧家, verkisto 作家, aŭtoro 作者, novelisto 短篇小说家, romanisto 长篇小说家, fabelisto 童话家, eseisto 散文家, poeto 诗人, liriko 抒情诗人, pentristo 画家, tradukisto 翻译家, interpretisto 口语翻译, mimikisto 哑剧演员, redaktoristo 编辑, ĉefredaktoro 总编, kompilinto 编者, poluristo 改稿人, raportisto 记者, ĵurnalisto 新闻工作者, kompostisto 排字工人, linitipisto 费诺排铸工, monotipisto 摩诺排铸工, kontrolisto de presprovaĵo 校对员, speciala korespondanto 特别通信员, kontribuanto 投稿人, cezuristo 书刊检查官, recenzisto 书刊评论家, komentariisto 注释家, komponisto 作曲家, koregrafo 芭蕾舞设计师, papertondisto 剪

纸艺人, portretisto 肖像画家, lignogravuristo 木刻家, skulptisto 雕刻家, scenaristo 电影剧作家, modlisto 雕塑家, violonisto 小提琴家, pianisto 钢琴家, anoncist(in)o (女) 报幕员, reĝisoro 舞台监督, fotisto (fotografo) 摄影师, akrobato 杂技演员, magiisto 魔术师, ĵonglisto 耍把戏的, humuristo 幽默家, baletistino 芭蕾女演员, opera aktoro 歌剧演员, humordialogisto 相声演员, olepentristo 油画家, sportisto 运动员, tablotenisisto 乒乓球运动员, gimnastikisto 体操运动员, piedpilkisto (futbalisto) 足球运动员, naĝisto 游泳运动员, montgrimpisto 登山运动员, skiisto 滑雪运动员, ŝakisto 象棋手, vejĉiisto (goisto) 围棋手, brigisto 桥牌手, pafisto 射击手

D. Metiaj Servoj 服务业

kuiristo 厨师, bakisto 面包师, buĉisto 屠夫, tajloro 裁缝, trikisto 编织工人, seruristo 锁匠, pordisto 看门人, stevardio 航空小姐, triciklisto 三轮车夫, taksiisto 出租汽车司机, ŝuisto, botisto 鞋匠, brodistino 刺绣女工, horloĝisto 钟表匠, ladaĵisto 洋铁匠, meblisto 木器工人, kelnero 堂倌、招待, servistino 女仆, stratpurigisto 清道夫

E. Militistoj kaj Ŝtatoŝtatoj 军政人员

generalisimo 大元帅、总司令, marŝalo 元帅, armeestro 军长, diviziestro 师长, brigadestro 旅长, regimentestro 团长, batalionestro 营长, rotestro 连长, plotonestro 排长, soldato 士兵, generalo 将军、上将, leŭtenantgeneralo 中将, majorgeneralo 少将, kolonelo 上校, subkolonelo 中校, majoro 少校, kapitano 上尉, leŭtenanto 中尉, subleŭtenanto 少尉, serĝento 上士, kaporalo 伍长, proviantisto 军需人员, adjutanto 副官, oficiro 军官, kadeto 士官生, politika komisararo 政委, komandanto 司令官、指挥官, kuriero 传令兵, spiono 间谍, gardstaranto (sentinelo) 岗哨, gvatisto 侦察兵, rekruto 新兵, sapeisto 工兵, bazukisto 火箭炮手, artileriano 炮兵, infanteriano 步兵, raketisto 火箭手, tankisto 坦克手, piloto 飞行员, husaro 轻骑兵, radaristo 雷达兵, prezidanto 主席, prezidento 总统, ĉefministro 总理、首相, ministro 部长, urbestro 市长, provincestro 省长, guberniestro 县长, distriktestro 区长, prefekto 知府, komitatano 委员, ŝtatestro 元首, 仍二是投入俄国家元首, reĝo 国王, imperiestro 皇帝, regento 摄政王, buroestro 局长、厅长, sekciestro 科长, kadro, ŝtatafunkciulo 干部, skribisto 文书, sekretario 秘书, tajpisto 打字员, oficisto 职员, popola reprezentanto 人民代表

F. Religio 宗教

bonzo 和尚, bonzino 尼姑, bikŝuo 佛, akolito 沙弥, novico 新信徒, abato 方丈、修道院院长, lamao 喇嘛, taoisto 道士, budhisto, budhano 佛教徒, fakiro 苦行僧, laiko 俗人, pastro 牧师, Patro 神父, papo 教皇, epikopo 主教, monaĥino 修道士, kristano 基督徒, katoliko 天主教徒, moslemo (muzulmano) 穆斯林, 回教徒, imamo 阿訇

5. Tempo 时间

Kiam oni antudiris la aperon de internacia lingvo?

何时预言国际语的出现?

En la deksepa jarcento. Tion antaŭdiris la ĉeĥa sciencisto Komensky (1592-1670) kaj la germana filozofo Leibnitz (1646-1716).

17 世纪，捷克科学家考门斯基（1592-1670）和德国哲学家布尼兹（1646-1670）预言过。

Kiam publikiĝis la unua libro de Esperanto?

世界语第一书是何时发表的?

Je la 14-a de Julio de la jaro mil-naŭcent-okdek-sepa.

1887 年 7 月 14 日。

Kiam okazis la centjara jubileo de Esperanto?

世界语百周年纪念是在哪一年?

En la jaro 1987.

在 1987 年。

Kioma tago estas hodiaŭ?

今天几号?

Hodiaŭ estas la 29-a de marto.

今天是 3 月 29 日。

Kioma horo estas nun?

现在几点钟?

Nun estas la sepa kaj 25 minutoj.

现在 7 点 25 分。

Kiam vi ellitiĝas ĉiutage?

你每天几点起床?

Je la sesa.

六点起床。

Kiam vi matenmanĝas?

什么时候早餐?

Ĉirkaŭ la sepa.

七点左右。

Kiam vi iras al la oficejo?

什么时候上班?

Je kvarono antaŭ la oka.

七点三刻。

Kioma horo estas nun laŭ via horloĝo?

你的表几点啦?

Duono post la sepa.

七点半啦。

Kiam vi komencas labori ĉiutage?

你每天什么时候开始工作?

Ĝuste je la oka.

八点正开始工作。

Ĉu vi memoras la daton de la naskiĝo de doktoro Zamenhof?

你记得柴门霍夫博士的生日吗？

Jes, la 15-a de decembro, 1859.

记得，是 1859 年 12 月 15 日。

Kiam vi finlegos la libron?

你什么时候看完这本书？

Kredeble post unu semajno.

我想一星期后。

Ĉu jam batis la oka?

打过八点了吗？

Ne, ankoraŭ ne.

没有，还没有。

Do estas ankoraŭ frue.

那么说还早呢。

Kamarado, jen sonoras la tintilo. Jam estas tempo por eklabori.

同志，铃声响了。到工作的时候了。

Venu morgaŭ precize je la naŭa.

明天请九点整准时来。

Jes, mi certe ne malfruiĝos.

好，我一定不迟到。

Reguligu vian horloĝon laŭ la murhorloĝo.

请按照挂钟对时。

Ho, ĝi iom tro rapidas! Ĝustigu ĝin laŭ la radio.

它快了一点！请按广播对时。

Mi havas biletojn por filmo je la 19-a ĉivespere. Ĉu vi povus iri kun mi?

我有今晚 19 点的电影票。你可以和我同去吗？

Jes, volonte. Sed mi devos unue iri al la stacio posttagmeze, ĉar mia kuzo alvenos je la 17-a.

好，可以。不过我下午先得去车站，因为我表哥 17 点到这儿。

Tio ne malhelpos, ĉar nun la trajnoj estas ĉiam akurataj.

那不得事，现在火车都是正点到。

Mi esperas, ke mi povos lin konduki hejmen je la 18-a kaj finos la vespermanĝon en unu horo.

我希望 18 点能带他回家，一小时吃完晚饭。

Ĉu via horloĝo iras akurate?

你的表准吗？

Ĝi neniam eraris eĉ minuton.

它从不差一分钟。

Ankaŭ mia horloĝo bone funkcias, sed mi ofte forgesas ĝin streĉi.

我的表走得很好，可是我常常忘记上弦。

Prefere aĉetu por vi aŭtomatan aŭ elektronikan horloĝon, kiu povas iradi sen bezono de streĉado (de risorto).

最好你买块自动手表或者电子表，用不着上弦。

Ĉu via kuzo longe restos ĉi tie?

你表哥在这儿呆的时间久吗？

Mi ne estas certa pri tio. Eble li forveturos baldaŭ post la simpozio.

我说不好。他也许开完学术讨论会就走。

Ĉu tia kunsido kutime okazas ĉiujare?

这种会每年都开吗？

Ne. Ĝi okazas en ĉiu dua (tria, kvara) jaro.

不。它每两（三、四）年开一次。

Kiom longe ĝi daŭras ĉiufoje?

每次开多久？

Sep aŭ ok tagoj.

开七八天。

Ĉu via studrondo regule kunvenas?

你们的学习小组经常开会吗？

Jes, ni kunvenas vespere de ĉiu dimanĉo.

是的。我们每个星期日的晚上开会。

Kiomfoje kaj po kiom da horoj via Esperanto-grupo lernas en ĉiu semajno?

你们的世界语小组每星期开几次会？每次开多长时间？

Dufoje, po du horoj.

开两次，每次两小时。

Do vi kunsidos je la 28-a, ĉu ne?

那么你们 28 日要开会了，是不是？

Certe. Ĉar la lastan dimanĉon ni decidis aŭskulti tiutage surbendigitan rakonton de sinjoro S.

一定开。因为上星期天我们决定在那天听 S 先生讲故事的录音。

Ĉu ankaŭ nemembroj povus ĝin ĉeesti? Mi ne deĵoros tiutage kaj povas ĉeesti.

不是会员也可以参加吗？那天我不值班，可以去。

Vi certe estos bonvena! En aprilo estos la kvina datreveno de la fondiĝo de nia grupo kaj ni aranĝos ekspozicion.

一定欢迎你来！四月份我们小组成立五周年，我们要举办展览会。

Bonvolu helpi nin per viaj esperantaĵoj.

请用你的世界语书刊帮帮我们。

Volonte!

我很愿意！

备用词语

A. 四季

printempo 春, somero 夏, aŭtuno 秋, vintro 冬

B. 月份

januaro 一月, februaro 二月, marto 三月, aprilo 四月, majo 五月, junio 六月, julio 七月, aŭgusto 八月, septembro 九月, oktobro 十月, novembro 十一月, decembro 十二月

C. 星期

semajntagoj 周日, lundo 星期一, mardo 星期二, merkredo 星期三, jaŭdo 星期四, vendredo 星期五, sabato 星期六, dimanĉo 星期天

Ĉ. 节日

La Novjara Tago 元旦, La Printempa Festo 春节, La Unua de Majo (Majfestoj) 五一节, La Virina Tago (La Oka de Marto) 三八妇女节, La Infana Tago 儿童节, La Unua de Julio 七一, La Unua de Aŭgusto 八一, La Aŭtunmeza Festo 中秋, La Nacia Festo 国庆节, La Kristnasko 圣诞节, Pasko 复活节, Pentekosto 五旬节, Karnavalo 狂欢节, La Drakboata Festo 龙舟节, La Torĉofesto 火把节, La Librotago 书籍节, La Lanterna Festo 灯节, ferio 假日 (一天), libertempo 假期

D. 其他用语

La okdekaj jaroj 八十年代, jardeko 十年, dekada (tagdeko) 旬, printempa ekvinokso 春分, aŭtuna ekvinokso 秋分, somerkomenco 立夏, aŭtunkomenco 立秋, somera solstico 夏至, vintra solstico 冬至, ordinara jaro 平年, superjaro 闰年, periodo 时期, stadio 阶段, momento 时刻, sekundo 一秒, minuto 一分, palpebrumo 瞬间, 刹那, efemera 短暂的, eterneco 永恒, vivdaŭro 一生、终身, diurno 一昼夜, noktomezo 子夜, antaŭvespero 前夜, poste 以后, frue aŭ malfrue 早晚, tuj 立刻, Arĝenta Jubileo 银庆, Ora Jubileo 金庆, fruiĝi la eldonon 提前出版时间, malfruiĝinta novaĵo 迟到消息, antaŭdate plenumi taskon 提前完成任务, ĝisdatigi 使及时

6. LERNEJO 学校

Jen eksonoras por leciona horo! Ni eniru la klasĉambron!

上课铃响了! 我们到教室里去吧!

Bonan matenon!

早啊!

Bonan matenon, sinjoro instruisto!

老师早!

Bonan matenon, gek-doj! Ĉu vi plenumis viajn hejmajn taskojn?

同志们早! 你们完成家庭作业了吗?

Jes. Jen mia kajero.

完成了。这是我的练习本。

Bonvolu donu al mi viajn ekzercajn kajerojn ke mi kontrolu ilin.

请把练习本交来给我看看。

Lastfoje ni haltis je la dudeka leciono. Nun malfermu viajn lernolibrojn je la paĝo 120-a.

上次我们是在二十课打住的。现在请打开课本翻到一百二十页。

Kamarado Lin, laŭtleĝu.

林同志, 请你朗读。

De kie mi komencu?

我从哪儿开始?

De la dua linio de malsupre.

从倒数第二行开始。

La oka vorto en la 2-a linio estas mispresita. Ĝi devas esti legata "lumo" anstataŭ "luno".

第二行第八个字印错了。应该把“luno”改为“lumo”。

Venu, kamaradino Liu. Skribu la frazon sur la nigra tabulo.

刘同志, 请你过来, 把这个句子写在黑板上。

Memoru la poemon parkere.

请把这首诗背熟。

Plenigu la blankaĵojn en jenaj frazoj.

填写下列句子中的空白。

Korektu jenajn frazojn.

改正下列句子中的错误。

Ĝuste interpunkciu la sekvantan tekston.

请给下列文字加上正确的标点。

Ordigu la kvin grupojn da vortoj, ke ili formu tri senerarajn frazojn.

请把这五组词作成三个正确无误的句子。

Faru po du frazojn uzante la donitajn prepoziciojn.

用下列前置词各造两个句子。

Marku la erarojn el la donitaj frazoj per minuso.

请把下列句子中的错误句子标上减号。

Kamarado Li, recitu la poemon.

李同志，请背诵这首诗。

Vi laŭtlegis sufiĉe flue, sed misakcentis kelkajn silabojn.

你读得相当流利，不过有几个音节读错了。

Kiu povas montri liajn erarojn?

谁能指出他读错的地方？

Kiu povas ĉinigi la poemon perbuŝe?

谁能口头翻译一下这首诗？

Levu la manon, kiu povas.

会的请举手。

Nun ni laŭtlegu la tekston laŭvice alineon post alineo.

现在我们一段一段地轮流读这篇课文。

Nun estas via vico. Stariĝu kaj komencu.

现在轮到你了。请站起来，读吧。

Vi erare prononis la konsonantojn b, d, g. Ili diferencas de b, d, g en nia hanlingva latiniga sistemo; ili estas voĉaj.

你把 b, d, g 三个辅音读错了，它们和我们汉语拼音方案的 b, d, g 不同，它们是浊辅音。

Kies vico nun estas?

现在轮到谁了？

Mia vico.

轮到我了。

Estu kuraĝa!

别怕。

Ne perdu tempon!

不要耽误时间！

Elparolu la vorton refoje.

请把这个词儿重读一遍。

Ripetu kion mi diris.

请复述我的话。

La akcento devas esti sur la antaŭlasta silabo.

重音应在倒数第二个音节。

Tiu frazo estas ĝusta gramatike, sed erara logike.

这句话语法正确，但逻辑不通。

Pretigu skribilojn. Nun mi diktos al vi.

请把文具准备好，现在要你们听写。

Ĉu mi povus uzi krajonon?

我可以用铅笔吗？

Ne. Skribu plume kaj ĉiun duan linion.

不，请用钢笔隔行书写。

Mi ne kaptis la ĵus diritajn vortojn. Bonvole ripetu.

刚说的话我没听清，请再说一遍。

Kion signifas "nepo"?

"nepo"是什么？

Nepo estas filo de filo.

Nepo 是儿子的儿子。

Pardonon, ripetu!

对不起，请再说一遍！

Kiam okazos la semestra ekzameno?

什么时候期考？

En la venonta semajno.

下星期。

Certe vi ricevos bonajn notojn, sed mi timas, ke ŝi malsukcesos en la ekzameno.

你一定会考出好成绩，可是我担心她会考不及格。

Kiom da poentoj vi gajnis?

你得了多少分？

Okdek kvin.

八十五分。

Baldaŭ komenciĝos la somera libertempo. Kiam ni ricevos la diplomon?

很快就到暑假了。我们几时能得到证书？

Morgaŭ ni kunvenos por adiaŭi la diplomitojn.

明天我们开会欢送毕业生。

Kiom diplomiĝis?

有多少人毕了业？

Kiom da lernantoj troviĝas en via lernejo?

您校有多少学生？

Mil ducent. Enlasiĝos tricent novaj el la kvincent kandidatoj.

一千二百。在五百名考生之中将招收新生三百名。

Ĉu estas internuloj en via normala lernejo?

你们师范学校有住宿生？

Jes, preskaŭ ĉiuj loĝas en la lernejo.

有，几乎所有学生都住校。

Ĉu oni povas ricevi stipendion de ĝi?

人们可以享受助学金吗？

Jes. Tio estas donata al kvin procentoj de la gelernantoj.

可以，有百分之五的学生发给助学金。

El kio konsistas via lernoprogramo?

你们有哪些课程？

Ĝi konsistas el han-lingvo, matematiko, ĉina literaturo, geografio, historio, fiziko, kemio, biologio, botaniko, zoologio, muziko, belarto kaj fizikokulturo.

课程有汉语、数学、语文、地理、历史、物理、化学、生物学、植物性、动物学、音乐、美术、体育等。

Ĉu oni zorgas sufiĉe multe ankaŭ pri la moralo de la lernantoj?

对学生的道德方面也给予足够的重视吗？

Jes, antaŭ ĉio amo al laboro kaj al la popolo estas instruata al ili.

是的，首先是教育他们热爱劳动、热爱人民。

La studentoj kaj studas kaj laboras por fariĝi perfekta konstruantoj de socialismo.

学生们一面从事研究一面从事劳动，以成为完美的社会主义建设者。

Ni havas bone ekipitajn bibliotekon, laboratorion, sportejon kaj fabrikon.

我们有设备很好的图书馆、实验室、体育场和工厂。

备用词语

universitato 大学, instituto 研究所, 学院, kolegio 单科大学, 学院, politekniko 工业大学, mezlernejo, liceo, gimnazio 中学, elementa lernejo 小学, dependa lernejo 附属学校, postlabora lernejo 业余学校, fakultato 系, fakultativa kurso 选修课, deviga edukado 义务教育, senpaga lernado 免费学习, lekcii (大学) 讲课, prelegi 作报告, disertaĵo 论文, lektoro 讲师, profesoro 教授, doktoro 博士, magistro 硕士, bakalaŭro 学士, dekano 主任教授, rektoro 大学校长, ĉefinstruisto 主任教师, helpinstruisto 辅导教师, universitata grado 大学学位, naturaj sciencoj 自然科学, sociaj sciencoj 社会科学, fiziologio 生理学, psikologio 心理学, medicino 医学, astronomio 天文学, meteologio 气象学, geologio 地质学, arkeologio 考古学, patologio 病理学, entomologio 昆虫学, elektroniko 电子学, civila inĝenierado 土木工程, metalurgio 冶金学, sociologio 社会学, ekonomiko 经济学, filozofio 哲学, jurisprudenco 法学, retoriko 修辞学, beletro 美文学, metriko 音韵学

7. KUNVENO 集会

Pardonon, kie estas la akceptejo?

请问，接待处在哪儿？

En la ĉambro dekstre de la pordo.

在门右边的房间里。

Kie estas la informejo?

询问处在哪儿？

Ĉe la enirejo.

在入口处。

Kie okazos la interkonatiĝa vespero?

相识晚会在哪儿举行？

En la salono Zamenhof.

在柴门霍夫大厅里。

Ĉu la hodiaŭa kunsido de la Akademio de Esperanto estas publika?

今天的世界语学院的会是对外的吗？

Mi ne scias. Petu informon de la informejo.

我不知道。请问问讯处。

Kie estas la giĉeto por la venontjara kongreso?

关于明年大会的窗口在哪里？

En la dua etaĝo.

在二楼。

Ĉu ankaŭ tie troviĝas la libroservo de la kongreso?

大会书刊服务部也在哪儿吗？

Ne, en la subtera etaĝo.

不，在地下室。

Ĉu la sciigo pri nia kunsido estas tajpita kaj multobligita?

开会的通知已经打印好了吗？

Jes, kaj mi jam sendis ĝin al la membroj de la konstanta komitato.

打印好了，我已经寄给了各个常委。

Do, ĉio en ordo.

那就一切就绪了。

Sed eble du el la komitatanoj ne povos ĉeesti la kunsidon.

可是，也许有两位委员不能出席会议。

Pro kio?

为什么？

Kamarado Ĉen forveturis pro afero kaj kamaradino Lin malsaniĝis.

陈同志到别处办事去了，林同志病了。

Bedaŭrinde. Mi esperas, ke ili povos ĝin ĉeesti, ĉar ni diskutos pri proponoj, kiuj tre interesas nin.

很遗憾。这次我们要讨论他们非常感兴趣的问题，希望他们能出席。

Ĉu ni prokrastu la kunvenon?

把会期延迟些好吗？

Ne, ĝi devas okazi en la difinita tempo.

不，会议要按时举行。

Sidiĝu gekamaradoj, tuj komenciĝos nia kunveno.

同志们请坐吧，会议马上就要开始了。

Silentu, gekamaradoj. Jam estas tempo por komenci. Mi malfermas la kunsidon.

同志们请肃静。开会时间已到。我宣布开会。

Unue ni elektu prezidanton.

首先我们选举主席。

Atentu, gekamaradoj, nepre skribu legeble, kaj nur unu kandidaton sur unu batolilo.

同志们请注意，字务必写清楚，一票只写一位候选人。

Bonvolu kolekti la batolilojn, kamaradino Sun.

孙同志，请你收选票。

Ni kalkulu la batolilojn.

让我们来计票。

Kamarado Liang estas unuanime elektita.

梁同志一致通过。

Nun ni diskutu pri la propono fondi bibliotekon. Kiu deziras la parolon?

现在我们讨论建立图书馆的建议。谁要发言？

Unue kamaradino Ma havu ĝin.

马同志请首先发言。

Nun estas via vico, k-do Liu.

刘同志，现在该你发言。

Mi plene konsentas kun kamaradino Ma. Ni ne devas atendi ĝis akiro de domo. Unue ni fondu korespondan bibliotekon, ke oni povu utiligi la esperantaĵojn kolektitajn.

我完全同意马同志的意见，不要等弄到房子。我们要先建立通信图书馆，把搜集的世界语书刊利用起来。

Bona ideo! Sed kiu prizorgos la aferon?

好主意，可是谁来办呢？

Mi proponas, ke k-dino Lan funkciu kiel nia bibliotekistino, ĉar ŝi estas ne nur diligenta kaj helpema sed ankaŭ zorgema.

我建议蓝同志做图书管理员，她勤快、乐于助人，而且又很仔细。

Ĉu vi havas aliajn proponojn? Se ne, ni voĉdonu pri la propono. Kiu subtenas la proponon de k-do N, levu manon!

还有别的建议吗？没有我们就来表决，赞成这项建议的举手！

Kontraŭantoj, levu manon!

反对的，举手！

Kio estas la rezulto de la voĉdono?

表决结果如何？

Dek por, tri kontraŭ; do la propono estas akceptita.

十票赞成，三票反对，决议通过了。

Nun ni transiru al alia programero (punkto de nia programo).

现在我们转入另一项议程。

Bonvole legu la protokolon de la lasta kunsido.

请宣读一下上次会议的记录。

Nun ni traktu la trian eron de la tagordo.

现在我们来研究第三项议程。

Ekparolu nur post permeso de la prezidanto.

请得到主席允许后再发言。

Parolu pli laŭte, ĉar la megafono ne bone funkcias.

请讲得大声些，扩音机不好使。

Reguligu la megafonon!

请调一下扩音机。

Proksimiĝu al la mikrofono.

请把话筒移近些。

Ne interrompu lian parolon!

请不要打断他的话。

Ni iom ripozu kaj daŭrigu la diskutadon post 10-minuta paŭzo.

我们休息一下，休息十分钟后继续讨论。

Diru vian opinionon, se vi tion ne aprobas. Silento estas konsento.

如不赞成请发表意见，不吭气是同意。

Escepte de la observantoj, ĉiuj devas diri jes aŭ ne pri la debatanta propono.

除了列席的观察员大家都要对议案表示赞成与否。

Je la fino de la kunveno prezentiĝos amuzaj programeroj.

会将表演文艺节目。

Nun ni aŭskultu raporton de nia estimata honora prezidanto.

现在我们请我们尊敬的名誉主席做报告。

Refoje ni danku lin (pro la valora prelego) per varma manklakado.

让我们以热烈的掌声再次对他（作的报告）表示感谢。

备用词语

Universala Kongreso de Esperanto 国际世界语大会（简称 UK），simpozio 学术报告会，seminario（专业）讨论会，kolokvo 学术讨论会，vesper(kunsido)o 晚会，amaskunveno(mitingo) 群众大会，kongreso 大会，konferenco 会议，Popola Kongreso 人民代表大会，Dua Plena Sesio de la Sepa Centra Komitato de ĈKP 中共七届二中全会，tekunsido 茶话会，sindeteni de voĉo 弃权，unuvoĉe 一致，tranĉi ies parolon 打断某人的谈话，intermeti 插话，L.K.K. (Loka Kongresa Komitato) 地方大会工作委员会，prezidantaro（或 prezidiumo）主席团，plenuma prezidanto 执行主席，landa kongreso 全国大会，centjara jubileo 百周年大庆，kunvenejo，kongresejo，kunsideo 会场，rezolucio 决议，protokolo 记录

8. VETERO 天气

Rigardu, kiel ĉarme ruĝas la matena suno!

你瞧！红艳艳的太阳有多美呀！

Vere! Kaj tre agrablas la venteto!

真的！微风多舒服呀！

Tre refreŝiga estas la frisko (malvarmeto) de la mateno.

早晨的凉意使人感到清新。

Verŝajne ni havos belan tagon.

看来今天是好天气。

Tiel klara estas la ĉielo, eĉ nubeto ne troviĝas en la lazura firmamento.

天这么晴朗，蔚蓝的天穹万里无云。

Proksima prognozo de la meteostacio avertas, ke pluvos posttagmeze. Do kunportu ombrelon aŭ pluvmantelon, se vi ekskursos.

气象台的近期预报说下午要下雨。去郊游就要带雨伞或雨衣。

Nekredeble, ke pluvos. Ne ĝenu vin per trozorgemo!

不信会下雨。不要过分操心！

Sciu, ke la vetero de tiu ĉi loko estas kaprica. Kunportu do!

告诉你，这儿天气多变。带着吧！

Ĉi-jare la vetero estas tro seka. Do bonvenos pluvo.

今年有点干旱，下雨当然好。

Se la sekegeco daŭros ankoraŭ por monato, certe malabundos la rikolto de tritiko.

旱情倘若再持续一个月，小麦肯定歉收。

Jen la suno ardiĝas.
太阳热起来了。
Estas iom varme, ĉu ne?
有点热，是不？
Nur iomete pli varme.
略微热了一点。
Dum la someraj monato estas terure varmege en Wuhan.
夏季的月份武汉热得要命。
Oni sentas kvazaŭ ĉio brulus.
觉得一切在燃烧似的。
Estas sufoke varmege.
热得闷人。
La arda suno eĉ moligis la asfaltan.
炽热的太阳把柏油路面都晒软了。
Kontraŭ tia varmego eĉ elektra ventumilo povas fari nenion.
对这样的酷热连电扇也无济于事。
Tial oni devas instali klimatizilon.
所以需要装空调。
Kiel bone estus, se pluvetus!
下点小雨有多好！
Jen nuboj aperis.
看，有云彩。
Kiel rapide nubiĝas la ĉielo!
天阴得多快呀！
Malheliĝas kaj iom mildiĝas la varmego.
天色暗下来，热得好受点了。
Ekventegas!
起大风了！
Jen fulmo!
瞧，打闪了！
Jen tontras!
听，打雷了！
Ekpluvas!
下雨了！
Kia pluvego!
好大雨！
Neniam mi vidis tian fulmotondron.
我从未见过这样的雷雨。
Mi timas, ke ekhajlos.
恐怕要下冰雹了。
Jen hajlas! Ĉu vi ne rimarkis hejlerojn?
已经下雹子啦！你没有看见雹子吗？
Ho terure! Kiel grandaj hajleroj!
真要命！好大的雹子啊！

La grenplantoj estas terure damaĝitaj de la damninda hajlo.

庄稼给该死的冰雹可糟害苦了。

Ĉesis la hajlado kaj malfortiĝas la pluvo.

雹子不下了，雨也小啦。

Niaj vestoj tramalsekiĝis.

我们的衣服淋透了。

Malgraŭ la forta vento la konstruantoj daŭrigas sian laboron.

建设者们冒着大雨继续工作。

Oni devas rapidi, ĉar en frosta vintro la vetero malfavoras al tia laboro.

不能不快干，冬天不便于干这种活。

Jen sereniĝas la ĉielo.

天晴起来了。

La atmosfero tamen restas humida.

空气仍然湿漉漉的。

Ĉu tiu ĉi loko estas nebuloza?

这儿雾多吗？

Jes. Kaj ofte prujnas en malfrua aŭtuno.

是的。晚秋季节还常下霜。

En suda Ĉinio malofte neĝas, sed en la Nordoriento multe neĝas kaj la loĝantoj lertas en skiado.

华南少雪，但东北下雪多，居民善于滑雪。

Ĉu estas malvarmege dum vintro en Heilongjiang-provinco?

黑龙江冬天天气冷得厉害吗？

Jes, iam je pli ol 30 gradoj sub nulo laŭ C-termometro.

冷得厉害，有时候有摄氏零下三十多度。

Ĉu ofte atakas vin neĝoŝtormoj?

你们常遭暴风雪袭击吗？

Sufiĉe ofte.

次数相当多。

Por venki naturajn katastrofojn ni ankoraŭ devas multe klopodi.

要战胜自然灾害我们还要作很多努力。

Ĉu fondiĝis ĉe vi multaj meteostacioj por prognozi veteron?

你们建立了许多气象站来预报天气吗？

Jes, multe da tio ni jam starigis. Ni ankaŭ komencis uzi komputorojn kaj sputnikojn (artefaritajn satelitojn) en meteologia laboro.

是的，已经建立了许多。我们也开始在气象工作方面使用计算机和人造卫星了。

Nun la homoj ankoraŭ ne havas rimedojn por preventi tajfunojn, trombojn kaj sablotrombojn, tamen oni povas redukti damaĝon per prognozo pri ili.

现在人们还没有办法防止台风、龙卷风和沙尘暴，然而可以用预报来减少它们造成的损失。

En nordokcidenta Ĉinio oni konstruas forstojn por batali kontraŭ dezertiĝo kaj iom post iom mildigi la klimaton.

在西北人们正在植树造林以抵御沙漠化，并逐步改良哪儿的气候。

Ankaŭ en aliaj lokoj oni strebas por verdigi la landon kaj per tio plibonigi la klimaton. En la supraj basenoj de Jangzi-Rivero kaj la Flava Rivero, oni reŝanĝas kampojn sur deklivoj en forstejojn por preventi erozion kaj redukti la sablon en la riveroj.

其他地方人们也在努力进行绿化工作以改善气候条件。在长江和黄河上游，人们正在退田还林防止水土流失，减少江河的泥沙。

Mi kredas, ke la homo iam fariĝos vera komandanto de pluvo, vento, roso, prujno kaj aliaj naturaj fenomenoj.

我相信，人类有一天会成为雨、露、风、霜以及其他自然现象的真正指挥者。

备用词语

zefiro 和风, brizo 4-6 级风, ŝtormo, uragano 暴风, lavango 雪崩, glacio 冰, galciiĝi 结冰, 放入哦身体哦严寒, ciklono 旋风, kumuluso 积云, ciruso 卷云, nimbuso 雨云, trombo 龙卷风, barometro 气压计, termometro 温度表, veterprognozo 天气预测, veterinformoj 天气预报, meteobulteno 气象简报, inundo 洪水, diluvo 特大洪水, tempesto 暴风雨, atmosfero 大气, premo de 2 atmosferoj 两个大气压, musono 亚洲贸易风, alizeo 贸易风, grajlo 霰, ventmontrilo, ventkoko 风向标, nebulpluvo 毛毛雨, neĝopluvo 雨加雪, pluvokvanto 雨量, pluvometro 雨量计, precipitaĵo 降水

9. JESADO, KONSENTO 肯定，同意

Mi aŭdis de mia amiko, ke vi scipovas paroli esperante. Ĉu vere?

听一位朋友说你会讲世界语，是真的吗？

Jes, sed ne tre bone.

是的，但我讲不太好。

Mi tre ĝojas, ke fine mi trovis esperantiston en najbareco. Ĉu vi bonvolus min helpi en praktikado de Esperanta konversacio?

我真高兴，终于我找到了一位邻近的世界语者。你愿意帮助我应用世界语进行会话吗？

Volonte. Mi nur timas, ke mi ne povos vere vin helpi, ĉar ankaŭ mi ne multe spertis en tio.

愿意。只怕我实际帮不了你什么忙。因为在这方面我也没有多少经验。

Dankon pro via afableco! Vi estas tro modesta! Ĉu mi povus vin viziti vespere en dimanĉo? Ĉu vi estas libera post la vespermanĝo?

谢谢你啦！你太客气啦！我可以在星期天晚上来看你吗？晚饭后你有空吗？

Ĝenerale jes. Bonvolu telefoni al mi antaŭ vizito por certiĝi pri mia ĉeesto. Kelkiam mi vizitas amikon en vespero.

大概都有空。你要来访请先打个电话看我可在家，因为有时我晚上去拜会朋友。

Jes, mi telefonos. Ĉu vi povus vin viziti kune kun mia amikino?

是，我先打电话。我可以带我的女朋友一起来访吗？

Kompreneble. Ĉu ankaŭ ŝi lernas Esperanton?

当然可以。她也在学世界语吗？

Ŝi ĵus finis elementan kurson. Ĉu ŝi povus partopreni en konversaciaj ekzercoj?

她刚学完初级班。她可以参加会话练习吗？

Kial ne?

为什么不能呢？

Do vi havas afablecon helpi ankaŭ ŝin?

那么说你也愿意帮助她了？

Certe.

当然。

Mi pensas, ke ni povos elekti por ni konversacian libron por laŭtlegado. Eble tio utilis.

我想我们可以选一种会话书进行朗读。也许这会有好处。

Ankaŭ mi same opinias.

我也这样想。

Ĉu vi povus pruntedoni al mi tian libron?

你可以借给我这样的书吗？

Mi bedaŭras, ke ne, ĉar mi havas nur du-tri malnovajn konversaciajn librojn, kiuj ne taŭgas. Vi povas peti helpon de la societo.

很抱歉我不能，因为我只有两本旧会话书，不好用。你可以请学会帮你的忙。

Bone. Ĉu vi foje interparolis kun alilanda esperantisto?

好吧。你和外国世界语者交谈过吗？

Ho jes, sufiĉe multfoje.

啊，交谈过，次数相当多。

Ĉu ankaŭ kun italaj kaj jugoslavaj esperantistoj?

也跟意大利和南斯拉夫的世界语者谈过？

Jes, ankaŭ.

是的，也谈过。

Oni diras, ke jugoslavaj esperantistoj prononcas modele.

据说南斯拉夫的世界语者发音很标准。

Eble vi pravas. Ĝenerale tiuj, kiuj vaste kontaktas alilandanojn, havas relative multan zorgon pri bona prononco. Ĉu vi neniam interparolis kun alilandano?

你说得可能不错。一般说来广泛接触外国人的人比较注意读音正确。你从来没和外国人交谈过吗？

Ankoraŭ ne.

还没有呢。

Do havigu al vi tiajn ŝancojn.

那就要争取这种机会呀。

Mi estis invitita al kunsido kun alilandanoj, sed mi estis timema ekparoli.

我应邀出席过有外国人参加的会，可是我害怕开口。

Estu kuraĝa! Se vi ĉiam tenus la buŝon fermita, vi ne povus progresi en konversacio.

不要害怕嘛！你要是总不开口，就不能在会话方面取得进步，是不是？

Vere! Mi faros kun kuraĝo kaj ne timos erarojn.

的确是！我要鼓起勇气，不怕讲错。

Sendube vi rapide progresos, se vi praktikos sentime.

你如果大胆地实践，无疑是会迅速进步的。

Vi povas havigi al vi sonbendon kun registritaj paroloj de modelaj parolantoj kaj imitadi iliajn voĉojn. Multe voĉlegu. Tio helpos vin en ekzercado de konversacio.

你可以给自己语音标准的录音带，模仿他们的语音。多多朗读。这可以有助于你的会话练习。

备用词语

nature 自然, sendube 无疑, probable 可能, verŝajne jes 好像是的, kredeble 想必是, memkompreneble 当然, certege 必然, tute certe 毫无疑问, tamen eble 可是也许, kontraŭe, jes 正相反、是的, prave 对, trafe vi diris 你说得对, samopinii 同意, konsenti 赞同, plene konsenti kun iu 完全同意某人, supozeble 大概, male, mi aprobas 恰恰相反, 我赞成, ne malbone 不错, voĉdoni por tio 投票赞成

10. NEADO KAJ RIFUZO 否定, 拒绝

Ĉu vi fumas?

您吸烟吗?

Ne.

不吸。

Ĉu vi ne fumis?

您没有吸过烟吗?

Ne, neniam mi fumis.

没有, 从没吸过烟。

Ĉu vi ne trinkas brandon?

您不喝白兰地?

Ankaŭ ne.

也不喝。

Ĉu vi envias la fumantojn kaj drinkulojn?

您不羡慕吸烟喝酒的人?

Kompreneble ne.

当然不会。

Ĉu vi kuraĝigos viajn infanojn fumi kaj drinki?

您是否要鼓励您的孩子们吸烟喝酒?

Certe ne.

决不。

Ĉu fumado ne estas bona kutimo?

吸烟不是好习惯?

Absolute ne.

绝对不是。

Ĉu oni povas facile dekutimiĝi de fumado?

吸烟的习惯容易戒掉吗?

Verŝajne ne, sed tamen oni povas ĉesigi produkton de tabako por forigi fumadon.

似乎不容易, 不过停止生产烟草可以消除吸烟。

Mi dubas pri tio.

这我怀疑。

Ĉu neniu el viaj infanoj iam ekfumos?

您的孩子将来都不吸烟吗?

Mi ne scias; mi ne estas certa pri tio.

不知道吸不吸，我不敢说。

Kvankam mi fumis 30 jarojn, tamen mi ne plu fumos ekde hodiaŭ. Ĉu vi ne kredas?

我虽然吸了三十年的烟，可是从今天起我不吸烟了。您相信不相信？

Tre dubinde.

很怀疑。

Ĉu oni ne povas liberiĝi de la malbona kutimo per helpo de kuracilo?

使用药品不能摆脱这一恶习吗？

Mi ne scias, mi nenion aŭdis pri tio.

不知道，从未听说过这种事儿。

S-ro N asertis, ke li forskuis tiun kutimaĉon en unu monato dank' al apliko de medikamento.

N 先生说，他借助药品一个月就甩掉了吸烟的恶习。

Tion mi ne povas kredi.

我可不相信。

Vendisto de brando diris, ke ĝi utilas al la sano.

卖白兰地的人说白兰地有益于健康。

Mensogo!

他撒谎！

Sed ankaŭ iu kuracisto tion asertis.

有位医生也这样讲。

Ĉu vere?

真的吗？

Li diris, ke alkoholaĵo estas necesa en kuracado de certaj malsanoj.

他说，酒对治疗某些疾病是必不可少的。

Tio estas alia afero.

那是另一回事。

Ĉu vi ne volas tason da biero?

您不想喝一杯啤酒吗？

Ne, dankon.

不想，谢谢。

Posttagmeze ni havos tekunsidon. Ĉu vi povus ĝin ĉesti?

下午我们开茶话会，您能参加吗？

Bedaŭrinde ne. Mi havos alian aferon. Ĉu s-ro B faros prelegon en ĝi?

很遗憾不能参加。我还有别的事。B 先生要在会上做报告吗？

Mi timas ke ne, ĉar li ankoraŭ ne tute resaniĝis.

恐怕不会，因为他尚未完全康复。

Ĉu vi ekskursos al la Somera Palaco dimanĉe?

星期天你们去颐和园游玩吗？

Tio ankoraŭ ne estas decidita. Se multaj deziras, tion do ni faros. Ĉu vi deziras?

还没有决定。如果要去的人多，那就去。您要去吧？

Ho ne, jam multajn fojojn mi vizitis parkon.

啊，不去啦，这公园我已游过多次。

Ni fondos Esperantan bibliotekon. Ĉu vi bonvolus nin helpi?

我们要建立世界语图书馆。您肯帮忙吗？

Volonte mi vin helpos. Mi eĉ povus donaci al ĝi kelkajn librojn, se ili ne detruigus en incendio.

我愿意。要不是失火毁了我的书，我还可以捐些书籍给它呢。

Ĉu vi povus elekti por ni aĉetindajn librojn?

您能为我们选些要买的书籍吗？

Mi bedaŭras, ke tio estas ekster mia kapablo; mi ne multe legis.

我很抱歉，此事非我力所能及；书我读得不多。

备用词语

Ne ĝenu vin 不用麻烦。Mi ne konsentas. 我不同意。Neimageble 不可思议，nepre ne tion 决不要这个，nature ne 当然不，Tio ne taŭgas. 这不行。Tio ne eblas. 这不可能。Ni havas alian opinion. 我们另有主张。Ne tordu ŝnuron el sablo. 不要白费劲了。Nur kelkaj por sed multaj kontraŭ ĝi. 只有少数人赞成，而许多人反对。Pardonon, ke mi devas rifuzi. 对不起，我不得不拒绝。Neniu jesis. 没有人说是。Nenie pluvas. 哪儿也不下雨。Neniom gravas. 毫不重要。Ne bone. 不好。Malakcepti 拒绝，nei 否定，malkonsenti 不同意。Pardonon, mi ne bone aŭdis. 对不起，我没听清楚。Malaprobi 反对，absurde! 岂有此理！Netolereble! 受不了！Sensecaĵo! 胡说八道！Ne sonĝu! 别做梦！

11. ORDONI, PETI, VOLI 命令，请求，愿望

Donu al mi la manuskripton, kamarado Li, ke mi tajpu ĝin.

李同志，请您把稿子那给我去打字吧。

Bedaŭrinde, mi ankoraŭ ne finis la poluradon. La laŭta interbabilo ĝenas min.

真抱歉，我还没有改完稿呢。大声谈话吵得不好做事。

Ŝŝ! Mallaŭte, mi petas, por ke li finu la poluradon en du horoj.

嘘！求求你们，说话小声点，让他在两小时内把稿子改出来吧。

Jen la malneto! Bonvolu tajpi kaj pretigi neton.

这是草稿！请打字誊清。

K-dino, ĉu vi bonvolus kontroli kun mi la kopion?

同志，可以请您和我校对一下抄好的稿子吗？

Jes, volonte. Sed mi ne estas sperta en tio. Ĉu vi bonvolus min helpi en tio?

不过这方面我没有经验。您愿意帮助我吗？

Kompreneble. Kutime ni uzas mallongigojn de la interpunkciajn terminoj en kontrola laŭtlegado.

Ekzemple: pun. por punkto, kom. por komo, pun-kom. por punktokomo, ek. por ekkria signo, cit. por citilo, dupun. por dupunkto, dem. por demandsigno...

当然啦。校读时我们常用标点符号名称的略语：例如，用 pun. 代替 punkto，用 kom. 代替 komo，用 pun-kom. 代替 punktokomo，用 ek. 代替 ekkria signo，用 cit. 代替 citilo，用 dupun. 代替 dupunkto，用 dem. 代替 demandsigno.....

Nun mi scias. Diru, ĉu vi uzas mallongigojn ankaŭ por alineo, kursiva tipo, grasa tipo, romana tipo, galeprovaĵo, paĝprovaĵo, dukolona paĝo, trikolona paĝo, enpaĝiĝo, kadrato, fileo, linotipa kompostaĵo, monotipa kompostaĵo, permana kompostaĵo, komputora kompostaĵo, kompostareo ktp?

我明白了。另起一段、斜体、黑体、白体、长条校样、方版校样、两栏版面、三栏版面、拼版、空铅、花线、来诺铸版、摸诺铸版、手排、电脑排版、版心等是否也用缩写呢？

Ne, ĉar ili ne estas tiel ofte uzataj. Nu, ni komencu tuj!
 不用，因为它们不大常用。好，我们就开始吧！

Do vi laŭtleĝu la malneton kaj mi kontrolu la netan kopion, ĉu bone?
 那你就读草稿，我来校对誊清稿好不好？

Bone. Kaj mi petas, ke vi ne malstreĉu vian atenton dum la kontrolado.
 好的。请您在校对时不要走神。

Certe ne. Legu laŭte, klare kaj malrapide!
 一点不。请您读得大声些、清楚些、慢些。

Jen la manuskriptoj kontrolitaj. Ĉu vi estas tiel afabla transdoni ilin al la presejo?
 这是校好了的稿子。可以劳你的驾带给印刷厂吗？

Volonte mi faros tion por vi.
 愿为您效劳。

Rimarku, ke pluvaj nuboj kovris la ĉielon. Eble pluvos tuj.
 注意，天上布满了雨云。可能马上要下雨了。

Ho, dankon por via rimarkigo. Sed mi lasis mian ombrelon hejme. Ĉu vi kunportis ombrelon al la oficejo?
 啊，多谢您提醒。可是我把伞放在家里了。您带伞到办公室来了吗？

Jes. Jen ĝi. Prenu ĝin kun vi.
 带来了，这不是，请您带上吧。

Koran dankon! Mi baldaŭ revenos, atendu min!
 多谢！不一会我就回来了，等着吧！

Momenton! Mi iros preni la fotojn, kiujn oni devas klišigi por ilustraj artikolojn en la gazeto. Ankaŭ ilin portu al la presejo. Ne revenu al la oficejo, ĉar mi ne bezonos la ombrelon, mi tranoktos ĉi tie ĉe mia amiko. Ĝis la reveno!
 请等一下！我去把要制版的给杂志的文章作插图的照片取来。也请您把它们带到印刷厂。您不用回机关来了，我不用雨伞了，我要在这儿的朋友家里过夜。再见吧！

Ĝis la!
 再见！

备用词语

A. 常用词语

Bonvole ripetu! 请再说一遍! Rapidu! 赶快! Mi volus, ke vi venu tuj. 我要你马上来。Klarigu al mi la kaŭzon. 请给我说明理由。Vole iom laŭtigu vian voĉon! 请大声点! Pardonon al mia forgesemo. Freŝigu mian memoron pri via nomo. 请原谅我记性太差。请把大名再告诉我一遍。Bonvolu, mi petas! 请吧! Venu ĉi tien! 请到这儿来! Atendu min, se eble. 可能的话，请等着我。Paciencon, amikoj! 耐心点，朋友们! Daŭrigu! 继续! Ĉesu jam! 停下! Sufiĉe jam! 够啦! Venu ja! 来吧! Pri tio poste, ĉu bone? 以后再说，好吗? Se mi havus tempon! 我要有时间就好啦! Pruntu al mi viajn orelojn! 请听我说! Se mi povus tion! 我要能办到就好了。Aŭskultu min! 听我说! Pardonon, ripetu! 请再说一遍! Fermu vian buŝaĉon! 闭住你的臭嘴!

B. 牌告用语

Silenton! 肃静! Ne fumu! 不许吸烟! por virinoj 女用, por viroj 男用, por unudirekta trafiko 单行线, Ne piedpremu la gazonon! 请勿踏草地! Al fremdaj personoj estas malpermesita. 外人

不许入内。Puŝu! 推!Tiru! 拉!Por patrinoj kun infanoj 母子专用。Transiro severe malpermesita 绝对不许越过。Ne tuŝu! 勿动! Ne eniru sen permeso! 未经许可不得入内! Freŝe pentrita! 油漆未干! Atenton, fervojo! 当心铁路! Hospitalo! 医院! Elĉerpiĝis 售罄! Sakvojo! 死胡同! Enirejo 入口, Elirejo 出口, Facile bruligebla! 易燃! Ne renversu! 请勿倒置! Facile rompebla! 易碎! Venena! 有毒! Haltu! 站住!

12. DANKI, PARDONPETI 致谢, 道歉

Bonan matenon, k-do Lin!

林同志, 您早!

Bonan matenon! Mi jam atendis vin tre longe!

您早! 我已经等了您好久啦!

Pardonon, ke mi malfruas!

对不起, 我来迟了!

Ne gravas, ankoraŭ restas sufiĉa tempo por aranĝi la kunvenejon.

没什么, 还有足够的时间来布置会场呢。

Mi bedaŭras, ke mi ne povos fari la preparon kun vi, mia infano febras...

我很抱歉不能同您进行准备工作了, 我的孩子正发烧.....

Bedaŭrinde! Do vi devas tuj porti ĝin al hospitalo!

糟糕! 那您得马上带他到医院去看啦!

Jes. Mi petis k-dinon Ma, ke ŝi helpu vin. Koran dankon!

是啊, 我已经请马同志来帮您。由衷地感谢您!

Ne dankinde!

不用谢!

Ĉu vi sukcesis pruntepreni megafonon?

您借到扩音机了吗?

Jes. K-dino Ma ĝin alportos. Ankaŭ magnetfonon mi akiris.

借到了。马同志会拿来的。我还弄到录音机了呢。

Ĉu vere? Multajn dankojn! Do ni povas registri la programerojn per kasetoj. Bonvenon, k-dino Ma!

真的吗? 多谢您啦! 那我们可以把节目用磁带录下来了。马同志, 欢迎您!

Jen mi alportas la aparatojn per taksio.

瞧, 我用出租车把机器运来了。

Bone. Do ni portu ilin en la kunvenejon.

好的。咱们就把它们搬到会场去吧。

Pardonon, ke mi tretis vian piedon!

对不起, 我踩了您的脚啦!

Ne gravas! Metu la altan tablon ĉe la muron, ke mi pendigu la portreton de d-ro Zamenhof, starante sur ĝi.

没关系! 请您把那张高桌子放到墙边, 我好站上去把柴门霍夫博士像挂上。

Ŝajne ĝi ne estas sufiĉe alta. Mi metu tabureton sur ĝin.

看来似乎不够高, 我来加一张小凳子上去吧。

Tre bone! Dankon!

很好! 谢谢您!

Kial danki! Ĉu ni dismetu nun la fadeblajn seĝojn?

谢什么！现在我们来摆折叠椅子好吗？

Jes. En dek vicojn, po dek kvin. Koran dankon pro via helpo!

好。摆十排，每排十五张。衷心感谢您的帮助！

Kiel ĝentila vi estas! Tion fari ja estas ankaŭ mia devo.

您太客气啦！这也是我该做的呀！

Estas vera plezuro por mi kunlabori kun tia konscienca kamaradino kia vi.

同您这样自觉的同志一道工作真是愉快。

Dankon pro via komplimento!

谢谢您的美言！

Mi vere ŝuldas koran dankon al vi kaj k-do Gao. Mi sola ja ne povus pretigi la kunvenejon. Se vi ne min helpus...

我实在应该由衷地感谢您和高同志。我一个人可布置不了会场，要不是您帮助我.....

Dankon mi ne meritas. Ĉiu ja devas fari sian eblaĵon por sukcesigi la kunvenon. Mi bedaŭras, ke mankas al mi forto kaj talento por fari pli multan kontribuon. Mi volas pli bone lerni, sed mankas al mi legaĵo.

我可没有值得感谢的地方。每人都应该尽力使会开好。遗憾的是我一无力量二无才干作出更多贡献。我想更好地学习，可是缺少读物。

Nia grupo havas centojn da Esperantaj libroj. Kion vi volas legi?

我们小组有几百种世界语书籍。您想读什么？

Romanojn kaj dramojn. Ĉu mi povus pruntepreni literaturajn verkojn de vi?

小说啦，剧本啦。我可以向您借到文学著作吗？

Jes, certe.

当然可以。

Rekomendu al mi kelkajn do.

请给我介绍几种吧！

Sub la jugo de Vazov, Faraono de Prus, Hamleto de Ŝekspiro, Revizoro de Gogol...

瓦佐夫的《扼下》、普鲁斯的《法老王》、莎士比亚的《哈姆雷特》、果戈里的《钦差大臣》.....

Dankon! Sufiĉe jam! Unue mi legu la romanon de Vazov.

谢谢！够多了！首先我来读瓦佐夫的小说吧。

Bone. Mi ĝin portos al vi morgaŭ vespere.

好吧。明天傍晚我就带给您。

Mi ne scias kiel vin danki! Tiel afabla vi estas! Tiel helpema...

真不知道怎么来感谢您！您真好！这么肯帮助.....

Vi mem ja estas vere helpema! Vi estas la boneco mem!

您自己才真是乐于助人呢！您太好了！

Tion ne diru! Ĉu via grupo disponas ankaŭ kasaetojn de Esperantaj kantoj?

不要这么说！您那小组也有世界语歌曲的录音带吗？

Jes, dek kelkajn.

有，有十几个。

Ĉu mi povus fari kopiojn de ili?

我可以转录一下吗？

Ho, mi ne povas trovi taŭgajn vortojn por vin danki! Mi neniam spertis tian helpemon!

啊，真是找不出适当的话语来感谢您！我从未遇见过这样乐于助人的！

Ĝentilega vi estas!

您太客气啦!

Ho, ni devas rapidi! Restas apenaŭ duonhoru! Pardonon pro mia babilemo!

啊! 我们得赶快干啦! 只有几乎不到半小时了! 请原谅, 我话太多了!

Tion ne diru. Ja ankaŭ mi babilis iom tro multe.

不要这么说, 我的话也是太多了一点!

备用词语

Mil dankojn! 多谢! Mi ne povas sufiĉe vin danki! 我真是感激不尽! Tute ne dankinde! 不用谢!

Bonvolu transdoni miajn dankojn al ili! 请代我向他们致谢! Antaŭdankon! 谨先致谢! Sincerajn

dankojn! 真诚感谢! Kies gasto mi estas, ties feston mi festas. 在谁家做客, 就给谁庆贺. Servo

postulas reservon. 来而不往非礼也. Mi vin tre dankas! 我十分感谢您! danki per dentpiko 以

怨报德, esti maldankema 恩将仇报, akcepti ion kun danko 谢纳, dankaj vortoj 谢语 Li ne

esperu pardonon! 他别想得到原谅! Pardonu al mi mian eraron! 请原谅我的错误!

Kompreneman pardonon, ke mi ĝenis vin! 打搅了, 请您原谅! Ne gravas! 没关系!

13. MEZURI KAJ KALKULI 度量和计算

Kiom da kursanoj lernas ĉe via societo?

你们学会有多少会员学习?

Dedek tri viroj kaj dek sep virinoj, sume kvardek.

二十三名男的, 十七名女的, 共计四十名。

Kiom da kraĵonoj ili aĉetis?

他们买了多少铅笔?

Po tri. Trioble kvardek faras cent dudek. Do ili aĉetis dek dekduojn, t.e. preskaŭ grocon da kraĵonoj.

每人三枝。三乘四十是一百二十, 那就是买了十打, 几乎是一罗的铅笔。

Kiom da kraĵonoj estas foruzitaj?

有多少支铅笔用完了?

Du trionoj, t.e. okdek.

用了三分之二, 也就是八十支。

Kiom ankoraŭ restas?

还剩多少支?

Cent dudek minus okdek faras kvardek, ankoraŭ restas kvardek.

一百二十减八十余四十, 还剩四十支。

Kiom da kraĵonoj ĉiu kursano foruzis meznombro?

平均每个学员用掉了多少支铅笔?

Okdek dividite per kvardek faras du. Ili foruzis meznombro po du.

八十除以四十得二。他们平均每人用了二支。

Ĉu ili loĝas malproksime de la sidejo de la societo?

他们住得离协会会所远吗?

Ne. Maksimume je la distanco de 500 metroj.

不远。最远才五百米。

Kiom larĝas la nigra tabulo?

黑板有多宽？

Ĝi larĝas je du komo* tri metroj.

黑板宽二点三米。

Kian formaton havas tiu ĉi mapo?

这张地图开本有多大？

Ĝia formato estas cent dudek per cent okdek centimetroj.

它的开本是一百二十乘一百八十厘米。

Kiom da proponoj la kursanoj faris por plibonigi la instruadon?

学员们提了多少条改进教学的建议？

Malpli ol dudek.

不到二十条。

Ĉu vi scias la plankareon de la ĉambreto?

您知道这间小屋的面积吗？

Jes, naŭ kvadrataj metroj.

知道，九平方米。

Ŝajne pli vasta. Eble vi miskalkulis.

似乎多一点。您可能算错了。

Mi kalkulis rondcifere. Efektive pli vasta, de precize.

我算的大数。细算起来要多些。

Ĉu la larĝeco kaj longeco de la ĉambro estas en raporto de 3 al 3?

房间的长和宽之比是三比三吗？

Jes, ĝuste.

是的，正好三比三。

Tri rilatas al tri kiel unu al unu, ĉu ne?

三比三等于一比一，不是吗？

Jes, vere.

是的，不错。

Kiuj tie interbabilas duope aŭ trioje?

是哪些人在那里三三两两地聊天呢？

Ili estas laboristoj kiuj konstruis la akvorezervejon Pinghu kun kapacito de ducent milionoj da kubmetroj.

他们是建设库容两亿平方米的平湖水库的工人。

Kiel profunda estas la artefarita lago?

那个人工湖有多深？

Dek klaftojn.

有十寻深。

Ĉu hidroelektrejo konstruiĝis tie?

那儿建有水电站吗？

Jes, granda hidroelektrejo kun kapacito de okcent mil kilovatoj. Sennombraj kamparanoj ricevis elektran lumon de ĝi.

是的，有一座发电能力八十万千瓦的大水电站。无数农民从它得到了照明用电。

Ĉu ĝia elektro sufiĉas por elektrizi la distrikton?

它的电力足以使该区电气化吗?

Jes, kaj plej granda akvorezervujo estas konstruata ĉe la Tri Gorĝoj de Yangzi-rivero.

足够了，一个最大的水库正在长江三峡建设呢。

备用词语

A. 计算用语

nombro para 双数, nombro nepara 单数, la kvar bazaj operacioj 四则运算, la plej granda komuna divizoro 最大公约数, la plej malgranda kkomuna oblo 最小公倍数, la duuma nombrosistemo 二进制, potencigo: dudek kvar en la kvara potenco 乘方: 24 的 4 次方, la tria potenco de 3 estas 27 三的三次方是 27, altprocenta imposto 高税率, plenmano da militemuloj 一小撮好战分子, pinĉaĵo da sukero 一撮糖, naskokvanto 出生数, mortokvanto 死亡数, du plus tri faras kvin 二加三得五, la sumo estas kvin 和是五, kvin minus du faras tri 五减三得二, la diferenco estas tri 差为三

B. 长度

metro 米, dekametro 十米, kilometro 千米, centimetro 厘米, milimetro 毫米, jardo 码, mejlo 英里, lio 华里, veresto 俄里, colo 寸, futo 尺, arŝino 俄尺, klafto 浔

C. 面积

muo 亩, aro 公亩, akreo 英亩, hektaro 公顷, kvadrata kilometro 平方公里, kvadrata metro 平方米

Ĉ. 重量

miligramo 毫克, centigramo 厘克, gramo 克, kilogramo 公斤, funto 磅, unco 两, tuno 吨, taelo 两 (计算银两用), karato 克拉 (计算钻石的重量单位 = 205 毫克)

D. 容积

centilitro 毫升, litro 公升, dekalitro 十公升, kubmetro 立方米, galjono 加仑 (=4.546 公升), tonelo (船的容积) 吨

E. 货币

penco 辨士, ŝilingo 先令, pundo 英镑, dolaro 美圆, cendo 美分, marko 马克, centimo 生丁, pfenigo 芬尼, floreno 福林 (匈), guldeno 荷兰盾, rublo 卢布, kopeko 戈比, piastro 比阿斯特 (土、西), krono 克朗, jeno 日圆, groŝo 小钱,铜板, speso 世界语钱币单位, jŭano 元

F. 其他计算单位

dekduo 一打, groco 一罗, rismo 一令 (纸), grapolo 一串, plenbuŝo da 一口, peco 一个, plentaso da 一杯, botelo da 一瓶, du horoj da biciklado 骑车两小时, ŝtonjeta distanco 一石之遥, sagpafa distanco 一箭之地

14. VIZITO 访问

Kiu frapas je la pordo?

谁在敲门?

Mi, Lan Tian. Ĉu mi povus enveni?

我, 蓝天。可以进来吗?

Jes, bonvenon! Mi atendas vin.

当然, 欢迎您! 我等着您呢。

Bonan tagon!

您好! (日安!)

Bonan tagon! Sidiĝu!

您好! 请坐!

Mi timas, ke mi iom malfruiĝis pro la malfacila trafiko.

路上不好走, 我怕来迟了一点。

Ĉu vi venis per aŭtobuso aŭ trolebuso?

您是乘公共汽车还是乘无轨电车来的?

Trolebuso. Tiel plenplena, ke mi apenaŭ trovis spacon por stari kaj apenaŭ povis min elpuŝi el ĝi ĉe la haltejo.

乘无轨电车, 车上满满的几乎没有立足之地, 到了车站几乎挤不下车来。

Prenu tason da teo.

请喝杯茶。

Dankon! Sidiĝu, ke ni interbabilu pri via Esperanto-grupo.

谢谢! 请坐, 让我们来谈谈你们世界语小组的情况。

Jen cigaredo, fumu!

请吸支烟!

Dankon, mi ne plu fumas. Oni diras, ke via grupo vigle aktivadas. Ĉu vi ankaŭ korespondas kun eksterlandanoj?

谢谢。我戒烟了。听说你们小组很活跃。你们也和国外通信吗?

Jes, por praktiki la lernatan lingvon, interŝanĝi esperantaĵojn kaj kolekti teknologiajn materialojn ni formis kvarmembran kolektivon.

是的, 为了实地运用所学的语言, 交换世界语读物和搜集技术资料, 我们建立了一个四人小组。

Ĉu oni ankaŭ povas kolekti teknologiajn materialojn per Esperanto?

也能用世界语搜集技术资料吗?

Jes, teknologiajn materialojn en naciaj lingvoj. Ekzemple ni ricevis de niaj korespondaj amikoj verkojn pri komputoroj en la angla kaj german lingvoj.

能啊, 使用民族语言写的技术资料。例如我们收到了通信朋友寄的英语和德语的计算机著作。

Oni diris, ke pasintjare okazis en Budapeŝto konferenco de "INTER-KOMPUTO-82", en kiu oni uzis Esperanton kiel oficialan lingvon, ĉu vere?

据说去年在布达佩斯召开的国际计算机科学会议是用世界语作为大会正式语言的, 是吗?

Jes, oni eĉ eldonis ampleksajn prelegojn en Esperanto.

是的, 甚至还用世界语印发了大量学术报告呢。

Ĉu ili estas ankoraŭ haveblaj?

这些材料还弄得到吗?

Jes, pere de la libroservo de UEA.

弄得到，通过国际世协书刊服务部就能弄到。

Do veran utilon faras via aktivado.

那么说你们的活动还真有点用呢。

Krome, ni ankaŭ sukcesis akiri alilandajn esperantaĵojn helpe de la korespondantoj. Ni ricevas la popularan natursciencan gazeton “Homo kaj Kosmo” eldonatan de la Astronomia Observatorio de Zagreb kaj la literaturan gazeton “Fonto” eldonatan en Brazilo.

另外我们通过通信者的帮助还得到了外国的世界语读物。我们经常收到萨格勒布天文台出版的通俗科学杂志《人和宇宙》以及巴西出版的文学杂志《泉》。

Ĉu vi aboni ilin per korespondaj amikoj?

是通信朋友帮你们订的吗？

Jes. Por ilin rekompenci ni sendis al ili ĉinajn poŝtmarkojn kaj esperantaĵojn, kiuj utilas al ili.

是的。为了酬谢他们我们寄了对他们有用的中国邮票和世界语书籍。

Do bone vi faris. Ankaŭ nia grupo povus tion fari en la estonto, sed nun ni ankoraŭ ne estas sufiĉe spertaj por tion fari.

你们干得不错。将来我们小组也可以这样做，可现在还没有足够的经验干这种事。

Sperto devenas de praktikado. Kial ne provi tuj? Se vi tion faros kolektive sub helpo de spertulo, vi progresos rapide. Nia grupo regule kunsidas por kune studi Esperanton, diskuti en Esperanto aktualajn problemojn kaj aŭskulti Esperantajn paroladojn, dramojn kaj kantojn surbendigitajn.

经验来自实践嘛。为什么不马上试试呢？要是有经验的人来帮助你们集体进行此事，进步会很快的。我们小组经常集会来一起研究世界语，用世界语讨论时事和听世界语讲话、戏剧和歌曲的录音带。

Ĉu? De kie vi ricevis la sonbendojn?

你们从哪儿弄到的录音带？

De niaj korespondantoj. Kaj ni sendis al ili sonbendojn kaj gramofonajn diskojn pri ĉinaj muzikaĵoj. Al ili tre plaĉas muziko de bambua fluto, bivo kaj aliaj ĉinaj muzikiloj.

从通信朋友那里得来。我们给他们寄去了中国音乐的录音带和唱片。他们很喜欢笛子、琵琶等中国乐器的乐曲。

Ĉu vi povus pruntedoni al mi kelkajn el ili por kopii?

您可以把你们的世界语录音带借几盘给我们复制一下吗？

Jes, certe.

当然可以。

Jen oni frapas je la pordo!

听，有人敲门！

Kredeble tio estas k-do Ma. Nia grupo decidis fari ekskurson kaj li venas por interkonsiliĝi pri tiu aranĝo.

想必是马同志了。我们小组决定去远足，他是来商量这件事情的。

Mi jam longe vin ĝenis per la babilo. Se vi devas okupiĝi pri alia afero, do mi jam reiros hejmen.

Mi tre dankas vin por la agrabla kaj kuraĝiga interparolo.

我的谈话已经打扰您半天了。您有别的事，我就回家啦。感谢您这番愉快的鼓舞人的谈话。

Ankaŭ por mi tre agrabla estas nia interparolo.

我们的谈话我也觉得很愉快。

Ĝis la!

再见啦！

Ĝis!

再见!

备用词语

Kiu sonorigas? 谁在按铃? Kiu frapas sur la pordo? 谁在敲门? Jen estas mia nomkarto. 这是我的名片。Konatiĝu kun miaj familianoj. 我来介绍家人。Ne ĝenu vin. 不要麻烦。Estu kiel hejme. 不要客气。Pendigu vian jakon, se estas iom tro varme. 要是太热, 请把上衣挂起来。Prenu tiun fotelon. 请在那把沙发椅上坐。Kiel artisme vi aranĝis vian ĉambron! 房间布置得真雅致! Prenu kafon! 请喝咖啡! Ofte vizitu nin! 请常来! Vi ĉiam estas bonvena! 随时都欢迎! Venu, kiam estos oportune al vi. 方便的时候你就来好了。Dankon por via vizito! 谢谢你的来访! Bedaŭrinde, li forestas. 遗憾, 他出去了。Atendu momenton! 请等一会! Baldaŭ ŝi revenos. 她不久就回来。

15. BONVENIGO 欢迎

Bonan tagon, gekamaradoj! Kien vi iras kun verdstela flageto?

同志们日安! 你们拿着小绿星旗是到哪儿去?

Ni iras al la fervoja stacio por bonvenigi gaston. Ĉu vi povus iri kun ni?

我们到火车站去迎接客人。您可以和我们一同去吗?

Volonte. Tamen mi timas, ke mi ne povos bone kunagi. Tute mankas al mi sperto pri tia afero.

我愿意同去。可是我怕不能很好地配合行动。这种事我一点经验也没有。

Sperton vi tuj akiros. Ne necesas multaj formalajoj kaj ĝentilaĵoj inter la esperantistoj.

经验您马上就会有的。世界语者之间用不着许多客套。

Se temus pri akcepto de ŝtatestro aŭ altrangaj eminentuloj, oni devus aranĝi solenan ovacion, tondrigi salvojn, paradigi honoran gvardion, fari bonvenigan paroladon, prezenti bukedojn al la honorindaj gastoj ktp. Sed tio estas superbezona por ni.

若是接待国家元首或是高级人物, 那就要举行隆重的欢迎仪式, 鸣礼炮、检阅仪仗队、致欢迎词、给贵宾献花等等。我们可用不着这一套。

Sufiĉas por ni la flageto verdstela por faciligi la kontakton.

我们只要一面小绿星旗便于相认也就够了。

Ĉu decas saluti la gaston per demeto de la ĉapelo?

可以向客人脱帽致意吗?

Kompreneble. Oni povas saluti unu alian per klino de la kapo, profunda riverenco, manpremo, brakumo kaj kiso.

当然可以。可以点头致意, 可以深深鞠躬, 可以握手、拥抱、接吻。

Plaĉas al la esperantistoj senti sin kiel inter amikoj, inter gefratoj, senti sin kiel hejme.

世界语者喜欢像在朋友、兄弟之中一样, 像在家里一样。

Por tia bonvenigo do plej gravas sincera amikeco kaj interkomprenemo.

对于这样客人的欢迎最重要的那就是真诚的友情和彼此的谅解。

Ho jes. Tre gravas la interkomprenemo, ĉar tre diversaj estas la moroj kaj kutimoj de la popoloj en la tuta mondo. Iuj skuas la kapon por nei dum aliaj tion faras por jesi. Sen interkomprenemo neeblas facila amikiĝo.

是啊, 彼此谅解十分重要, 世界各国人民的风俗习惯多种多样。有的摇头表示不行, 有的摇

头表示同意。不互相体谅就不容易交朋友啦。

Je kioma horo alvenos la gasto?

客人几点钟到达?

Je duono post la dekdua.

十二点半。

Ĉu vi scias la numeron de la vagono?

您知道他的车厢号吗?

Jes, la 6-a.

知道, 是六号车厢。

Ĉu vi foje vidis lian foton?

您见过他的照片吗?

Jes, jen lia foto alsendita antaŭ semajno.

见过, 瞧这是他一星期前寄来的照片。

Do, ni facile lin rekonos.

那我们就不难认出他来了。

Rigardu! Ĉu tie ne estas s-ro P?

瞧! 那不是 P 先生吗?

Jes! Li mansvingas al ni!

正是! 他在向我们招手呢。

Bonvenon!

欢迎!

Kiel mi ĝojas vin palpi per la rigardo kaj la manoj!

能亲眼看到您, 抚摸您, 我是多高兴啊!

Donu al mi la valizon.

把手提箱给我吧。

Lasu min porti por vi la kofron.

让我来给您搬箱子。

Korajn dankojn!

衷心感谢!

Estas granda honoro por nia klubo vin akcepti!

承蒙光临真是我们俱乐部的莫大荣幸!

Kia plezuro estas viziti ĉi tiun faman historian urbon!

能访问这一历史名城真是太高兴了!

Mi intencis veni pli frue, sed la amikoj min detenis en urbo X, tial...

我本想早些来的, 可是 X 市的朋友们不放我走, 所以.....

Certe la longa veturado jam lacigis vin. Do ni iru al la hotelo por ripozi.

长途跋涉您一定累了。我们还是到旅馆里休息去吧。

Taksio jam atendas ĉe la elirejo.

出租车在门口等着呢。

Ĉu vi ankoraŭ ne ricevis la pakajon? Donu al mi la pakaj-bileton, ke mi ilin elprenu kaj portu al vi poste.

您还没有拿到行李吗? 请把行李票给我, 让我去提取, 然后再拿给您。

Kiel vi sentas vin? Ĉu plaĉas al vi la klimato ĉi tie?

您觉得怎么样? 这儿的气候您喜欢吗?

Estas tre agrable. Nur iomete pli seke ol en mia hejmloko.

很好。比我们家乡略微干燥一点。

Mi havas peton al vi. Mia koresponda amiko A loĝas en la suda distrikto de ĉi urbo. Jen lia adreso.

Ĉu vi povus aranĝi intervidiĝon inter ni?

我有一事相求。我的通信朋友 A 住本市南区。您能安排我们会见吗？

Bedaŭrinde ne, ĉar li forveturis hieraŭ pro urĝa afero.

可惜办不到，因为他昨天有急事出门去了。

Ne gravas. Mi kore vin dankas por via amika akcepto kaj la donitaj helpoj!

没关系。衷心感谢你们的接待和帮助！

备用词语

akcepti afable, varme, froste, senceremonie 和气、热情、冷冰冰地、不拘礼节地接待。revui honoran gvardion 检阅仪仗队。observi la leĝojn de ĝentileco 遵行礼仪。peti aŭdiencon 请求谒见。trudulo 不速之客。En la luksa salonno mi ne estas en mia elemento. 在豪华的客厅里我觉得不自在。hazarda renkontiĝo 邂逅。neatendita alveno 不期而至。okupi la honoran lokon ĉe la tablo 坐上席。aranĝi bonvenigan tekunsidon 举行欢迎茶会。solena (simpla) akceptado 隆重（简单）接待。Vi faris al mi multe da honoro 不胜荣幸。gastiganto 东道主。doni bonvenigan bankedon 举行欢迎宴会。ludi la nacian himnon kaj hisi la nacian standardon 奏国歌升国旗。flagitaj stratoj 悬挂彩旗的街道。flughaveno kun flirtantaj flagoj 彩旗飘扬的机场。longa restado 长期停留。baldaŭa forlaso 不久离去。adiaŭa bankedo 告别宴会。akompani iun al la hotelo 陪同到宾馆

16. HOTELO 旅馆

A: Ha lo! Ĉu la Orienta Hotelo?

甲：喂，是东方宾馆吗？

B: Jes. Kion vi volas?

乙：是的。您有什么事？

A: Mi volas mendi ĉambron por mia amiko.

甲：我要给朋友订一个房间。

B: Kian ĉambron vi bezonas?

乙：您要怎样的房间？

A: Ĉambron por du personoj.

甲：要一个双人的房间。

B: Jes, tian ni havas.

乙：有，有这样的房间。

A: En kiu etaĝo?

甲：在几层？

B: En la deka etaĝo.

乙：在十层。

A: Ĉu ne estas tia en dua etaĝo?

甲：二层没有这样的房间吗？

B: Jam ne. Tiu en la deka etaĝo rigardas al la sudo kaj oni povas ĝui de tie belan vidon de la urbo.

乙：没有了。十层的那个房间朝南，可以观赏美丽的市容。

A: Do bone. Kiom ĝi kostas por unu tago?

甲：那好。一天要多少钱？

B: Dudek usonajn dolarojn.

乙：二十美元。

A: Ĉu inkluzive de pago por matenmanĝo?

甲：包括早餐费吗？

B: Ne. Manĝojn ĉe la hotelo oni devas pagi aparte.

乙：不包括。在宾馆进餐需要另外付费。

A: Ĉu la ĉambro estas kun banujo?

甲：房间有洗澡盆吗？

B: Jes. Oni povas sin bani aŭ duŝi en ĝi.

乙：有。房间里可以洗澡、淋浴。

A: Ĉu ĝi estas klimatizata?

甲：有空调吗？

B: Jes. Ĝi estas ekipita per bonega klimatizilo krom kolora televidilo kaj malgranda fridujo. Kiam vi bezonos ĝin?

乙：有。除了彩电和小冰箱还装有很好的空调机。您什么时候用房间？

A: Post tri tagoj.

甲：三天以后。

B: Bonvolu veni al nia kontoro por plenumi registron por la rezervado.

乙：请您到账房来一下预定登记手续吧。

A: Kiamaniere mi povas atingi vian hotelon?

甲：到你们宾馆怎么走法？

B: Kie vi estas?

乙：您在什么地方？

A: Ĉe Ponto-Strato.

甲：在桥街。

B: Prenu aŭtobuson de la 35-a linio, descendu ĉe la haltejo Natura Muzeo, kaj prenu trolebuson de la 6-a linio, descendu ĉe la Roza Parko. Tiam vi vidos la blankan domegon de nia hotelo.

乙：乘 35 汽车，在自然博物馆下车，然后换乘 6 路无轨电车，在玫瑰公园下车，这时您就看见我们宾馆的白色大厦了。

A: Dankon. Kiom da tempo mi bezonos por la vojo?

甲：谢谢。路上要多少时间？

B: Ĉirkaŭ dudek minutojn.

乙：大约二十分钟。

A: Do mi venos al vi baldaŭ.

甲：那我一会儿就到你们这儿来了。

B: Ĉiam vi estas bonvena.

乙：随时欢迎您来。

C: Kie vi loĝas, sinjoro?

丙：先生，您住在哪儿？

Ĉ: En la Orienta Hotelo. Kaj vi?

丁: 住在东方宾馆。您呢?

C: En gastejo apud la lago Luno. Mi okupas ĉambron por unu persono, ne grandan tamen kvietan.

丙: 我住在月湖旁边的一家旅馆里。我住的单人房间, 不大, 却很安静。

Ĉ: Ho, vi estas feliĉulo! Mi loĝas alte en la deka etaĝo kaj devas uzadi kapturman lifton!

丁: 啊, 您真幸运! 我住十层, 不能不乘令人头晕的电梯。

C: Nia domo estas trietaĝa kaj havas belan vidon de la lago.

丙: 我们的房子是三层楼, 有月湖的美丽风光。

Ĉ: En mia ĉambro, mi povas ĝui panoramon de la urbo.

丁: 在我那房间里可以观赏市容全景。

C: Do avantaĝon ĝi havas.

丙: 那它也有它的优越性了。

Ĉ: Ĉu ĉe via gastejo funkcias barbira, poŝta kaj turisma servoj?

丁: 您那旅店里有理发、邮政和旅游服务设施吗?

C: Ne. Tamen barbirejo, poŝtoŝtanco kaj turisma servo troviĝas en la ĉirkaŭaĵo kaj apenaŭ 5 minutojn oni bezonas atingi ilin.

丙: 没有。不过附近有理发店、邮局和旅行社, 不过 5 分钟就到了。

Ĉ: Ĉu la ĉambro estas klimatizata?

丁: 房间有空调吗?

C: Ne. Tamen bone funkcias la sistemo de centrala hejtado.

丙: 没有。不过它的供暖系统工作得很好。

Ĉ: Kiom vi pagas por la ĉambro?

丁: 这房间您花多少钱?

C: Dek dolarojn por tago.

丙: 每天十美元。

Ĉ: Dek?! Mirinde malmulte! Ankaŭ mi translokiĝos al ĝi.

丁: 十美元?! 真便宜! 我也要搬到那儿去住。

C: Mi kredas, ke vin certe mirigos ĝin mahagona meblaro kun antikva beleco.

丙: 我相信, 它那些古香古色的桃花心木家具定会使你惊奇的。

Ĉ: Ĉu vere?!

丁: 真的吗?

备用词语

vestiblo 过厅, koridoro 走廊, salono 厅, halo 大厅, bufedo 小卖部, necesejo 厕所, tualetejo 洗手间, banĉambro 浴室, duŝejo 淋浴室, mato 席子, kuseno 垫子, kapkuseno 枕头, moskit-vualo 蚊帐, littuko 床单, litkovrilo 被子, matraco 褥子、软垫, sofo 沙发, fotelo 沙发椅, kanapo 长沙发、睡椅, brakseĝo 扶手椅, krano 水龙头, duŝilo 淋浴器, kurteno 帘子, radiatoro 暖气包, tapiŝo 地毯, tapeto 壁毯, vesthoko, vestpendigilo 衣架, litaĵo 卧具, niĉo 壁龛, balustrado 栏杆, apartamento 套间, subtegmento 顶楼, kelo 地窖, subtera etaĝo 地下室, teretaĝo 一楼, dua etaĝo, beletaĝo 二楼, lulseĝo 安乐椅, ŝutro 百叶窗, ŝranko 五屉柜, breto 搁板, termometro 温度计, ŝaltilo 开关, bankuvo 浴缸, balkono 阳台, belvedero 眺望台, Kiom mi ŝuldas? 我欠多少钱? Donu la kalkulon! 算账! kvitancita kalkulo 算清的账单, por viroj 男用, por virinoj 女用, bambukurteno 竹帘, kontoro 账房, trinkmono 小费,

libera ĉambro 空房间, manĝĉambro 食堂, unuklapa pordo 单扇门, seruro 锁, ŝlosilo 钥匙, sonorigi 按铃, frapi je pordo 敲门, ciri ŝuojn 擦皮鞋, lampŝirmilo 灯罩, ekrano 屏风

17. DEMANDO PRI VOJO 问路

Pardonon, sinjoro, kiel mi povas atingi la hotelon Amikeco?

先生劳驾，我怎样可以到达友谊宾馆呢？

Ĉu vi ne vidas la trolebusan haltejon trans la placo?

您没瞧见广场那边的无轨电车站吗？

Jes, mi vidas.

是，我瞧见了。

Prenu tie trolebuson de la cent-tria linio kaj vi atingos la Pekinan Zoon.

请乘 103 路无轨电车，你就可以到北京动物园。

Mi ne celas la Zoon.

我不是去动物园。

Sed tie vi povas preni aŭtobuson de la 332-a linio, kiu povas porti vin al la hotelo.

可是在那儿您可以乘坐 332 路汽车到友谊宾馆。

Dankon! Ĉu la trolebuso preterpasas restoracion?

谢谢！无轨电车经过饭店吗？

Jes, vi trovos restoraciojn en la ĉarkaŭaĵo de la Pekina Magazeno.

经过，您在北京百货大楼附近可以找到饭店。

Sed kiel mi povas trovi la magazenen?

可是我怎么才能找到百货大楼呢？

Ĝi estas sesetaĝa domo kaj proksime de ĝi estas trolebusa haltejo.

它是一幢六层大楼，离它不远有无轨电车站。

Permesu, sinjoro, ĉu vi bonvolus montri al mi la vojon al la plej proksima restoracio?

借光，先生，您可以告诉我去最近的饭店的路吗？

Iru norden, turnu dekstren je la unua vojkruĉiĝo kaj vi trovos la plej proksiman restoracion.

请往北走，在第一个十字路口向右转，您就可以找到那家最近的饭店了。

Oni diras, ke la Ĉina Belarta Ekspoziciejo troviĝas ne tre fore. Ĉu mi povas veturi al ĝi per trolebuso?

据说中国美术馆不很远。我能搭无轨电车到那儿去吗？

Jes. Tamen vi tute ne bezonas veturi, ĉar ĝi estas tre proksime. Iru norden kaj vi atingos ĝin post kvin minutoj.

可以。不过您根本不必乘车，因为路很近。往北走五分钟就到了。

Kie troviĝas la Impeiestra Palaco?

皇宫在哪儿？

Ĝi situas sude de Jingŝan-Parko.

它在景山公园南面。

Kaj kie estas tiu parko?

景山公园又在哪儿？

Ĝi troviĝas okcidente. Prenu trolebuson de la 103-a linio kaj descendu je la dua haltejo, nome tiu de Jingŝan-Parko.

它在西面。请乘 103 路无轨电车，在第二站，也就是景山公园站下车。

Ĉu estas aliaj parkoj en proksimeco?

近处还有别的公园吗?

Jes, Beihai-Parko troviĝas en la okcidento. Ĉu vi ne vidas la blankan pagodon? Ĝi estas sur monteto en la parko.

有, 北海公园在西边。您没有看见那座白塔吗? 它就在公园里的小山上。

Ĉu la Ĉina Konservatorio estas atingebla per trolebuso?

乘无轨电车能到中国音乐学院吗?

Ne, ĝi estas en strateto for de trolebusa linio.

不能, 它远离无轨电车线路。

Ĉu vi povus montri al mi la plej mallongan vojon al ĝi?

你能把最近的路指给我吗?

Donu al mi la mapon. Jen ĉi tie vi troviĝas. Prenu trolebuson ĉe tiu haltejo. Kiam vi atingos la postan pordon de Beihai-Parko, vi elaŭtobusiĝu kaj tie demandu pri la vojo al la lernejo.

请把地图给我。您是在这个地方。请在这个汽车站乘车。到达北海公园后门您就下车再打听去该校的路线。

Ĉu mi povas bicikli al ĝi?

我可以骑自行车去吗?

Kompreneble, biciklo estas pli oportuna veturilo.

当然可以, 自行车更方便。

Ĉu mi estas sur la ĝusta vojo al la Ĉefurba Kinejo?

我去首都电影院, 走这条路对吗?

Jes, bicklu ĉiam antaŭen kaj vi vidos la kinejon ĉe la dekstra flanko.

对的, 一直往前骑, 您在右边会看到那座电影院。

Ĉu mi estas en la ĝusta direkto al la Somera Palaco?

我去颐和园这方向走得对吗?

Vi iras en la kontraŭa direkto! Do vi devas turniĝi kaj retroiri.

方向走反了! 您得转身往回走。

Mi perdis la orientiĝon.

我迷失了方向。

Vi venas tro suden!

您走得太靠南了。

Ĉu vi bonvolus montri al mi tiun ĉi lokon sur la mapo?

您可以把此处地图上的位置指给我吗?

Jes, kun plezuro. Jen tie ĉi.

当然愿意为您效劳。就是这儿。

Kie troviĝas numero 53? Ĉu ĉe la okcidenta fino de la strato?

五十三号在哪儿? 是在胡同西头吗?

Mi ne scias; ankaŭ mi estas fremda en la loko. Bonvolu turni vin al aliaj.

我不知道, 这地方我也陌生, 请打听别人吧。

备用词语

sakvojo, sakstrateto 死胡同, unudirekta vojo 单行线, trotuaro 人行道, zebra transirejo 人行横道, stratfino 街尾, vojturniĝo 转弯处, pavimo 铺砌的路面, kota vojo 泥泞的道路, asfalta

vojo 柏油路, bulvarado 林荫大道, aleo 林间小道, avenuo 通往园林区的林荫道, teatro 剧院, urbodomo 市政府, policejo 公安局, telefonejo 电话局, stadiono 体育场, flughaveno 机场, kajo 月台, taksio 出租车, tramo 电车, trolebuso 无轨电车, trefkruciĝo 立交桥, zigzaga vojo 曲折道路, kruta vojo 陡坡路, ŝoseo 大路, aŭtovojo 公路, ekspresa vojo, 高速公路, gruzo vojo 碎石路, pado 田间小路, vojmontrilo 路标, polva vojo 层土飞扬的路, monumento 纪念碑, placo 广场, operejo 歌剧院, muzeo 博物馆, banejo 浴室, necesejo 厕所, fervoja stacio 火车站, haveno 港口, tunelo 隧道, telfero 缆车, subtera tramo (metro) 地铁

18. RESTORACIO 饭店

Ĉu vi bonvolus tagmanĝi kun mi ĉe la restoracio Paco?

请您同我去和平饭店吃饭好吗?

Jes, kun plezuro. Dankon pro la invito.

好的,很高兴。谢谢您的邀请。

Ho, kiel homplena! Bedaŭrinde, mi ne rezervigis tablon.

嗨,好多人啊!可惜我没有预定坐席。

Kelnero, ĉu vi povus trovi por ni liberan tablon?

服务员,能给我们找张空桌子吗?

Bonvolu sekvi min. En la aparta ĉambro estas liberaj sidlokoj.

请跟我来。单间里有空席位。

Altabliĝu!

请就坐!

La promenado faras al mi bonan apetiton.

散步开了我胃的胃口。

Laboro estas bona aperitivo, sed trolaciĝo povas perdi apetiton.

劳动是很好的开胃剂,可是过分劳累会使人不想吃东西。

Jen la menuo. Kion vi deziras? Elektu..

这是菜单。您想吃点什么?请您点菜吧。

Ĉu vi havas menuon en Esperanto?

有世界语的菜单吗?

Jes, jen ĝi.

有,这不是。

Mi volas porcion da rizo kun kareo.

我要一份咖喱饭。

Portu al ni porcion da stufita bovaĵo, porcion da rostita kokaĵo kaj porcion da fritita porkaĵo.

请给我们一份炖牛肉,一份烤鸡,一份炸猪排。

Ĉu vi ne ŝatas fiŝon?

您不喜欢吃鱼吗?

Jes, mi tre ŝatas marajn manĝaĵojn.

喜欢,我很喜欢海味。

Mi preferas ŝinkon.

我更喜欢火腿。

Rostita pekina anaso estas tre bongusta.

北京烤鸭味道很美。

Sufiĉe multe da pladoj oni povas prepari el anasaĵo.

鸭子可以做相当多道菜。

Kiujn aliajn naciajn manĝaĵojn vi rekomendus al ni?

您还有什么其它民族风味的菜推荐给我们吗？

Jes, jes. Sed mi timas, ke estus tro multe por du personoj.

有的，有的，不过我怕给两位客人用是太多了。

La tablo estas sufiĉe riĉe primetita.

菜够丰富的了。

Bonan apetiton!

祝您胃口好！

Helpu vin mem!

请自己来吧！

Kiamaniere uzi manĝbastonetojn?

怎样使用筷子？

Imitu min! Jes, tiel.

请跟我学！瞧，这样。

La ĉinaj manĝaĵoj donas al mi bonan apetiton.

中国饭菜我很爱吃。

Precipe tio ĉi estas laŭ mia gusto.

这道菜特别合味道口味。

Kiel la ŝinko plaĉas al vi?

火腿您觉得怎样？

Ĝi estas mirinde bongusta.

味道真是美极了。

Ĉu vi ŝatas la stufitan bovaĵon?

炖牛肉您喜欢吗？

Ĝi estas ne sufiĉe stufita kaj iom tro sala.

炖得不够火候，有点太咸了。

Transdonu al mi la piprujon.

请把胡椒瓶递给我。

Atentu, via maniko trempiĝas en la saŭĉon!

当心，您的袖子浸到卤汁里了！

Nia edzino estas tro grasa. Ŝi devas sin ŝveligi per dieto.

我爱人太胖了。她得吃减肥饮食。

Kiom da fojoj vi manĝas ĉiutage?

你们一天吃几餐？

Trifoje. Ni tagmanĝas ĉe kafeterio je fiksa prezo.

三餐。午饭我们在自助餐厅包伙。

Ĉu vi volas vinon aŭ brandon?

您要葡萄酒还是白兰地？

Mi volas nur bieron.

我只要啤酒。

Alportu al mi almanĝaĵon kaj vinon.

请把酒和菜拿来。

Ĉu tagmeze oni preparas kradrostitan viandon ĉi tie?

这里中文也做烧烤吗?

Jes. Ni trinku por nia amikeco!

做。让我们为我们的友谊而干杯!

Je via sano!

为您的健康干杯!

La ĉefkuiristo havas fajnan guston!

大厨师调的味真美!

La bonodoro de la rostaĵo tiklas la nazon.

烤肉的香味扑鼻。

Kian supon vi volas? Ĉu legoman, viandan aŭ avenan?

您要什么汤? 菜汤、肉汤还是燕麦羹?

Kian deserton vi preferas?

您更喜欢什么甜食?

pomojn, kukojn kaj glaciaĵon.

要苹果、糕点和冰激凌。

Ĉu vi volas teon aŭ kafon?

您喝茶还是喝咖啡?

Kafon, mi petas, tamen sen lakto.

请给我咖啡, 可是不要加牛奶。

Ĉu vi volus alian tason da teo?

您要再来一杯茶吗?

Mi jam havis sufiĉe multe.

我喝得够多了。

Bonvolu prepari la konton. Kiom kostas la manĝo?

请结账。餐费多少?

Tridek ses juanojn.

三十六元。

Mi ne permesos al vi pagi. Ĉifoje vi estas gasto.

我可不让您付钱。这回您是客人。

Dankon pro via regalo.

谢谢你的款待。

Ne dankinde. Via kunesto estas tre agrabla.

不谢。和您在一起很愉快。

Fumu cigaredon?

抽支烟?

Dankon! Mi ne fumas. Jen cindrujo.

谢谢! 我不吸烟。这是烟灰缸。

Jen trinkmonon por vi.

这是给您的小费。

Dankon! Trinkmonon ni ne akceptas.

谢谢! 我们不收小费。

备用词语

A. 一般用语

ĉinaj manĝaĵoj 中餐, ĉinaj pladoj 中国菜, eŭropaj manĝaĵoj 西餐, vegetarana manĝo 素食, mendi pladojn 叫菜, ĉefmanĝaĵo 主食, almanĝaĵo 副食, tosti 祝酒, dolĉaĵo 甜食, deserto 餐后甜点, lunĉo 小吃, frandaĵo 美味, festeno 宴席, bankedo 聚餐, regali 招待, peti kalkulon 算账, 买单

B. 烹调

boligi 煮, vaporumi 蒸, friti 炸, fumaĵi 熏, baki 烤, stufi 炖, frikasi 红烧, marini 用作料喂肉以便烹制, konfiti 糖渍, pekli 盐腌, duonkuirita 半熟的, grasega, oleoza 肥的, 油大的, dolĉa 甜的, raguo 烧的菜, sengusta 无滋味的, fridi 冷冻, rosti 烧烤, brezi 用文火焖, infuzi teon 沏茶, brogi brasikon 烫白菜, farĉi 夹馅, kirli ovoblankon 搅拌蛋清, poĉi ovojn 煮荷包蛋

C. 肉类

porka kotleto 炸猪肉片, porka kolbaso 猪香肠, ŝinko 火腿, lardo 腊肉, bifstekoj 牛排, rostita bovfileo 烤牛里脊, bovlango kun verda fazeolo 青豆牛舌, farĉita porkido 加馅乳猪, rostita ansero 烤鹅, stufita ŝafaĵo 炖羊肉, karebovaĵo 咖喱牛肉, gulaŝo 土豆烧牛肉, kokidaĵo 仔鸡, koturno rostita en cindro 活灰烧鹌鹑, lardita meleagro 腊火鸡, rostita fazano kun legomo 烤山鸡带青菜, fritita hepato 炒肝

Ĉ. 鱼类

karmo kun bruna saŭco 红烧鲤鱼, trikiuro 带鱼, salmo 鲑鱼, karmo 鲤鱼, karaso 鲫鱼, ezoko 梭鱼, truto 鳟鱼, sardino 沙丁鱼, polpo kun tomato 西红柿章鱼, vaporumita kankro 蒸螃蟹, mandarena fiŝo 桂鱼, ŝarko 鲨鱼, ŝarknaĝilo 鱼翅, tinko 草鱼, lojto 江鳊, perko 鲈鱼, petromizo 八目鳗, pleŭronekto 比目鱼, ploto 石斑鱼, soleo 鲈鱼, haringo 鲱鱼, sproto 刺腹鲱, sardelo 油渍沙丁鱼, gado 鳕鱼, krabo 螃蟹, palinuro 龙虾, salikoko 虾, holoturio 海参, sepio 乌贼, meduzo 水母, halioto 鲍鱼, ostro 蚝

D. 蛋类

bakita ovaĵotorto (生日) 大蛋糕, fritita ovo 煎鸡蛋, omleto 软煎蛋块, kalkokonservita ovo 皮蛋, salita ovo 盐蛋, poĉita ovo 荷包蛋, ŝinko kun ovo 火腿鸡蛋

E. 蔬菜

brasiko 卷心菜, ĉina brasiko 大白菜, spinaco 菠菜, terpomo 马铃薯, tomato 西红柿, melongeneno 茄子, vaksa kukurbo 冬瓜, kukumo 黄瓜, kukurbo 南瓜, batato 红薯, florbrasiko 花菜, kolokasio 芋, bulbo 洋葱, kolzo 油菜, laktuko 莴苣, ŝenoprazo 香葱, orefungo 木耳, taglilio 黄花, lento 扁豆, pizo 豌豆, fazeolo 小豆, celerio 芹菜, kapsiko 辣椒, karoto 胡萝卜, rafano 萝卜, napo, rapo 芜菁, bambuĝermo 竹笋, fabo 蚕豆, fungo 蘑菇, kantarelo 鸡油菌, fenkolo 茴香

F. 调料

salo 盐, pipro 胡椒, kapsiko 辣椒, mustardo 芥末, zingibro 姜, vinagro 醋, sojo 酱油, marmelado 果酱, graso, sebo 油脂, oleo 油, mielo 蜂蜜, sukero 糖, kremo 奶油, butero 黄油, kando 冰糖, bruna sukero 红糖, fromaĝo 奶酪, kaviaro 鱼子酱, karamelo 焦糖, siropo 糖浆, cinamo 桂皮, muskato 肉豆蔻, ilicio 八角, akragusta 辣的

G. 水果

pomo 苹果, piro 梨, persiko 桃, abrikoto 杏, pruno 李子, oranĝo 甜橙, mandarino 橘子, pampelmuso 柚子, banano 香蕉, ananaso 菠萝蜜, olivo 橄榄, ĉerizo 樱桃, vinbero 葡萄,

frago 草莓, liĉio 荔枝, jujubo 枣, persimono 柿, longano 龙眼, melono 瓜, akvomelono 西瓜, kaŝtano 栗子, figo 无花果, mango 芒果, ribo 红醋栗, nukso 坚果, juglando 核桃, prunelo 西洋李子, avelo 榛子, granato 石榴, arakido 花生, daktilo 椰枣, moruso 桑葚, cidonio 木瓜, citrono 柠檬, rubuso 黑莓, ruĝa ribo 红醋栗

Ĝ. 饮料

vino 酒、葡萄酒, brando 白兰地, biero 啤酒, ĉampano 香槟, viskio 威士忌, kirŝo 樱桃酒, likvoro 利久酒, nektaro 美酒, rumo 甜酒, vermuto 苦艾酒, kumiso 奶酒, vodko 俄国伏特加酒, sakeo 日本米酒, konjako 法国白兰地, ĝino 松子酒, portero 英国黑啤酒, cidro 苹果酒, sodakvo 汽水, limonado 柠檬水, fruktosuko 果汁, glaciaĵo 冰激凌, teo 茶, nigra teo 红茶, verda teo 绿茶, kafo 咖啡, ĉokolado 巧克力, kakao 可可

H. 米面食品

vermiĉelo 面条, pano 面包, patkuko 大饼, mantoŭo (vaporumita pano) 馒头, bulko 小面包, biskvito 饼干, kringo 小饼干, marcipano 杏仁酥, meringelo 蛋青饼, sufleo 蛋糕, krakeno 小脆饼, makarono 杏仁饼, makaronio 通心粉, pasteĉo 肉馅点心, flano 芙兰糕, torto 大蛋糕, sandviĉo 三明治, rizaĵo 米饭, kaĉo 粥, nudelsupo 疙瘩汤, kuko 糕饼, sojfabo lakto 豆浆, toŭfu (sojfabo kazeo) 豆腐, fritita pastaĵo 油饼, ĝjaŭzio 饺子, huntuno 馄饨

Ĥ. 餐具

telero 盘子, pleto 托盘, bovlo 碗, taso 杯, pokalo 酒杯, kruĉo 壶, plado 大盘, kulero 调羹, tablokulero 汤勺, forko 叉子, tranĉilo 刀子, tablotuko 桌布, buŝtuko 餐巾, fingrobovlo 洗手碗, korktirilo 瓶起子, samovaro 茶炊, dentpurigilo 牙签

19. VOJAĜO 旅行

A: Kion vi ankoraŭ faras tie? Jam enlitiĝu, ĉar morgaŭ ni devvos veturi al la (fervoja) stacio je la sesa.

甲: 您还在那儿干什么呢? 睡吧, 明天我们六点钟就得去车站呢。

B: Mi devas enpaki la objektojn.

乙: 我得包扎一下东西。

A: Mi helpu vin.

甲: 让我来帮您。

B: Bonvolu fermi la kofron kaj ligu ĝin per ŝnuro.

乙: 请把箱子关上, 用绳子捆起来。

A: Kio estas en la mansako? Ĉu mi metu ĝin en la kofron?

甲: 提包里装的是什么? 要我把它装到箱子里吗?

B: Ne, en ĝi estas rompiĝemaj objektoj; mi devas ĝin porti kun mi survoje.

乙: 不要, 里面装着易碎物品, 我得带在身边。

A: Kiom peza pakaĵo ni rajtas kunporti senpage?

甲: 我们可以免费携带多少行李?

B: Mi ne bone informiĝis pri tio. Verŝajne ĉirkaŭ dudek kilometrojn.

乙: 我不大清楚。似乎是二十公斤左右。

A: Mi timas, ke viaj pakaĵoj superas la limigitan pezon.

甲: 恐怕您的行李超重了。

B: Ne gravas. Mi ekspedos ĉion escepte de la mansako.

乙：没关系。除了手提包以外我都托运。

A: Rapidu, alie ni malfruiĝus kaj ne povus kapti la trajnon.

甲：赶快吧，不然我们就晚了，赶不上火车了。

B: La taksio perdis al ni dek minutojn! Sed ankoraŭ restas sufiĉa tempo.

乙：出租汽车耽误了我们十分钟！不过时间还够。

A: Portisto, bonvole portu la pakaĵojn en la pakaĵejon.

甲：搬运工，请把行李搬到行李房去。

B: Mi iru aĉeti biletojn.

乙：我去买票吧。

A: Ĉu vi scias kie estas la giĉeto por N?

甲：您知道 N 的售票窗口在哪儿吗？

B: Jes, ĝi estas dekstre en la biletvendejo.

乙：知道，它在售票处的右侧。

A: Oni diras, ke nun funkcias aŭtobusa linio inter Xi'an kaj nia gubernia urbo.

甲：听说现在从西安到我们县城通汽车了。

B: Estas pli agrable veturi per aŭtobuso, ĉar oni povas halti survoje kaj pririgardi la trapasatajn lokojn.

乙：乘汽车更愉快，因为中途可以逗留，观看路过的地方。

A: Revenvoje do ni prenu aŭtobuson, ĉu bone?

甲：回头我们乘汽车，好吗？

B: Bone.

乙：好吧。

B: Urbo N, du ir-reiraj biletoj de dua klaso.

乙：买两张去 N 市的二等往返票。

Oficisto: Pretigu la ĝustan sumon por la pago.

售票员：请把票钱准备好。

B: Ĉu vi ne povas ŝanĝi?

乙：您不能找钱吗？

A: Jen la ĝusta sumo.

甲：瞧，钱数刚好。

B: Ĉu ni povas interrompi la veturadon?

乙：我们可以在中途停留吗？

O: La bileto validas por tri tagoj. Se vi interrompas la veturadon, vi devas doni la bileton al la kondukisto, ke li signu ĝin, kaj vi devas atingi la celokon je la limdato.

售票员：车票有效期为三天。您要中途停留，需将车票交乘务员签票，并于限期内到达目的地。

A: Jen la pakaĵ-bileto. Je kioma horo ekveturos la trajno?

甲：这是行李票。车几点开？

B: Je duono post la sepa. Ni iru al la kajo numero 4 por envagoniĝi.

乙：七点半开。我们到第四站台去上车吧。

A: Kiom da stacioj trappsos la trajno?

甲：列车经过多少站？

B: La ekspreso trapasos 13 staciojn, sed haltos nur ĉe kvar el ili.
 乙：特别快车经过 13 站，但只有四站停车。

A: Envagoniĝu, baldaŭ la trajno startos.
 甲：上车吧，车就要开了。

B: Pardonon, lasu min meti mian mansakon sur la pakajbreton.
 乙：劳驾，请让我把提包放到行李架上。

Kunvojaĝanto: Ne metu ĝin sur la mian! En ĝi estas ovoĝ.
 同路乘客：请不要放在我的提包上！里面有鸡蛋。

A: Ĉu mi povus malfermi la fenestron? Estas sufoko!
 甲：我可以把窗子打开吗？真闷人！

Konduktoro: Ne! La trajno tuj eniros longan tunelon. Bonvole fermu ĉiujn fenestrojn.
 乘务员：不要打开！列车马上就要进大隧道。请把所有窗子关好！

B: Je kioma horo ni preterpasos la belan monton T?
 乙：我们几时过秀丽 T 山呢？

K: Post duonhoro.
 乘务员：再过半小时。

A: Ĉu nia trajno alvenos al N je la ĝusta tempo?
 甲：我们的列车是正点到达 N 市吗？

K: Akurate laŭ la horaro.
 乘务员：将按列车时刻表准时到达。

B: Ĉu pasaĝeroj al Z devas ŝanĝi trajnon ĉi tie?
 乙：去 Z 的乘客在这儿换车吗？

K: Jes. Ne fumu en la vagono!
 乘务员：是的。车内请勿吸烟！

B: Kie estas la vagonrestoracio?
 乙：餐车在什么地方？

K: Meze de la vagonaro.
 乘务员：在列车中部。

备用词语

dizela lokomotivo 内燃机车, vapora lokomotivo 蒸汽机车, pakaj-vagono 行李车, pasaĝera vagono 客车车厢, asekuri pakajojn 行李保险, rapida trajno 快车, longdistanca trajno 长途列车, ekspreso 特别快车, apudurba trajno 近郊列车, vartrajno 货车, pakajdeponejo 行李寄存处, kupeo 包厢, maksimuma rapideco 最大时速, minimuma rapideco 最低速度, vaporŝipo 汽船, haveno 港口, ankrejo 锚地, albordiĝi 靠岸, dupersona kajuto 双人客舱, pruo 船头, poŭpo 船尾, babordo 左舷, tribordo 右舷, saboato 救生艇, savzono 救生圈, navigado 航行, doganejo 海关, pasporto 护照, enira vizo 入境签证, transira vizo 过境签证, pagi imposton 纳税, ne varo sed objekto por persona uzo 非货物而是个人用品, kontrabandaĵo 走私品, ŝipestro, kapitano 船长, direktilisto 驾驶员、舵手, maristo 海员, aviadisto 航空员, piloto 领航、飞机驾驶员, fluĝaveno 航空港, aerodromo 飞机跑道, stevardo 航空服务员, stervadino 空姐, aviada kurso 航线, marmalsano 晕船, buki zonojn 系上安全带, ŝalti la ventolilon 打开通风机, turni la ventolilon al iu 把通风嘴转向某人, alteriĝi 着陆, paneo 抛锚, aviadilo Boeing 707 波音 707, jeto 喷气飞机, pasaĝera helikoptero 载客直升机, telfero 缆车, ĵipo 吉

普车, tramo 电车, trolebuso 无轨电车, subtera tramo 地铁, triciklo 三轮车, aŭtobuso 公共汽车, kaleŝo 马车, petveturi 搭便车, altrapida ŝoseo 快速路, ekspresa ŝoseo 高速公路, trefkruciĝo 立交桥, pramo 渡船, velŝipo 帆船, motorboato 摩托艇, levi ankron 起锚, portseĝo 滑竿, 肩舆, palankeno 轿子, ĵonko 平底船, trafikaj signaloj 交通信号, iru dekstre 靠右边走, traveturo de aŭtoj malpermesita 不许汽车穿行, ĵinrikŝo 人力车, rezerva peŭmatiko 备用轮胎, ferdeko 甲板, luko 舷窗, enirejo 入口, elirejo 出口, plezurboato 游艇

20. POŝTO 邮政

Kiom oni devas pagi por afranko de aerpoŝta letero?

一封航空信要付多少邮资?

Unu yuanon kaj tridek cendojn por enlanda letero kaj 5.4 juanojn por letero al fremda lando.

国内信一元三角, 国际信五元四角。

Bonvolu pesi tiun ĉi leteron. Ĉu ĝi superis la regulan pezon?

请称一称这封信。是不是超重了?

Jes, vi devas pagi duoble.

超重了, 要加倍付费。

Kiu ĝiĉeto akceptas registritan leteron?

哪个窗口办理挂号信件?

Ĝiĉeto n-ro 3.

三号窗口。

Kiom da tempo marpoŝta letero bezonas por atingi Parizon?

海路邮件(平信)要多少时间到达巴黎?

Ĉirkaŭ unu monaton.

大约一个月。

Kaj aerpoŝta letero?

航空信呢?

Ĉirkaŭ unu semajnon. Foje nur kvin tagojn.

大约一个星期。有时只用五天。

Mi volas aĉeti kelkajn poŝtkartojn.

我要买几个明信片。

Ĉu vi volas poŝtmarkojn? Ĵus emisiigis serio de belaj memorigaj poŝtmarkoj.

您不要点邮票吗? 刚发行了一套漂亮的纪念邮票。

Jes, jes. Ĉu vi vendas ankaŭ miniaturan eldonon de la serio?

要, 要。你们也出售这套邮票的小型张吗?

Ne. Se vi nepre volas ĝin, bonvolu vin turni al la filatela servo de la centra poŝtoŝticejo.

如果您一定想要, 请到邮政总局集邮服务部去买。

Dankon! Mi demandis pri tio por mia najbaro, kiu kolektas poŝtmarkojn. Bonvolu doni al mi mandatformulon.

谢谢! 我是给集邮的邻居打听打听。请给我一张汇款单。

Jen prenu. Bonvolu skribi per plumo, sed ne globkrajono.

请拿去。请用钢笔填写, 不要用圆珠笔。

Kiom da komisi-kosto?

汇费多少？

Unu procento de la sendata sumo.

汇款的百分之一。

Kiu giĉeto akceptas pakaĵojn de presaĵo?

哪个窗口收寄印刷包裹？

Tiu, ĉe la angulo.

角上那个。

Kiom estas la komenca pezunuo de presaj-paketo?

印刷包裹起码重量是多少？

Cent gramoj.

一百克。

Ĉu la paketon vi kontrolos?

包裹要检查吗？

Jes. Oni ne devas enmeti leteron en ĝin.

是的，里面不可以加入信函。

Ĉu medikamenton oni povas sendi per la poŝto?

可以邮寄药品吗？

Jes, sed oni devas meti ĝin en lignan keston. Ne bone pakitan medikamenton ni ne akceptas.

可以，但是需要装在木箱里。包装不好就不收寄。

Ĉu petardojn, raketojn kaj aliajn artajn fajraĵojn oni povas poŝti?

鞭炮、火箭和烟火可以邮寄吗？

Ne, eksplodaĵoj, brulemaĵoj kaj venenaĵoj ne povas esti sendataj per la poŝto.

不行，易爆易燃物品以及毒品不能邮寄。

Ĉu tiu ĉi estas giĉeto por poŝtrestantaj leteroj?

这个窗口是办理留交（待取）信件的吗？

Jes.

是的。

Ĉu alvenis poŝtrestantaj leteroj al mi? Mia nomo estas N.

有给我的待取邮件吗？我的名字叫 N。

Jen estas nesufiĉe afrankita letero por vi. Bonvolu pagi punmonon por ĝi.

这儿有封给您的欠资信。请交付罚金吧。

Ĉu tie ĉi oni elpagos la poŝtmandatojn?

这儿取汇款吗？

Jes. Bonvolu subskribi ĝin kaj montru al ni vian legitimaĵon (pasporton).

是的。请在汇票上签名并出示您的证件（护照）。

Mi ricevis sciigilon (invitilon) por poŝtpaketo. Ĉu mi povas ricevi ĝin de via giĉeto?

我收到一个包裹通知单。我可以从你们这个窗口领取包裹吗？

Jes. Bonvolu surskribi la formularon ĉi tie.

可以。请在表格的这个地方签上姓名。

备用词语

poŝtkesto 邮箱、邮筒, leterkesto 信箱, poŝtaĵo 包裹, poŝtestro 邮政局长, poŝtisto 邮务员, poŝtvagono 邮政车, ordinara poŝto 平邮, valor-letero 保价信函, ŝarĝita letero (寄递票证

等的) 保价信, nefermita letero 敞口信, leterportisto 邮差, anonima letero 匿名信, internacia respondkupono 国际回信券, ricevatesto por registrita letero 挂号信回执, ŝnurligi paketon 捆扎包裹, sendaĵo kun deklarita valoro 申报过价值的邮件, koverto 封套, adreso nekompleta 地址不完全, ekspresa letero 快信, poŝta stampo 邮戳, speciala poŝtmarko 特种邮票, unuataga koverto 首日封, elektronikpoŝta letero 电子邮件

21. TELEFONI KAJ TELEGRAFI 打电话和打电报

A: Ha lo! Ĉu mi parolas kun la centralo?

甲: 喂! 您是总机吗?

B: Jes. Kiun numeron vi volas?

乙: 是的。您要几号?

A: Interligu min kun numero 401.

甲: 请接 401.

C: Ha lo! Mi estas C. Kun kiu mi parolas?

丙: 我是丙。您是谁?

A: Mi estas A. Mi volas paroli kun kamarado Ĉ. Ĉu li estas en la oficejo?

甲: 我是甲。我要和丁同志讲话。他在机关里吗?

C: Jes. Momenton. Mi alvokos lin.

丙: 他在。我稍等片刻。我去叫他来。

Ĉ: Ha lo! Parolas Ĉ. Ĉu kamarado A? Kion vi volas?

丁: 喂! 我是丁。您是甲同志吗? 您有什么事?

A: Morgaŭ venos kelkaj esperantistoj el najbara lando. Mi iros al la flughaveno ilin bonvenigi. Ĉu vi povus iri kun mi?

甲: 明天有几位邻邦的世界语者要来。我到机场去欢迎。您能同我一起去吗?

Ĉ: Jes.

丁: 可以。

A: Ĉu vi povus telefoni al k-dino D kaj demandi ŝin, ĉu ankaŭ ŝi povus iri kun ni?

甲: 您能给戊同志打个电话问问她能否同我们一起去吗?

Ĉ: Jes. Sed mi ne scias ŝian telefonan numeron. Ĉu vi scias?

丁: 可以。不过我不知道她的电话号码。您知道吗?

A: Ŝia numero estas 36887109 (tri ses ok ok sep unu nulo naŭ).

甲: 她的号码是 36887109。

Ĉ: Pardonon, mi ne bone aŭdis. Bonvolu ripeti... (Post atendado) Kial vi silentas?

丁: 对不起, 我没听清楚。请再说一遍..... (等待之后) 您为什么不说话?

A: Oni interrompis la komunikon.

甲: 有人挂断了。

Ĉ: Momenton. Mi prenu paperon por noti.

丁: 请稍候, 我拿张纸来。

A: Ŝia numero estas 36887109. Ĉu vi bone aŭdis? La aŭskultilo zumadas. Ŝajne la aparato difektiĝis.

甲: 她的号码是 36887109。耳机嗡嗡地响。好像机子出了毛病。

Ĉ: Eble fadenoj miksiĝis.

丁：也许绞了线了。

A: Ŝia numero estas 36887109. Vi povas trovi ĝin en la telefon-libro.

甲：她的号码是 36887109。您可以在电话簿里查到。

Ĉ: Bone. Je kioma horo ni ekveturos al la flughaveno?

丁：好的。我们几点出发到机场去？

A: Je la deka. Sciigu al k-dino E la tempon!

甲：十点。请把时间告诉戊同志！

Ĉ: Mi tuj telefonos al ŝi. Ĝis morgaŭ. (Li metas la aŭdilon sur la forkon kaj diskumas.) Ha lo, mi volas paroli kun k-dino D, bonvolu voki ŝin al la aparato.

丁：我立即打电话给她。明天见。（他挂上耳机开始拨号。）喂，我找戊同志，请叫她接电话。

E: Vi vokis eraran numeron. Ĉi tie estas lernejo.

己：您拨错号了。这儿是学校。

Ĉ: Pardonon! (Diskumas denove.) Ha lo, ĉu numero 36887109?

丁：对不起！（又拨号。）喂，是 36887109 吗？

D: Jes. Ĉu k-do Ĉ?

戊：是的。是丁同志吗？

Ĉ: Mi mem.

丁：正是我。

D: Bonan tagon! Kio devigas vin telefoni al mi?

戊：日安！您打电话有什么事吗？

Ĉ: Bona afero! Alvenos esperantistoj el najbara lando!

丁：好事！邻国的世界语者要来了！

D: Ho, mi scias tion. Mia frato diris, ke lia koresponda amiko venos kun turista grupo. Kiam do ili atingos nian urbon?

戊：啊，这我知道。我兄弟说他的通信朋友要随旅游团来访。他们何时到达我市？

Ĉ: Morgaŭ. Ĉu vi kaj via frato povus iri kun ni al la flughaveno por ilin bonvenigi?

丁：明天。您和您兄弟能和我们去机场欢迎他们吗？

D: Mia frato veturis al T., sed mi tuj telegrafos al li. Kiam vi ekiros?

戊：我兄弟到 T 城去了，不过我给他发电报去。你们什么时候动身？

Ĉ: Je la deka.

丁：十点。

D: Eble ankaŭ li povos kune iri.

戊：也许他能一同去。

Ĉ: Tuj ekspedu telegramon al li. Sufiĉe kelkaj vortoj: Tuj revenu pro la gastoj.

丁：赶快发电报吧。几个字就够了：客来速归。

D: Mi pensas, ke du vortoj jam sufiĉus: Gastoj alvenas.

戊：我想两个字就够了：客至。

Ĉ: Bone, bone! Tuj iru al la telegrafejo kaj ne perdu tempon.

丁：好，好！赶快去电报局吧，不要耽误时间。

D (en telegrafejo): Donu al mi telegramo-formulon. Kiom kostas ĉiu vorto por depeŝo al urbo T?

戊（在电报局）：请给我一份电报单。打 T 市的电报多少钱一个字？

F: Ĉiu vorto kostas..., se vi sendas ĝin en klara lingvo.

庚：您要打明码电报一个字.....

D: Kiom da tempo oni bezonas por transsendi la telegramon al la adresito?

戊：电报发到收报人受理需要多少时间？

F: Ĉirkaŭ kvin horojn.

庚：大约需要五小时。

备用词语

longdistanca telefonado 长途电话, telefona budo 电话亭, mendi interparolon kun s-ano N 预约与 N 同志通话, nuligi mendon 取消预约, telefona kunveno 电话会议, linio okupata 占线, tranĉi komunikon 挂断, la aparato difektiĝis 机器有毛病, trakonekti al vi la direktoron 给你接经理, kodo 密码, telegrafa stilo 电报体, telegramportisto 电报信差, deĵoro en nokto 值夜班, ekspresa telegramo 加急电报, deĉifri 译电报, morsi 用莫尔斯电码发电报, gratula (sekreta, saluta) telegramo 祝贺(秘密, 问候)电报, prokrasto, detalon atendu 延期, 详情待告, Alveno 12:30 dim. 星期天两点半到达; Urga helpo! 急救! Kunportu magilanternon! 请带幻灯! Alsendu 10 PIV 请寄 PIV10 部, A malsaniĝis! A 病! Tuj venu! 速来! Gratulon pro via sukceso! 祝贺您成功! Kondolencon pro la forpaso de s-ro Z 吊唁 Z 先生逝世, Oraj medaloj gajnitaj 得了金牌, Tajno 53, vagono naŭa 53 次列车 9 车厢, Sekura alveno 平安到达

22. AĈETADO 购物

Komizo: Per kio mi povas servi al vi?

店员：您要买点什么？

Kliento: Bonvolu montri al mi ombrelojn.

顾客：请给我几把雨伞看看。

Komizo: Ĉu plastajn aŭ faldeblajn?

店员：塑料伞还是折叠伞？

Kliento: Faldeblajn aŭ aŭtomate malfermeblajn.

顾客：要折叠伞，能自动打开的。

Komizo: Kian koloron vi preferas?

店员：您喜欢什么颜色？

Kliento: Nigran aŭ flavan.

顾客：黑的或者黄的。

Komizo: Bedaŭrinde, tiajn ni ne plu havas. Ĉu blua ne taŭgas? Tiajn ni havas en stoko.

店员：很遗憾，那种卖完了。蓝的不行吗？蓝的我们有货。

Kliento: De kia mezuro?

顾客：多大尺寸？

Komizo: De diversaj mezuroj. Kion do vi bezonas?

店员：各种尺寸都有。您要哪种？

Kliento: Malgrandan por lerneja knabo.

顾客：给男小学生用的小伞。

Komizo: Jen ombreloj por gelernantoj. Ĉu ili plaĉas al vi?

店员：这些都是给小学生用的小伞。您喜欢吗？

Kliento: Tre elegantaj. Kiel oni povas ilin malfermi?

顾客：挺好。怎么打开？

Komizo: Premu la butonon sur la tenilo. Jen, ĝi malfermiĝis.

店员：按伞柄上的按钮，瞧，打开了。

Kliento: Kiom ĝi kostas?

顾客：多少钱？

Komizo: Sep juanojn, modera prezo.

店员：七元钱，价格不贵。

Kliento: Jes, vere. Do, mi aĉetos ĝin.

顾客：是不算贵。那我就买它吧。

Komizo: Ĉu vi ne bezonas ion alian?

店员：您不需要别的什么东西吗？

Kliento: Mi volas ĉapon.

顾客：我要买帽子。

Komizo: Ĉapojn vendas alia sekcio, ĉe la dekstra angulo de la domo.

店员：帽子不在这里卖，在商店的右角卖。

(La kliento venas al la sekcio de kapvestoj.) (顾客来到帽子的售货部。)

Komizo: Kion vi deziras? Ĉu ĉapon aŭ ĉapelon?

店员：您买什么？买哪种帽子？

Kliento: Ĉapon de maristo el nilona ŝtofo.

顾客：要一顶尼龙水手帽。

Komizo: Kiu mezuro taŭgas por vi?

店员：您戴哪一号合适？

Kliento: Mi ne scias. Donu al mi kelkajn, ke mi provu.

顾客：我不知道。请给我几种让我试一试。

Komizo: Ŝajne ĉi tiu taŭgas.

店员：我看这顶合适。

Kliento: Mi surmetu ĝin. Ĉu ĝi bone sidas?

顾客：我来戴上。合适吗？

Komizo: Ĝi bone sidas al vi.

店员：您戴着很合适。

Kliento: Iom tro vasta. Montru al mi malplivastan.

顾客：大了点。拿小一点的看看。

Komizo: Tro vasta?! Ja ne tro vasta!

店员：大了？可不算大！

Kliento: Tro vasta por mia filo.

顾客：给我儿子戴是太大了。

Komizo: Ho, mi komprenas. Jen provu ĉi tiun.

店员：啊，我明白了。拿这顶去试试看。

Kliento: Tre bone. Mi prenu ĝin. Kiom ĝi kostas?

顾客：很好。我就要这顶吧。多少钱？

Komizo: Kvar juanojn.

店员：四元。

Kliento: Kvar juanojn?! Tro multe por tia ĉapelo! Mi ne pagus eĉ duonon!

顾客：四元？！太不值了！一半的价钱我都不出！

Komizo: Ni vendas nur je fiksa prezo kaj ne proponas du prezojn por unu varo.

店员：我们只照定价售货，言不二价。

Kliento: Jes, dankon, tion mi scias. Mi serĉos por mi malklaran.

顾客：是的，谢谢，这我知道。我去找找便宜的。

Komizo: Najbare de nia magazeno troviĝas speciala vendejo de ŝuoj kaj kapvestoj. Tie vendiĝas pli multaj specoj de ĉapoj.

店员：我们百货商店隔壁是一家专门经营鞋帽的商店。那儿卖的帽子品种更多些。

Kliento: Dankon! Mi volas aĉeti ankaŭ pantalonon ĉi tie.

顾客：谢谢！我还要在这儿买条裤子。

Komizo: Ĉu konfekcian pantalonon? Se jes, bonvole ascendu al la dua etaĝo. Tie vendiĝas pretaj vestoj kaj ŝtofoj.

店员：要成衣吗？要成衣请上二楼。哪儿卖成衣和衣料。

Kliento: Ĉu oni ankaŭ povas farigi vestojn ĉi tie?

顾客：这儿也能定做服装吗？

Komizo: Jes. En la tria etaĝo estas tajlora servo. Se vi volas vestojn pli bone sidantajn al vi, vi povas uzi tiun servon kaj farigi vestojn el elektitaj ŝtofoj.

店员：能。三楼有个服装加工部。要想穿更合身的衣服，可以拿选好的衣料叫它加工。

Kliento (al ŝtofovendisto): Mi deziras farigi someran pantalonon. Kian ŝtofon vi rekomendos al mi?

顾客（对布匹售货员）：我想做条夏天穿的裤子。有什么料子介绍给我吗？

Vendisto: Mi ne scias, kian vi preferas. Ĉu lanan, kotonan, silkan aŭ artafibran? Ĉu helan aŭ malhelan koloran? Jen la nova kolekto de specimenoj. Bonvolu mem elekti.

售货员：我不知道您喜欢哪一种。要毛料、布料、绸缎还是人造纤维？要深色还是浅色？这是新的衣料样品册。请自己选好了。

B: Pli ol dek mil laboristoj, inĝenieroj, teknikistoj kaj oficistoj.

乙: 它有一万多工人、工程师、技术员和职员。

A: Kiajn ŝipojn ĝi povas konstrui?

甲：它能造什么样的船只？

B: Tre multajn specojn. Post la Liberiĝo ĝi jam faris pli ol mil ŝipojn. Inter ili estas cisternaj ŝipoj por transportado de nafto, ŝipoj por transporti karbon kaj ercojn, dragŝipojn, trenŝipojn, kontenerajn ŝipojn, trajn-pramojn, esplorajn ŝipojn, pasaĝerajn ŝipojn kaj 60-tunan flosan gruon.

乙：许多种的船只。解放后它已经造了一千多条船只。其中有运载原油的油船、煤炭矿石船、挖泥船、拖船、集装箱船、火车渡船、考察船、客船和六十吨浮吊。

A: Ĉu ankaŭ pezan gruon ĝi faras?

甲：它也制造重型起重机吗？

B: Jes, ĉar mi mem bezonas tian ekipaĵon. Rigardu, tie ĉe la ŝiplito staras giganta gruo, kiu povas levi pezaĵon de 150 tunoj.

乙：是的，因为我们自己需要这种设备。您瞧，船台那儿有座巨型起重机，能举起一百五十吨重的东西呢。

A: 150 tunoj! Do ĝi povas levi 50 ŝarĝaŭtojn kunligitajn! Por kio vi bezonas tian gigantan levmaŝinon?

甲：一百五十吨？那么说它能举起五十辆连在一起的卡车了！你们干吗要这么巨大的起重机呢？

B: Por ŝipkonstruado. Por levi dizelan ĉefmotoron, partojn de ŝipo... Ni iru al la ŝiplito, kaj tie vi pli bone vidas ĝian laboron.

乙：用来造船。用来吊柴油主机，吊船的分段.....我们到船台那边去吧，那儿您可以更清楚地看到它的工作。

A: Ĉu ankaŭ tiu gruo estas farita de via ŝipfarejo?

甲：那座起重机也是你们船厂造的吗？

B: Jes. Rigardu la blokon en la aero! Ĝi estas parto de la ŝipŝelo. Oni kunveldis la trabojn kaj ŝtalplatojn en alia laborejo. Nun oni muntas la blokojn, ke ili kune formu ŝelon de ŝipo. Per tiu metodo ni povas konstrui ŝipon pli rapide.

乙：是的。您看空中的那个部件！它是船壳的一部分。人们在另外的车间把钢梁钢板焊接起来。现在是拼装部件，使之形成船壳。用这种方法可以造得更快。

A: Kiom da tempo oni bezonas por konstrui dekmil-tonelan ŝipon?

甲：造一艘万吨轮需要多少时间？

B: Ĉirkaŭ unu jaron. Se ĉiuj laboroj iras glate, dek monatoj jam sufiĉas.

乙：大约一年。如果一切工作进行得顺利，十个月就够了。

A: Oni diras, ke post finkonstruo, la korpo de ŝipo devas mem gliti en akvon. Kiel tio eblas por tiel pezega objekto? Ĉu oni ne bezonas tiri la kolosan ŝtalan ŝelon per trenŝipo?

甲：据说造好之后船体要自行滑到水里。那样沉重的东西又怎么可能呢？难道不必用拖船拉动庞大的钢铁船壳吗？

B: Ne. Rigardu, la ŝelo sidas sur multaj subteniloj, ĉe kies supro troviĝas ŝtalaj sablokestoj plenaj de sablo. Kiam la ŝelo estas finkonstruita, oni malfermas la kestojn kaj ilin frapas, tiel ke la sablo elfluu. Sekve de la elfluo de la sablo, la ŝelo iom post iom malleviĝas kaj falas sur grandajn lignajn blokojn ŝimiritajn per graso.

乙：不用。您瞧，船壳放在许多支架上，支架顶端有钢制的沙箱。船壳造好后，把沙箱打开并且敲击它们，让沙子流出来。随着沙子的外流，船壳逐渐下降，就落到涂了油脂的巨大木块上。

A: Nun mi komprenas! La lignoblokoj kun graso povas gliti sur la ŝiplito kunportante la pezan ŝelon.

甲：我明白了！涂了油脂的滑块能带着沉重的船壳在船台上滑行。

B: Ĝuste tiel. Vidu, la lito estas dekliva, do la pezaĵo nature glitas malsupren, se oni rompas la kablون, kiu ligas la ŝelon al la bordo.

乙：正是那样。您看，船台是斜坡，如果砍断系船的缆绳，重物自然就往下滑。

A: La enakviĝo de ŝipego certe estas rigardinda spektaklo.

甲：巨轮下水一定十分壮观。

B: Jes. Kiam okazas tia soleno, svarmas homoj ĉe la ŝiplito, ne nur sur la ŝipo, sur la tero, sed ankaŭ sur ŝtalaj blokoj en la aero, pendantaj de de turogruoj. Ĉie oni jubilas pro la naskiĝo de nova ŝipo.

乙：是的。举行下水典礼时，船台一带人山人海，不仅船上、地上，就连塔吊吊在半空中的部件上也满是人。到处人们为新船的诞生热情欢呼。

A: Kio estas tiu basenego kun ŝipo en ĝi?

甲：那个装一艘船的大池子是做什么的？

B: Ĝi estas seka doko.

乙：它是干船坞。

A: Kion tiu laboristo tie faras? Kial li ŝprucigas akvon al la ŝelo?

甲：那位工人师傅在那儿干什么？为什么他往船壳上喷水？

B: Li senrustigas per altprema akvo.

乙：他在用高压水除锈。

A: Kaj tiu staranta en la trogo ĉe la ekstremo de la longa brako de la aŭtogruo?

甲：那位站在汽车吊长臂斗子里的师傅又是干什么的呢？

B: Li relaxas la ŝelon per verniso-ŝprucigilo.

A: Kiom longe la verniso povas rezisti kontraŭ la erozio de marakvo?

甲：漆能耐海水的侵蚀多少时间？

B: Nur kelkajn jarojn. Tial la ŝipoj devas estis ofte relakitaj.

乙：只能耐几年。所以船舶时常要重新上漆。

A: Kiel la riparata ŝipo eniris la sekan dokon?

甲：修理的船只怎么进到干船坞里面去的？

B: La doko havas pordegon. Se oni malfermas la pordegon, la baseno povas tuj pleniĝi je akvo, per kiu ŝipo povas facile en- aŭ eliri la basenon. Ĉu vi ne vidas la dometon apud la baseno? Ĝi estas pumpejo, kies pumpiloj povas elpumpi akvon en la baseno por faciligi riparadon al la enirinta ŝipo.

乙：船坞有大门。把门打开，池子立刻会灌满水，船就能进出船坞。没看见池子边的小房子吗？它是泵站，能抽干池子里的水，便于修理驶入的船只。

A: Ĉu la riparistoj devas labori subĉiele tiel en frosta vintro kiel en arda somero?

甲：不论严寒酷暑修理工都得露天工作吗？

B: Granda parto de ili devas, tial oni donas apartan zorgon pri ilia sano. Ĉiu el ili rajtas ripozi ĉiujare almenaŭ 2 semajnojn en sanatorio. La ŝipkonstruejo havas sanatorion en pluraj pitoreskejoj.

乙：大多数得那样干活，所以特别关心他们的健康。他们每年至少可以在疗养院休息两星期。船厂在好几处风景优美的地方有疗养院。

A: Ĉu via ŝipfarejo produktas ŝipojn nur por enlandaj bezonoj?

甲：你们厂只为国内造船吗？

B: Ni produktas ŝipojn ankaŭ por eksterlandaj klientoj. Kaj ni klopodas por plialtigi la kvanton kaj

kvaliton de niaj produktaĵoj.

乙：我们也在为外国主顾生产船舶。我们正在努力提高产品的数量和质量。

备用词语

pruo 船首, pobo 船尾, ferdeko 甲板, kilo 龙骨, holdo 船舱, holdoluko 舱眼, ponto 船桥, stirejo 驾驶室, stirkompaso 罗盘, mezuraparatoj 仪表, radaranteno 雷达天线, sekstanto 六分仪, ankro 锚, ankroĉeno 锚链, ventolilo 通风机, holdokolono 舱柱, rudro 舵, helico 螺旋桨, bilĝo 舱底, radioĉambro 无线电室, ŝipestra kajuto 船长室, salono 客厅, ankrovinĉo 起锚机, antaŭaj holdoj 前舱, generatoro 发电机, savboato 救生艇, ankrejo 锚地, bovokulo 园窗口, inĝenier-ŝipo 工程船, mezura ŝipo 测量船, elektrej-ŝipo 船电站, savŝipo 打捞船, submarŝipo 潜水艇, militŝipo 军舰, flagŝipo 旗舰, batalŝipo 战舰, krozŝipo 巡洋舰, aviadilŝipo 航空母舰, plezurŝipo 游艇, vaporŝipo 汽船, balenŝipo 捕鲸船, bordŝipo 近海船, aŭtomata veldmaŝino 自动焊接机, bolto 螺栓, nito 铆钉, rudrorado 舵轮, masto 船桅, helicsafto 螺杆, kajo 码头、月台, fiksa pulio 定滑车, libera pulio 动滑车, surtraka gruo 龙门吊, skafaldo 脚手架, projekti 设计, munti 装配, instali 安装, marteli 捶打, pregi 冲压, forĝi 锻造, tranĉi 切削, renovigi 革新, teknologio 工艺, procedo 程序

31. INDUSTRIOJ 工业

A (Ĵurnalisto): Mi petas vian pardonon, ke mi devas vin ĝeni per intervjuo. Mi scias, ke vi estas tre okupita pro la konstruado de la nuklea elektrejo; sed nia ĵurnalo devas raporti pri la industrioj de via provinco.

甲（记者）：请您原谅，这次采访打扰您了。我知道由于核电站的工程您很忙；可是我的报纸需得介绍贵省的工业。

B (Oficisto): Pri kio vi interesiĝas? Mi estas preta respondi viajn demandojn.

乙（职员）：您对什么感兴趣？我可以回答您的问题。

A: Kia estas la ĝenerala situacio de viaj industrioj?

甲：你们工业总的形势如何？

B: Ni jam faris grandan paŝon antaŭen kaj havas belan perspektivon. Ni solvis la problemon de energio kaj krudmaterialoj, enkondukis novajn teknologiojn, multaj aliaj problemoj estas solvitaj aŭ solvataj.

乙：我们前进了一大步，前景美好。我们解决了能源和原材料的问题，引进了新工艺，许多别的问题已经解决或正在解决。

A: Kiajn problemojn vi antaŭe havis en industrio?

甲：你们从前在工业方面有些什么问题？

B: Antaŭe mankis al ni elektrejoj, ni havas nur malgrandajn karbominejojn kaj nenian petrolkampon, mankis al ni industriaj branĉoj de kemiaĵoj, metalurgio, maŝinfarado; ni malhavis ankaŭ gravajn branĉojn de malpeza industrio.

乙：以前我们缺少电站，只有一些小煤窑，什么油田都没有，缺少化学工业，冶金工业，机器制造业；我们也缺少一些重要的轻工业部门。

A: Do, ĉion vi jam havas nun?

甲：那么现在一切都有了吗？

B: Ankoraŭ ne. Sed ni jam havas nombron da fabrikoj por produkti ilmaŝinojn, generatorojn,

turbinojn, lokomotivojn, dizelojn, benzinajn motorojn, aŭtojn, ŝipojn, vojkonstruajn maŝinojn, domkonstruajn turgruojn, ekipaĵojn por petrolorafinado, tekstila industrio kaj elektronikaj fabrikoj...

乙: 还不能说一切都有了。不过我们已经有了了一批生产工作母机、发电机、涡轮机、火车头、柴油机、汽油发动机汽车、船舶、筑路机械、建筑房屋用的塔吊、炼油设备、轻纺工业和电子工业设备的工厂。

A: Do vi jam havas solidan bazon por disvolvi malpezan industrion en via provinco.

甲: 那你们已经有了发展本省轻工业的坚实的基础了。

B: Ankoraŭ mankas al ni sufiĉe da inĝenieroj, teknikistoj kaj spertaj laboristoj. Kaj por modernigi niajn fabrikojn de malpeza industrio, ni devas importi novajn ekipaĵojn kaj apliki novajn teknologiojn. Anstataŭ nur produkti biciklojn, horloĝojn, kudromaŝinojn kaj similajn, ni produktos ankaŭ komputorojn, kolorajn televidilojn, lavmaŝinojn, fridujojn, vidaĵrekordilojn, vidaĵfotilojn, moldiskojn, lumdiskojn, fotilojn, magnetofonojn kaj aliajn aparatojn pli forte deziratajn hodiaŭ.

乙: 我们还没有足够的工程技术人员和熟练工人。为了使我们的轻工业工厂现代化, 我们需得进口新设备, 采用新工艺。不止生产自行车、表、缝纫机之类的东西, 我们也要生产彩色电视机、洗衣机、电冰箱、录像机、摄像机、软盘、光盘、照相机、录音机以及其它今天十分需要的机器。

A: Mi informiĝis, ke la televidiloj produktitaj de via provinco gajnis premion de la ŝtato. Kiel vi sukcesis atingi tion?

甲: 听说你们省生产的电视机得到了国家的奖。你们怎么成功的呢?

B: Oni faris esploron kaj eksperimentojn por plibonigi la teknologion kaj venkis kelkajn mankojn. Por rapidigi la produktadon ni klopodas aŭtomatigi ĝin.

乙: 人们进行了研究、实验、改进工艺, 克服了一些缺点。为加速生产我们在努力实现自动化。

A: Oni diras, ke vi ankaŭ komencis uzi kaj produkti robotojn, ĉu vere?

甲: 据说你们也开始使用并生产机器人, 可是真的吗?

B: Jes.

乙: 是的。

A: Kial uzi kaj produkti robotojn, se ni havas tiel multe da homoj?

甲: 我们有这么多的人, 干吗要使用并生产机器人?

B: En iuj laboroj robotoj estas nepre necesaj; ekzemple en plenumo de pezaj kaj monotonaj laboroj ĉe pregmaŝino, en manipulado de danĝeraj nukleaj aparatoj, en muntado de elektronikaj aparatoj, en ŝpruciga lakado k.s., robotoj povas labori pli bone ol homoj.

乙: 有些工作必须机器人; 例如进行笨重和单调的冲床的工作, 操纵危险的核设施、装配电子仪器、喷漆等等, 机器人比人干得好。

A: Kaj robotoj ne timas polucion...

甲: 机器人不怕污染.....

B: Tamen la produktantoj de ili ja timas polucion.

乙: 生产机器的人可怕污染。

A: Polucio fariĝas pli kaj pli serioza problemo. Kiel iras via laboro kontraŭ polucio?

甲: 污染问题越来越严重。你们对污染的工作进行得如何?

B: Ankaŭ en tio ni atingis rimarkindan sukceson; la ŝtato pli kaj pli boniĝas ĉe ni. Neniu kamentubo ellasas nigran fumon, neniu fabriko ellasas venenan akvon al la riveroj.

乙: 这方面我们也取得了显著的成绩; 情况在日益好转。没有一个烟囱冒黑烟, 没有一个工

厂向江河排放有毒的污水。

A: Dankon pro viaj informoj. Mi vizitos kelkajn fabrikojn por akiri pli detalajn informojn. Ĉu vi povus rekomendi al mi kelkajn?

甲：谢谢您的帮助。我要访问几家工厂进行详细的了解。您能给我推荐几家吗？

B: Bonvole turnu vin al kamarado Lin. Li donos al vi necesan helpon.

乙：请您找林同志，他会给您所需要的协助。

备用词语

A. 一般用语

industria bazo 工业基地, grandaj entreprenoj 大型企业, fabriko funkciigata per ĉina kaj fremdlanda kapitaloj 中外合资工厂, prilabori 加工, raciiga propono 合理化建议, sekurigaj aranĝoj kaj instalaĵoj 安全措施和设备, laborintenseco 劳动强度, kontrolado de produktaĵoj 产品检验, uzino 大型联合工厂, produktiveco 生产率, pliigi reproduktadon 扩大再生产, fabriko 工厂, laborejo 车间

B. 重工业

minejo 矿山, ŝakto 矿井, galerio 巷道, erco-selektado 选矿, selekti per lavado 洗选, selekti per kribrado 筛选, fer-ŝtala uzino 钢铁联合工厂, neferaj metaloj 有色金属, laminatejo 轧钢厂, ferlada laminatejo 薄板厂, koaksofabriko 焦化厂, altfornego 高炉, Martin-fornego 马丁炉, Bensemer-fornego 转炉, varmblova fornego 热风炉, U-ŝtalo 槽钢, I-ŝtalo 工字钢, V-ŝtalo, angulfero 角钢、角铁, gisfero 生铁, zinkumita lado 镀锌板, ferdrato 铁丝, nerustiĝa ŝtalo 不锈钢, tornilo 车床, drilmaŝino 钻床, frezmaŝino 铣床, alezilo 镗床, pontargano 龙门吊, jigplato 仿形样板, ĝenerala muntlinio 总装配线, elektra motoro 电机, termoelektrejo 火力发电厂, hidroelektrejo 水力发电厂, nuklea elektrejo 核电站, alttensia transmisia linio 高压输电线路, gasturbino 燃气轮机, petrolrafinaĵo 炼油厂, fosmaŝino 挖掘机, buldozo 推土机, karbomina kombajno 联合采煤机, gaseksplodo 瓦斯爆炸, bituma karbo 烟煤, nafto 原油, ŝipkonstruejo 造船厂, aŭtofabriko 汽车制造厂, aviadila fabriko 飞机制造厂, traktora fabriko 拖拉机厂, fabriko de vojkonstruaj maŝinoj 筑路机械厂, kemisterka fabriko 化肥厂

C. 轻工业

ŝpinteksejo 纺织厂, prestinktura fabriko 印染厂, jutŝpinejo 亚麻纺织厂, trikaĵfabriko 针织厂, paperfabriko 造纸厂, presejo 印刷厂, bierfabriko 啤酒厂, vinpreparejo 酿酒厂, cigaredfabriko 纸烟厂, tanejo 制革厂, radiaparata fabriko 无线电厂, nilonfabriko 尼龙厂, fabriko de enladigitajoj 罐头厂, sukerfabriko 糖厂, sapofabriko 肥皂厂, serurfabriko 锁厂, fabriko de bicikloj 自行车厂, horloĝfabriko 钟表厂, meblofabriko 家具厂, motorcikla fabriko 摩托车厂

32. EN KAMPARO 农村

A: Preskaŭ nereboneblas via vilaĝo! Kiam mi vizitis vin lastfoje, mi vidis neniun pluretaĝan domon, sed nun multaj vilaĝanoj loĝas en elegantaj domoj duetaĝaj. Kiel beliĝis via vilaĝo!

甲：你们的村子几乎认不得了！上次我来的时候，没见一座楼房，现在好多老乡住上了漂亮的二层楼房。你们的村子变得多美呀！

B: Jes, jes. Arkitektoj donis al ni grandan helpon; ili desegnis, speciale por ni, plurajn tipojn de kamparanaj loĝejoj, ke ni elektu laŭ nia bezono. Iuj kamparanoj lertegaj eĉ mem projektis por si belan loĝejon. Ili riĉiĝis kaj deziras loĝi pli komforte kaj eĉ aĉetis kolorajn televidilojn.

乙: 是啊, 是啊。建筑师帮了大忙, 特别给我们设计了多种农民住宅, 供我们挑选。有些特别能干的农民还自己设计了美观的住宅。他们富起来了, 想住得更舒服点, 甚至还买了彩电。

A: Neimagebla afero antaŭ kelkaj jaroj! Kiel do oni sukcesis akiri tiel multe da monno?

甲: 这在几年前是不可思议的! 人们怎么弄到这么多钱的?

B: Dank' al entrepreno de flankokupoj, kiel bredado de dombirdoj, dombestoj, abeloj, fiŝoj kaj aliaj, kultivado de drogherboj, plektado de korboj el bambuo aŭ salikvergoj, brodado, funkciigo de malgrandaj fabrikoj por produkti ĉiutagajn bezonaĵojn, prepari teon kaj sukeron k.t.p.

乙: 靠经营副业, 饲养家禽啦, 饲养家畜啦、养蜂、养鱼等等, 种药材、编竹器、编柳筐、刺绣、开生产日用品的小工厂、制茶、制糖等等。

A: Kiel iras la terkulturado? Ĉu ĝi ne estas iom neglektita?

甲: 地种得怎样? 没有被忽视吧?

B: Ankaŭ la terkulturo progresis. Antaŭe oni ne bone plenumis la flegadon de la plantoj, kaj emfazis nur aplikon de terkulturaj maŝinoj; sed hodiaŭ ni donas grandan atenton al semselektado, uzo de bonspaciaj semoj, ĝustaj sterkado kaj irigaciado kaj zorga flegado al la plantoj.

乙: 种田也取得了进步。以前作物管理得不好, 只强调使用农机; 今天我们很注意选种、使用良种、正确施肥、灌溉、管理作物。

A: Kiel iras via kultivado de kotono kaj oledonaj plantoj?

甲: 你们的棉花和油料作物的种植怎样?

B: Rimarkindan sukceson ni atingis ankaŭ en tio.

乙: 这方面我们也取得了显著的成就。

A: Kaj la porkbredado?

甲: 养猪业如何?

B: Bonege ĝi iras. Meznombro ĉiu familio bredas sep porkojn. Nun ni komencis bredi specon de porkoj, kiu povas doni pli multe da malgrasa viando kaj grandan kvanton da organika sterko por fekundigi kampojn.

乙: 搞得很好。平均每户饲养着七头猪。现在我们开始养一种多产瘦肉的猪, 还能提供大量有机肥料来肥田。

A: Kiel iras la edukado en via vilaĝo?

甲: 你们村的教育进行得怎么样?

B: Bone funkcias la elementa lernejo kaj ni fondis novan mezlernejon. Sed mankas al ni sufiĉe da kompetentaj instruistoj. Kvankam la normala lernejo en la gubernia urbo estas vastigita, tamen ĝi ne povas elbaki sufiĉe da instruistoj por plenumi la bezonon.

乙: 小学办得不错, 我们还创立了新的中学。可是我们缺乏胜任工作的教师。虽然县城里的师范学校扩大了。可是还不能培养出足够的教师来满足需要。

A: Kiel laboras la filmprojekcia grupo?

甲: 电影放映队工作如何?

B: Ĝi jam ne funkcias; oni ne plu sentas la bezonon de ĝi. En la lernejo estas granda kolora televidilo, kiu montras programerojn en ĉiu vespero al la vilaĝanoj. La gejunuloj avidas sciencajn kaj teknikajn sciojn kaj vizitas fakajn kursojn de agronomio, medicino, elektroniko kaj dizelo.

乙: 它停办了; 人们不再觉得需要它了。学校里有部大彩电, 每天晚上给村里放映节目。青年们渴求科学知识, 在参加农业、医学、电子学和柴油机的专修班。

A: Kiel iras la virina laboro?

甲：妇女工作怎样？

B: Antaŭe oni kuraĝigis la virinojn fari, kion la viroj faras, kiel ekzemple konduki traktoron, sarki kaj rikolti, konstrui irigacian kanaletan k.s.; nun la virinoj turnas sian atenton al laboroj pli konvenaj al ili, kiel guvernado, brodado, instruado al geknaboj en lernejoj, bredi dombirdojn k.t.p.

乙：从前人们鼓励妇女从事男人干的活，例如开拖拉机、除草、收割、修水渠等等；现在妇女把注意转向更适合她们干的活，如保育工作、刺绣、教小学生、饲养家禽等。

A: Kiel vivas la gemaljunuloj, kiuj ne havas parencon por ilin vivteni?

甲：无亲戚抚养的老人生活得怎样？

B: Ili vivas feliĉe en la Maljunula Hejmo.

乙：他们在老人之家生活得很幸福。

A: Vi jam progresis en ĉiuj aferoj. Mi deziras al vi ankoraŭ pli belan estonton.

甲：你们各方面有了进步。祝你们的未来更加美好。

备用词语

A. 一般用语

laborforto 劳动力, kolektiva kultivado 集体耕作, individua kultivado 个体耕作, modernigo de agrikulturo 农业现代化, respondeca sistemo de individua laŭkontrakta produktado 个人承包生产责任制, alterna kulturo de plantoj 轮作, agrikultura imposto 农业税, klimato favora al agrikulturo 有利农业的气候, bela perspektivo 前景美好, multokupa sezono 忙季, pohektara produktokvanto 单位面积产量, puto 井, pumpstacio 泵站, agronomo 农艺师, teknika reformo de agrikulturo 农业技术改造

B. 农作物

tritiko 小麦, rizo 水稻, maizo 玉米, milio 谷子, aveno 燕麦, poligono 荞麦, hordeo 裸大麦, sekalo 大麦, sorgo 高粱, sojfabo 大豆, fabo 蚕豆, fazeolo 小豆, glua rizo 糯米, sezamo 芝麻, tabako 烟草, lino 亚麻, juto 黄麻, kanabo 大麻, kapoko 木棉, beto 甜菜, sukerkano 甘蔗, teo 茶, arakido 花生, batato 白薯, terpomo 马铃薯、土豆

C. 农事

agro 耕地, parcelo 地块, alkala grundo 盐碱地, fekunda grundo 肥土, bedo 畦, ŝtupokampo 梯田, racia sterkado 合理施肥, stalsterko 厩肥, bakteria sterko 细菌肥料, nitrogena sterko 氮肥, kalia stero 钾肥, fosfata sterko 磷肥, fekundeco 肥力, dreni 排水, konstrui riverbaraĵon 修堤坝, akvorezervejo 水库, norio 水车, kluzo 闸, pluvokvanto 降雨量, precipitaĵa kvanto 降水量, hibrida specio 杂交品种, artefarita fekundigo 人工受精, erpi 耙地, falĉi 割(庄家), draŝi 打场, pluki 采摘, senŝeligi 去皮, transplanti 栽种, grefti 嫁接, inokuli 接芽, degrajnigi 脱粒, fiinsekto 害虫, akrido 蝗虫, maizpiramido 玉米螟, rizpiramido 稻苞虫, smuto de milio 谷子黑穗病, ruĝokula burdo 赤眼蜂, plugilo 犁, diskerpilo 圆盘耙, ŝprucigilo 喷雾器, kombajno 康拜因, pedala draŝilo 脚踏打谷机, rizplantilo 插秧机

Ĉ. 副业

forstigo 造林, forstozono 林带, arbidkultivejo 苗圃, arbaro 森林, lako 漆, kaŭĉuko 橡胶, paŝtejo 牧场, veterinaro 兽医, arbohakisto 伐木工, metiarto 手工工艺(关于动植物名称请

参阅 23 和 24 章)

33. EN KONSTRUEJO 工地上

A: Grandioza sceno! Se mi ne vidus ĝin, estus malfacile por mi imagi al mi la imponecon de la konstruejo de tiu ĉi akvomastruma kompleto!

甲：真壮观！如非眼见，这套水利工程的气派我是难以想象得出的！

B: Sed nun ni povas vidi nur parton de la tuta konstruo; iuj laboroj ĵus komenciĝis, ankoraŭ kelkaj ekiros venontjare.

乙：可是我们现在还只能看到整个工程的一部分呢；有的工作刚刚开始，有的明年才开始进行。

A: Tiel granda do estas la tuta konstruo!

甲：全部工程原来这么大！

B: Jes, krom la riverbaraĵo 70 metrojn alta, kaj 400 metrojn longa, ŝipokluzo por dek mil-tonelaj ŝipoj, kluzoj por forfluigi sablon kaj tralasi superbezonan akvon, hidroelektrejo kun kapacito de ĉ. miliono da kilovatoj, ni konstruos ankaŭ aliajn objektojn.

乙：是的，除了高七十米长四百米的拦河坝，可容万吨轮的船闸、冲沙闸和泄洪闸、装机容量百万千瓦的水电站，我们还要建设其它项目。

A: Nome kiujn?

甲：说说是什么项目呢？

B: Transformatoran stacion, administrejon, pontojn, fervojon, aŭtovojon, loĝdomojn, fabrikojn...

乙：变电站啦、管理处啦、桥梁、铁路、公路、住房、工厂.....

A: Ĉu ankaŭ fabrikojn?

甲：还要建工厂吗？

B: Jes, ĉar ĉi tie abundos je elektro kaj en la ĉirkaŭaĵo troviĝas diversaj riĉfontoj por disvolvi industrion.

乙：是的，因为这儿有的是电，在附近还有发展工业的各种资源。

A: Do formiĝos nova industria urbo.

甲：那么说将会形成一座新的工业城市了。

B: Moderna urbo kun parkoj, muzeoj, bibliotekoj, radiostacio, televida stacio, sciencaj institutoj, stadiono, hospitaloj, librejoj kaj ankaŭ universitato.

乙：一座具有公园、博物馆、图书馆、电台、电视台、科学研究所、体育场、医院、书店、还有大学的现代城市。

A: Ĝi havos ankaŭ poŝtejon, bankon, butikojn, hotelojn, infanĝardenojn, barbirejojn, tajloristajn butikojn, banejojn kaj aliajn servejojn, ĉu ne?

甲：还要有邮局、银行、铺子、旅馆、幼儿园、理发馆、裁缝店、浴室等等服务设施吧？

B: Kompreneble. Se mankus al ĝi restoracioj, kie la gastoj do prenu manĝon? Ankaŭ tetrinkejojn kaj kafejojn ni devas konstrui.

乙：当然。如果没有饭店，客人又到哪儿吃饭呢？我们还要建茶馆、咖啡馆。

A: Kiom da tempo oni bezonos por plenumi la nunan planon? Certe longe daŭros la konstruado. Eble jardekon?

甲：完成全部计划要多少时间呢？一定要很多时间吧？也许要十年？

B: Ne tiom longe. Se ni farus laŭ la malnova maniero, eĉ pli ol dek jarojn ni bezonus. Por pli bone kaj rapide konstrui, ni enkondukos novajn teknologiojn el fremdaj landoj kaj aplikos diversajn

modernajn maŝinojn.

乙：不用那么久。如果照老办法行事，也许要十年以上呢。为了建设得又好又快，我们从国外引进新工艺、采用现代机械。

A: Mi vidas, mi vidas. Gigantaj grupoj ŝvingadas siajn fortajn brakojn por levi pezaĵojn, kamionoj kaj buldozoj brue laboregas, ĉentransportiloj kaj rimentransportiloj liveradas necesajn materialojn al konstruistoj, betono estas verŝita al difinitaj lokoj per maŝino... multaj pezaj laboroj ne plu estas farataj permane.

甲：看到了，看到了。巨大的起重机在挥动着强有力的臂膀吊运重载，卡车和推土机在轰鸣奔忙，链式和皮带式的传送带在把需用的原料送到建筑者的身边，混凝土用机器浇注到了指定的地点.....许多重活都不用手工操作了。

B: Flanken! Jen alkuras kamionoj!

乙：靠边！瞧，卡车来了！

A: Kial ili portas tiel multe da U-ŝtaloj?

甲：干嘛它们运那么多槽钢呢？

B: Por konstrui ŝtalajn turojn de telfera (kablotransporta) linio.

乙：用以建造缆车运输线的铁塔。

A: Kiom da teraĵo kaj ŝtonoj oni devas movi por konstrui la akvomastruman kompleton?

甲：修建这套水利工程要动多少土石方？

B: Oni diras, ke la movataj teraĵo kaj ŝtonoj sufiĉas por konstrui muron kun alteco unumetra kaj larĝeco unumetra, tiel longan ke ĝi sufiĉas por ĉirkaŭi la terglobon ĉe la ekvatoro.

乙：据说土石方够修一条足以环绕地球赤道的高一米宽一米的墙。

A: Giganta laboro! Kaj ĝin plenumos la loĝantoj en tiuj moveblaj domoj.

甲：工程真大啊！这项工程将由住在活动房子的那些人完成。

B: Malaperos tiuj provizoraj domoj kaj ilin anstataŭos altaj etaĝdomoj, parko, infanĝardeno, restoracio...

乙：那些临时房屋将消失而代之以高层建筑、公园、幼儿园、饭店.....

A: Ĉu la konstruo de la baraĵo ne malhelpos la generadon de la fiŝoj, kiuj devas demeti ovojn en la supra parto de la fluo?

甲：水坝的建立不会妨碍需要在上游产卵的鱼儿的繁殖吗？

B: Ne, ĉar pri tio antaŭe oni jam faris necesajn aranĝojn.

乙：不会，因为关于这事人们早已作了必要的安排。

A: Ĉu oni ankaŭ bredos fiŝojn en la giganta akvorezervejo?

甲：也要在水库养鱼吗？

B: Jes, certe.

乙：是的，当然要养。

备用词语

skafaldo 脚手架, betonpreparilo 水泥搅拌机, fosmaŝino 挖土机, termezurado 测量土地, nivelilo 水平仪, mezurbendo 皮尺, bluplano 蓝图, ŝtaltrabo 钢梁, trusto 构架, asbesta tegolo 石棉瓦, armita betono 钢筋混凝土, bazfosaĵo 基坑, ramilo 夯, rampaliso 基桩, terŝutaĵo 填方, mortero 三合土, kalko 石灰, stupo 麻刀, stuko 灰泥, trulo 抹刀, briko 砖, tegolo 瓦, kahelo 瓷砖, marmoro 大理石, artefarita marmoro 人造大理石, ondlado 瓦楞铁, fajrrezista briko 耐火砖, peĉo 沥青, planko 地板, plafono 天花板, tegmento 屋顶, ĉevrono 椽子,

niĉo 壁龛, koridoro 走廊, perono 台阶, fasado 前山, kupolo 圆屋顶, turo 塔楼, portalo 门楼, soklo 基座, vando 隔断, kamentubo 烟囱, fundamento 基地, civila inĝenierado 土木工程, kameno 壁炉, fosto 柱子, trabo 梁, sojlo 门槛, pordo 门, fenestro 窗, baskula fenestro 活页窗, franca fenestro=pordofenestro 落地窗, blinda fenestro 假窗, duklapa fenestro 双扇窗, kadra fenestro 外边有铁框的窗子, pinaklo 尖顶, volbo 圆顶, belvedero 瞭望塔, verando 阳台, lifto 电梯, radiatoro 暖气包, klimatizilo 空调器, elevatoro 步电梯

34. LANDOJ, NACIOJ KAJ LINGVOJ 国家、民族和语言

A: En Ĉinio la hanoj konsistigas plejparton de la loĝantaro, tamen la nacimalplimultoj vivas sur relative vastega parto de la lando. Ĉu vi scias, kiom da nacimalplimultoj ekzistas en via lando?

甲：汉族是中国居民的绝大部分，可是少数民族生活在较为广大的地区。您知道你们国家有多少少数民族吗？

B: Jes, pli ol kvindek.

乙：知道，有五十多个。

A: Kiel ili nomiĝas?

甲：他们叫什么名字？

B: Ili nomiĝas acangoj, bajoj, baŭanoj, bujioj, ĉjangoj, dahuroj, gaŭŝanoj, ĝingpooj, ĝuangoj, halhazoj, hanoj, huoj, jaŭoj, jioj, kazaĥoj, lioj, lisuoj, manĉuroj, mjaŭoj, mongoloj, naŝioj, nuoj, olunĉunoj, pumioj, rusoj, salaoj, sibooj, sujoj, taĝikoj, tajoj, tataroj, tibetanoj, tuĝjaoj, tuoj, ujguroj, uzbekoj kaj... bedaŭrinde mi ne memoras ĉiujn nomojn de ili. Vi povas trovi ilin en vortaro.

乙：他们叫阿昌族、白族、保安族、布依族、羌族、达斡尔族、高山族、景颇族、僮族、柯尔克孜族、哈尼族、回族、瑶族、彝族、哈萨克族、黎族、傈僳族、满族、苗族、蒙古族、纳西族、怒族、鄂伦春族、普米族、俄罗斯族、撒拉族、锡伯族、水族、傣族、塔吉克族、藏族、土家族、塔塔尔族、维吾尔族、乌孜别克族.....可惜我记不全名字，可以在词典里找到。

A: Ĉu troviĝis membroj de nacimalplimultaj inter la partoprenantoj de la Unua Ĉina Kongreso de Esperanto okazinta en aŭgusto, 1985?

甲：1985年8月份举行的第一届中国世界语大会有少数民族成员参加吗？

B: Jes.

乙：有。

A: Kiom? Kaj el kiuj naciecoj?

甲：有多少？是哪些民族？

B: Ok manĉuroj, sep huoj, sep ujguroj, kvin ĝuangoj, kvar mongoloj, tri bajoj, unu maŭnana, unu mjaŭo, unu koreo, unu tibetano, unu hano, unu naŝio, unu jio kaj unu tuĝjao, entute kvardek du personoj el dek kvar nacimalplimultoj.

乙：有8名满族、7名回族、7名维吾尔族、5名僮族、4名蒙古族、3名白族、1名毛难族、1名苗族、1名哈尼族、1名纳西族、1名彝族、1名土家族，一共42人来自14个少数民族。

A: Tio signifas, ke al du trionoj de la ĉinaj nacimalplimultoj ankoraŭ mankas esperantistoj, ĉu ne?

甲：那就是说中国三分之二的少数民族还没有世界语者喽。

B: Ne, ĉar la kongresanoj ne estas elektitaj kiel reprezentantoj de la naciecoj.

乙：不，因为大会会员不是作为民族代表而选出来的。

A: Ĉu ĉiuj naciecoj de Ĉinio havas skriban lingvon?

甲：中国的民族都有文字吗？

B: Ne ĉiuj. Kelkaj ankoraŭ ne. Iuj ekhavis sian skriban lingvon nur post la Liberiĝo dank' al helpo de la popola registaro.

乙：不，有几个还没有。有的在解放后才在人民政府帮助下有了自己的文字。

A: Ĉu ĉiuj ĉinoj scias la hanan lingvon?

甲：中国人都会汉语吗？

B: Ne, multaj nacimalplimultaj popolanoj scipovas nur la lingvon de sia nacieco.

乙：不，许多少数民族成员只会本民族的语言。

A: Do lingva malfacilo ekzistas ankaŭ en Ĉinio kiel en nia lando.

甲：那么说来中国也和我们国家一样存在语言上的困难。

B: Jes. Eĉ la hanoj ne povas facile interkompreniĝi pro diferencoj inter la dialektoj.

乙：是的。就是汉族也因为方言的不同而不易互相了解。

A: Kial do?

甲：为什么？

B: Ĉar ekzistas multaj dialektoj de la hana lingvo. Ekzemple, la kantonanoj parolas dialekton tute nekompreneblan por pekinanoj. Foje oni devas sin helpi per la skriba lingvo komuna por la hanoj.

乙：因为汉语有许多方言，例如广州人讲的是北京人完全听不懂的一种方言。有时不得不用汉族共同的文字来解除困难。

A: La esperantistoj povas utiligi ankaŭ Esperanton, ĉu ne?

甲：世界语者也可以用世界语喽？

B: Jes ja. Dum la landa kongreso mi povis facile interkompreniĝi eĉ kun ujuguroj per internacia helpa lingvo.

乙：那当然啦。全国大会期间，我用国际辅助语甚至可以和维吾尔族顺利交谈。

A: Kaj dum la 71-a Universala Kongreso en Pekino ni spertis pli grandan utilon de nia lingvo, ĉar en ĝi kolektiĝis homoj el pli ol kvindekoj da landoj kun centoj da lingvoj.

甲：北京第七十一届国际世界语大会期间，我们体会到世界语更大的用途，因为那里有讲着数百种语言的来自五十多个国家的人聚会。

B: Jes.

乙：是的。

A: Kiom da esperantistoj aliĝis al la 71-a UK? El kiuj landoj?

甲：有多少人报名参加七十一届大会？都是哪些国家？

B: Pli ol du mil sin anoncis, sed mi ne scias el kiuj landoj ili estas. Kredeble multaj estas el Japanio kaj la eŭropaj landoj Germanio, Francioj, Britio, Nederlando, Svedio, Hungario, Bulgario Ĉeĥoslovakio, Pollando, Svisio, Latvio, Estonio k.a., kie estas vigla movado de Esperanto.

乙：两千多人报了名，我可不知道他们是哪些国家的。想必有许多人来自日本以及欧洲的国家，德国、法国、英国、荷兰、瑞典、匈牙利、保加利亚、捷克、波兰、瑞士、拉脱维亚、爱沙尼亚等等，那儿的世界语运动活跃。

A: Vi jam invitis la UK en 2004 al Pekino. Kvankam Ĉinio estas tre malproksima de Eŭropo, tamen ĝi certe altiros al si multajn eŭropanojn.

甲：你们已经申办 2004 年的国际世界语大会。虽然中国离欧洲很远，但它会吸引很多欧洲人来的。

B: Certe la ĉinaj esperantistoj ĝojos pro la ŝanco donota de la UK por kontaktiĝi, interkonatiĝi kaj amikiĝi kun multaj eksterlandanoj en servo al paco.

乙：中国世界语者能有国际世界语大会的机会接触结识许多外国朋友，为和平服务，我们当

然很高兴。

A: Same ni ĝojas pro la komuna kaŭzo.

甲：我们同样为这共同的目的而高兴。

B: Por pli bone utiligi Esperanton, ni devas ne nur energie ĝin disvastigi sed ankaŭ diligente studi.

乙：为了更好地用世界语，我们不仅要大力推广它，还要用功学习研究。

A: Vi tute pravas.

甲：您说得很对！

备用词语

A. 国家名称

Afganio 阿富汗, Albanio 阿尔巴尼亚, Alĝerio 阿尔及利亚, Argentino 阿根廷, Aŭstralio 澳大利亚, Aŭstrio 奥地利, Belgio 比利时, Bengaldeŝo 孟加拉, Brazilo 巴西, Birmo 缅甸, Britio 英国, Bulgario 保加利亚, Ĉeĥio 捷克, Ĉilio 智利, Danlando 丹麦, Finnlando 芬兰, Francio 法国, Germanio 德国, Hindia Unio 印度, Hispanio 西班牙, Hungario 匈牙利, Indonezio 印度尼西亚, Irano 伊朗, Irlando 爱尔兰, Israelo 以色列, Italio 意大利, Japanio 日本, Jugoslavio 南斯拉夫, Kamboĝo 柬埔寨, Kamerunia Respubliko 喀麦隆共和国, Kanado 加拿大, Kolombio 哥伦比亚, Kongo 刚果, Korea Respubliko 韩国, Koreia Popola Respubliko 朝鲜人民共和国, Kostariko 哥斯达黎加, Kroatio 克罗地亚, Kubo 古巴, Laoso 老挝, Lebano 黎巴嫩, Libio 利比亚, Luksemburgo 卢森堡, Malagasa D. N. 马拉加什, Malajzio 马来西亚, Malto 马耳他, Meksikio 墨西哥, Mongolio 蒙古, Mozambiko 莫桑比克, Nederlando 荷兰, Nepalo 尼泊尔, Niĝerio 尼日利亚, Nikaragvo 尼加拉瓜, Norvegio 挪威, Novzelando 新西兰, Pakistano 巴基斯坦, Peruo 秘鲁, Pollando 波兰, Portugalio 葡萄牙, Rumanio 罗马尼亚, Rusio 俄罗斯, Salvadoro 萨尔瓦多, Sanmarino 圣马力诺, Singapuro 新加坡, Slovakio 斯洛伐克, Eksa Sovetunio 前苏联, Srilankao 斯里兰卡, Sud-Afriko 南非, Sudano 苏丹, Svedio 瑞典, Svislando 瑞士, Tajlando 泰国, Tanzanio 坦桑尼亚, Togolando 多哥, Tunizio 突尼斯, Turkio 土耳其, Urugvajo 乌拉圭, Usono 美国, Venezuelo 委内瑞拉, Vjetnamio 越南, Zairo 扎伊尔, Zambio 赞比亚

B. 中国民族名（补充）

aĉango 阿昌族, bujio 布依族, bulango 布朗族, benglungo 崩龙族, dungo 侗族, dulungo 独龙族, gaŭŝano 高山族, golaŭo 仡佬族, heĝeo 赫哲族, juguro 裕固族, kavao 佯僳族, lahuo 拉祜族, molaŭo 仫佬族, nuo 怒族, ovenkeo 鄂温克族, salao 撒拉族, siboo 锡伯族, sujo 水族, ŝeo 畲族, tuo 土族, ĝingo 京族, lobao 珞巴族, menbao 门巴族, pumio 普米族, ĝinoo 基诺族

C. 语言

(la) angla (lingvo) 英语, araba 阿拉伯语, bengala 孟加拉语, ĉeĥa 捷克语, ĉina 中文, franca 法语, germana 德语, hispana 西班牙语, japana 日语, latina 拉丁语, persa 波斯语, portugala 葡萄牙语, urdua 乌尔都语, rusa 俄语, serba 塞尔维亚语, svahila 斯瓦西里语, taja 泰语, slovaka 斯洛伐克语, kroata 克罗地亚语, sanskrita 梵语, finna 芬兰语, islanda 冰岛语, greka 希腊语, rumana 罗马尼亚语, hungara 匈牙利语, itala 意大利语, pola 波兰语, sveda 瑞典语

35. AMUZA VESPERO 文娱晚会

A: Ĉu vi scias, kion oni prezentos ĉi-vespere?

甲：您知道今晚表演什么节目？

B: Oni diras, ke hodiaŭ ni havos aparte belajn programerojn, ĉar oni sukcesis inviti profesiajn artistojn.

乙：据说今晚节目特别好，因为邀请到了专业艺术工作者。

A: Nome, kiajn?

甲：说说都是什么人？

B: Kantistojn, dancistojn, muzikistojn, eĉ ankaŭ magiistojn kaj akrobatojn.

乙：有歌唱家、舞蹈家、音乐家，甚至还有魔术师和杂技演员呢。

A: Ĉu vi scias la programon?

甲：您知道节目有什么吗？

B: Ne. Mi demandu k-dinon Lin, kiu agos kiel anoncistino.

乙：不知道。我去问问林同志吧，她是报幕员。

A: Ne ĝenu ŝin, tuj komenciĝos la prezentado, kaj ni vidos ĉion per la okuloj.

甲：不要麻烦她，演出就要开始了，我们看得到的。

B: Iom tro longa estas la enkonduka parolo. Ĉu tio necesas?

乙：开场白太长了，有此必要吗？

A: Tiu ĉi amuza vespero estas speciale aranĝita por la gastoj, kompreneble oni devas iom paroli ankaŭ pri la graveco de internacia helpa lingvo kaj la amikeco kaj paco...

甲：这个文娱晚会是特别为客人举行的，当然也要谈谈国际语的重要性、友谊、和平.....

B: Tamen oni ja povus iom mallongigi la parolon, ĉu ne?

乙：可是总可以把话说得短一点呀，是不？

A: Jes, vi pravas. Ankaŭ mi ne ŝatas tro longajn paroladojn.

甲：是，您说得对。我也不喜欢太长的讲话。

B: Ŝŝ! Oni ekkantos!

乙：嘘！要唱了！

A: Ŝia voĉo estas tre dolĉa, kaj ŝi kantis kun profunda kompreno de la vortoj.

甲：她的声音真甜，她唱歌对歌词有深刻的理解。

B: Jen, la sopranulinon sekvas basulo. Kiel plaĉas al vi lia kanto?

乙：瞧，女高音随后是男低音。您喜不喜欢他的歌声？

A: Potencan bason mi ŝatas eĉ pli multe. Ĉu ankaŭ tenorulon oni invitis?

甲：我更喜欢有力的男低音。也请得有男高音歌手吗？

B: Ŝajne ne. Jen, vidu, ekludos akrobatoj!

乙：似乎没有。瞧，要表演杂技了！

A: Kiel vi eksciis pri tio?

甲：您怎么知道的？

B: Jen, oni alportis eskalon, specialan eskalon de akrobatoj.

乙：瞧，搬来梯子了，杂技演员专用的梯子。

A: Do oni prezentos grimpadon sur la eskalo sen apogi ĝin al muro.

甲：那么说是要表演悬空爬梯子了。

B: Ho, ne! Vidu, la viro metis la eskalon sur sian ŝultron. La knabino ascendas supren—ŝi atingas la supron.

乙：啊，不是的！瞧，男子把梯子放在了自己的肩头。姑娘在往上爬——到顶了。

A: Ankaŭ tio ne estas mirindaĵo... ŝi faras transkapiĝon! Ekfalas!—ho, mirinde! Mi timis, ke ŝi fuŝus kaj falus, sed ŝi intence ŝajnis fuŝon por timigi nin.

甲：这也没有什么稀奇……她翻筋斗了！掉下来了——哎呀，真了不起！我怕她失误了，要跌下来，她是假装的，吓唬我们。

B: Vere lerta ŝi estas!

乙：她真棒！

A: Humura dialogo! Ĉu vi konas la prezentantojn?

甲：相声！您认得演员吗？

B: Ili estas lernantoj el la konversacia kurso.

乙：他们是会话班的学员。

A: Talentuloj ili estas! Kun tiaj lerteco kaj aplombo ili agadis, kvazaŭ ili estus profesiaj humurdialogistoj.

甲：他们有才华！表演得那么娴熟，镇定自若，仿佛是职业相声演员似的。

B: Jen, muzikistoj venas kun siaj instrumentoj.

乙：瞧，音乐家们带着乐器来了。

A: Kiel vi opinias pri la ĵus aŭditaj arioj?

甲：您觉得刚刚听过的几首曲子怎么样？

B: Ĉiu el ili havas sian apartan ĉarmon. La popola muziko de la Interna Mongolio karakteriziĝas per longe tirataj tonoj, simbolantaj la vastecon de la stepo. La melodioj de Yunnan-provinco jen subite leviĝas, jen abrupte malaltiĝas, prezentante sonan bildon de regiono kun altaj montoj kaj profundaj valoj.

乙：它们各有各的美妙之处。内蒙古的民乐，以拖长的音符为特点，象征着草原的辽阔，云南的曲调忽高忽低，呈现出一种高山深谷的音乐图画。

A: Mi same tiel pensas. La viglaj kaj mildaj melodioj de la provincoj Jiangsu kaj Zhejiang similas susuran brizon inter floroj kaj murmuron rojon tra rizkamparo. Aŭskultante ilin mi kvazaŭ sentus aromon de fruktoj kaj grenplantoj en tiu riĉa regiono.

甲：我也这么认为。江苏省和浙江省的活泼柔和的曲调，像花丛中的飒飒和风，像稻田里的潺潺流水，听着音乐我就仿佛闻到了那个富足地区的水果和庄稼的芳香。

B: Rigardu, magiisto ludas per briĝaj kartoj. Kiu kuraĝus ludi briĝon kun tia homo, kiu povas havigi al si kartojn laŭ sia volo?

乙：瞧，魔术师在变扑克牌。谁敢和这种能够随意弄到什么牌的人玩桥牌呢？

A: Ĉu vi ŝatas ludi briĝon?

甲：您喜欢玩桥牌吗？

B: Ne, mi tute ne scipovas.

乙：不，我根本不会。

A: Kaj ŝakon?

甲：象棋呢？

B: Nur iomete. Mi pli ŝatas vejĉi-on. (Japanoj nomas vejĉion goo.)

乙：只会一点。我更喜欢围棋（日本人称围棋为 goo）。

A: Ankaŭ mi. Do ni iru ludi vejĉi-on.

甲：我也是。我们去下围棋吧。

B: Bone. Sed preferu ni iru post la solo de bivo. Oni diras, ke la ludisto estas tre fama tra la tuta lando.

乙：好吧。可是在琵琶演奏之后再，据说演奏者全国驰名。

A: Do bone.

甲：那好。

备用词语

A. 音乐

solo 独唱, ĥoraĵo 合唱, kantato 大合唱, simfonio 交响乐, dueto 二重奏, trieto 三重奏, kvarteto 四重奏, kvinteto 五重奏, sesteto 六重奏, nacia muziko 民乐, okcidenta muziko 西乐, valso 华尔兹, serenado 小夜曲, romanco 抒情曲, akompani 伴奏, baritono 男中音, meza soprano 女中音, kontralto 女低音, kolora soprano 花腔女高音, uverturo 序曲, sonato 奏鸣曲, preludo 前奏, ĵazo 爵士乐, leĝera muziko 轻音乐, etudo 练习曲, orkestro 管弦乐队, rapsodio 狂想曲, konĉerto 协奏曲, recitativo 宣叙调, takto 节拍, unisono 齐唱, marŝo 进行曲, lulkanto 摇篮曲, mandolino 曼陀铃, violono 小提琴, aldo 中音提琴, violonĉelo 大提琴, gitaro 吉他, piano 钢琴, trombono 长号, saksofono 沙克风, akordiono 手风琴, buŝharmoniko 口琴, franca korno 法国号, balalajko 三角琴, trikordo 三弦, tamburo 鼓, timpano 定音鼓, gongo 锣, cimbalo 钹, citro 七弦琴, liuto 诗琴, fagoto 低音木琴, harpo 竖琴, ksilofono 木琴, liro 古琴, ŝalmo 牧笛, tamburino 手鼓, perkut-instrumentoj 打击乐器, plukinstrumentoj 弹拨乐器, kordinstrumentoj 弦乐器, blovinstrumentoj 吹奏乐器

B. 舞蹈

baletto 芭蕾舞, fandango 西班牙民间舞蹈, polko 波尔卡, valso 华尔兹, tango 探戈舞, kvadrilo 四对舞, mazurko 玛佐卡舞, popoldanco 民间舞蹈, koregrafo 编舞者

C. 游戏、杂耍

ĵigo 组画游戏, kaŝludo 捉迷藏, keĝlaro 九柱戏, balancĉevalo 木马, karuselo 旋转木马, gantpupoj 布袋木偶, fajraĵo 焰火, raketo 火箭, petardo 爆竹, ludkarto 纸牌, pokero 扑克, kero 红桃, karoo 方块, trefo 草花, piko 黑桃, bubo 杰克, reĝo 大王, atuto 王牌, partio 一局, paradizludo (hopludo) 跳间, dratirado 走钢丝

36. KINEJO KAJ TEATRO 电影院和戏院

A: Antaŭe ĉi tie estis malgranda teatro por la pekina opero. Ĝi eĉ havis loĝiojn kvankam ĝi havis malpli ol kvincent sidlokojn. Multekostaj estis ĝiaj eniraj biletoj.

甲：从前这儿是一座小京剧院。虽然不到五百个座位，它还有包厢呢。它的门票很贵。

B: Ĉu vere?

乙：真的吗？

A: Jes. Post la Liberiĝo ĝi estis rekonstruita kaj pligrandigita. Sed nun moderna teatro pekinopera estas konstruita ĉe la orienta parto de la strato kaj ĝi portas la malnovan nomon.

甲：是的。解放后经过了重修扩建。现在在大街东边建设了一座现代化的京剧院，仍然用它旧的名字。

B: Ĉu ĝi estas uzata nur por prezenti pekinajn operojn?

乙：它只演京剧吗？

A: Ne, oni ludas en ĝi ankaŭ baletojn, dramojn, kaj operojn pingĝju, kunĉju kaj aliajn lokajn

operojn kiel bangzi, çinçjang, hūagudeng k.a. Foje oni ludis ankaŭ okcidentajn klasikajn operojn.
甲：不，它也演芭蕾舞剧、话剧、评剧、昆曲以及梆子、秦腔、花鼓灯等地方剧。有时还演过西方古典歌剧呢。

B: Ĉu ankaŭ filmojn oni ludas en ĝi?

乙：这儿也演电影吗？

A: Ne, ĉar ne malproksime de ĝi troviĝas kinejo sufiĉe bona.

甲：不演，因为不远的地方有一座相当好的电影院。

B: Verdire mi pli ŝatas rigardi filmojn, precipe kolorajn larĝekranajn filmojn. Ili ĝuigas la spektantojn kaj per bildoj kaj per muziko kaj per detaloj kiujn la dramoj aŭ operoj ne povas prezenti al la rigardantoj.

乙：说真的我更喜欢电影，特别是彩色宽银幕影片。它们使观众既可以欣赏到画面又可以欣赏到音乐，还可以看到话剧、歌剧所不能表现的细节。

A: Iuj opinias, ke televido anstataŭos ĉion, kaj teatron kaj kinejon.

甲：有人认为电视将代替一切，既代替剧院，也代替电影院。

B: Iasence tio estas vero, pli kaj pli multaj hejmoj havas koloran televidilon kaj multaj preferas rigardi filmojn kaj teatraĵojn hejme. Sed en modernaj teatroj kaj kinejoj oni ne nur povas ĝui pli belan prezentadon, sed ankaŭ diversajn servojn.

乙：在某种意义上说真是这样，越来越多的人家有了彩色电视机，许多人宁愿在家里看电影、看戏。不过在新式剧院和电影院里人们不仅可以享受更美的演出，而且还有各种服务。

A: Vi pravas. Nun en la kinejo oni projekcias stereofilmojn. La televido ja ne povas prezenti tian spektaklon.

甲：您说得对。现在电影院正在上映立体电影。电视是不能演出这种节目的。

B: Tamen oni jam komencis krei ankaŭ aparatojn por stereotelevido.

乙：不过人们已经开始创立立体电视设备了。

A: Tio estas novaĵo por mi.

甲：这对我可是新闻！

B: Ĉu ĉi tie oni ludis ankaŭ pupteatraĵojn?

乙：这儿也演过木偶戏吗？

A: Ne, neniam. Ĝi estas tro granda por tio. Kutime oni ludas pupteatraĵojn en malgrandaj porinfanaj teatroj speciale konstruitaj por tio.

甲：没有，从未演过。演木偶戏这剧院太大了。习惯上是在专为演木偶戏而修建的儿童剧院来演木偶戏的。

B: Mi aŭdis, ke pupteatra trupo de Quanzhou faris turneon al via urbo kaj faris prezentadon kun brila sukceso. Kie do okazis ĝia ludado?

乙：我听说泉州有个木偶剧团曾来您市巡回演出，非常成功。它是在哪儿演出的？

A: En la Infana Teatro. Tiu trupo ludis marionetojn movatajn per fadenoj anstataŭ sakpupojn kaj stangete manipulatajn pupojn.

甲：在儿童剧院。该团演的是提线木偶，不是布袋木偶或杖头木偶。

B: Mi neniam vidis tian pupteatraĵon. Ĉu la agado de tiaj pupoj estas delikataj kaj versimilaj?

乙：我从未看过那种木偶戏。那种木偶的动作细腻逼真吗？

A: Jes. Por bone ludi pupteatraĵon, la artistoj devas ne nur esti lertaj en manipulado de la pupoj, sed ankaŭ diligente studi por bone koni la diversajn karakterojn de la ludataj roloj kaj la koncernan socian vivon, la koncernajn kutimojn kaj morojn.

甲：细腻逼真。要演好木偶戏，演员们不仅要会灵巧地操纵木偶，还得勤奋研究掌握扮演的

角色的性格，了解有关的社会生活和风俗习惯。

B: Kompreneble. Ilia tasko estas ne pli facila ol tiu de operaj kaj dramaj aktoroj.

乙：当然。他们的任务并不比歌剧或话剧演员更容易。

A: Jen la anoncistino aperas. Ŝŝ! Aŭskultu ŝin.

甲：报幕员出场了。嘘！听她说什么。

B: Ŝi havas ne nur belan aspekton sed ankaŭ belan voĉon.

乙：她不仅漂亮，嗓子也很好。

A: Ankaŭ la anoncistino estas grava, ĉar ŝi donas la unuan impreson pri la prezentado.

甲：报幕员也很重要，因为演出的第一印象就是她。

B: Jes. Ankaŭ la laborantoj post la kuliso plenumas gravan parton de la prezentado: la ŝminkistoj, la dekoraciistoj, la sufloristo...

乙：是的。后台工作人员也做着重要的演出工作：化妆师、布景员、提词员.....

A: La rekvizitisto, la direktoro, la reĝisoro, la manipulantoj de lumoj, magia lanterno kaj magnetofono... Nur dank' al ilia harmonia kunagado povas sukcesi la prezentado.

甲：道具保管员、导演、舞台监督、灯光、幻灯、录音机操作人员.....只有他们协同配合演出才能成功。

B: Vere. Ankaŭ magia lanterno estas grava por moderna dekoracio. Jam komenciĝis la unua sceno de la unua akto. Ĉu vi scias, kiu ludos la rolon de Hamleto?

乙：的确是。在现代布景中幻灯也十分重要。第一幕第一场开始了。谁扮演哈姆雷特呢？

A: Du aktoroj ludas la saman rolon. Sinjoro Lin estas rolulo A kaj sinjoro Sun rolulo B. Hodiaŭ ludos rolulo B.

甲：两个演员同演这个角色。林先生 A 角，孙先生演 B 角。今天 B 角扮演。

B: La kostumoj estas bone faritaj, sed la senfadenaj mikrofonoj ŝajne funkcias ne tre kontentige.

乙：服装不错，可是无线话筒似乎不能令人满意。

A: Antaŭe oni ne uzis megafonojn, sed por tiel vasta teatro, oni nepre devas uzi laŭparolilojn. Alie la voĉoj de la aktoroj eĉ ne povus atingi la spektantojn en la lasta vico de la parteroj.

甲：以前不用扩音器，可是这么大的剧场就必须用扩音设备。不然的话演员的声音就达不到末排的观众。

B: Ĉu vi ŝatas tragedion?

乙：您爱看悲剧吗？

A: Jes. Tamen ankaŭ komediojn mi ne malŝatas, ekzemple La Revizoron mi rigardis plurfoje.

甲：爱看。不过我也爱看喜剧，例如《钦差大臣》我就看了好几次。

B: Ŝŝ! Ni ĉesu babili!

乙：嘘！我们不要说了！

备用词语

A. 电影

filmstudio 电影制片厂, scenaro 电影剧本, kinoaktoro 电影演员, stelo 明星, dokumenta filmo 纪录片, popularscienca filmo 科教片, aktualaj filmo 事实片, desegna filmo 动画片, pupa filmo 木偶片, larĝekrana filmo 宽银幕电影, projekcia aparato 放映机, filmi 拍电影, romano adaptita al la ekrano 小说改编的电影, dublita filmo 配音片、译制片, muntisto 剪辑(者), kameraisto 摄影师, bobeno da filmo 一本(片子), truko 特技

B. 戏剧

tragedikomedio 悲喜剧, melodramo 民间闹剧, farso 闹剧, pantomimo 哑剧, unuakta dramo 独幕剧, historia dramo 历史剧, repertuaro 剧目, ŝtata teatro 国家剧院, aktorino 女演员, alivesti 化妆, provludi 排练, ĉarlatano, arlekeno, klaŭno, pajaco 丑角, burleskulo 滑稽演员, histriono 插科打诨的低级趣味的演员, impresario (经营演出的) 经理、老板, monologo 独白, dialogo 对白, prologo 开场白, epilogo 尾声, kurteno (falas) 幕落, aplaŭdi 鼓掌, prifajfi 吹口哨 (表示不欢迎), debuti 初次登台, sensacia efekto 轰动, furora aktoro 走红的演员, improvize ludi 即席表演, intrigo de dramo 剧情

37. VIZITO AL MUZEO 参观博物馆

A: Oni diras, ke la vorto muzeo devenis de la vorto Muzo, ĉu vere?

甲: muzeo (博物馆) 一词是由 Muzo (缪斯) 这个词转成的, 是真的吗?

B: Jes. Laŭ helena mitologio ekzistas naŭ Muzoj, kiuj estas diinoj inspirantaj la sciencistojn kaj artistojn, nome: Erata pri amliriko, Eŭterpa pri muziko, Kaliopa pri eposo, Klia pri historio, Melpomena pri tragedio, Talia pri komedio, Polimnia pri altliriko, Terpsikora pri danco kaj Urania pri astronomio. En antikva Grekio templo por la Muzoj, aŭ Muzo-domo estis nomata museion, kaj el tiu vorto devenis la vorto muzeo.

乙: 是真的。根据希腊神话有九位缪斯女神, 她们给科学家和艺术家以灵感, 她们是司爱情诗的娥拉托、司音乐的欧特尔帕、司史诗的卡利娥帕、司历史的克利娥、司悲剧的摩尔泼墨娜、司喜剧的塔丽亚、司雅诗的帕丽尼亚、司舞蹈的特尔菩西珂拉、司天文的乌拉尼亚。古希腊缪斯的庙, 或者说缪斯的府, 叫做 museion, 就从这个词产生出了 muzeo 这个词。

A: Dankon pro via klarigo!

甲: 谢谢您的解说。

B: Ne dankinde. En nia urbo troviĝas pluraj muzeoj: la Nacia Historia Muzeo, la Belarta Muzeo, la Natura Muzeo, la Geologia Muzeo, la Muzeo de Revolucia Historio, Muzeo pri Revolucia Milito kaj kelkaj muzeoj pri eminentaj personoj.

乙: 不谢。本市有多座博物馆: 有国家历史博物馆、美术博物馆、自然博物馆、地质博物馆、革命历史博物馆、革命军事博物馆, 还有杰出人物的博物馆。

A: Ĉu troviĝas ankaŭ muzeoj pri modernaj teknologioj?

甲: 也有关于现代工艺的博物馆吗?

B: Jes. Tiaj muzeoj servas kiel lernejoj por popularigi teknikajn sciojn al la popolamasoj.

乙: 有的。那种博物馆是向群众普及技术知识的学校。

B: Jen, ni alvenas al la historia muzeo. Bonvole eniru. Biletojn mi jam aĉetis antaŭe.

乙: 瞧, 我们到了历史博物馆了。请进吧。票我已经预购了。

A: Ĉu ni povus havigi al ni ĉiĉeronon?

甲: 我们可以请个向导吗?

B: Servon de ĉiĉerono ni ne bezonas, ĉar mi mem servadis ĉi tie, volonte mi vin helpos laŭ bezono.

乙: 我们用不着向导, 因为我在这儿工作过, 愿为您效劳。

A: Tre bone! El kiom da eksponaj salonoj konsistas la muzeo?

甲: 好极了! 博物馆有几个展厅?

B: Ĝi konsistas el tri sekcioj en sep eksponejoj, aŭ eksponaj salonoj laŭ via diro.

乙: 它由三个部分组成, 分为七个展室, 或者照您的说法, 有七个展厅。

A: Kiuj estas la tri sekcioj?

甲：三个部分都是什么？

B: Sekcio pri prahistorio, sekcio pri antikva historio kaj sekcio pri moderna historio.

乙：它们是史前部分、古代史部分和现代史部分。

A: Ĉu la fosilioj kaj antikvaj moneroj kaj instrumentoj estas veraj aŭ imitaĵoj?

甲：那些化石、古钱和古代器具是实物还是仿制品？

B: Iuj el ili estas veraj; aliaj imitaĵoj.

乙：其中有些是实物，有些是仿制品。

A: Kredeble oni timas perdon de la valoregaj historiaj trezoroj.

甲：想必人们害怕丢失价值连城的历史宝物了。

B: Por bone konservi delikatajn historiajn restaĵojn oni devas ilin gardi sub plej sekuraj kondiĉoj.

乙：为了保存好娇气的文物，需要在最安全的条件下加以保存。

A: Por krei la imitaĵojn oni devas havi lertajn metiartistojn, ĉu ne?

甲：要制作仿古物品就需要能工巧匠不？

B: Jes. Kaj ankaŭ sciencistojn por fari necesajn esplorojn.

乙：是的。而且也需要科学家进行必要的研究工作。

A: Mi ne komprenas, kiel la arkeologoj povas restarigi frakasitajn porcelanaĵojn kaj terakotaĵojn. Certe tio estas afero terure temporaba.

甲：我不明白，考古家怎么能恢复打碎了的陶瓷物品。那一定是极费功夫的啦。

B: Por prifosado kaj restarigo de antikvaĵoj, oni bezonas ne nur paciencon kaj zorgemon sed ankaŭ riĉan historian scion.

乙：发掘和复原古物不仅需要耐心、细心，而且需要丰富的历史知识。

A: Kompreneble. Nur dank' al klopodado de la sindonemaj arkeologiaj laborantoj nun ni povas tiel facile akiri sciojn historiajn.

甲：当然啰。多亏考古工作者忘我地努力工作，我们才能那么轻而易举地取得历史知识。

B: Prave. Ni devas danki la arkeologojn, kaj ankaŭ la muzeajn laborantojn.

乙：说得对。我们应该感谢考古学家，也应该感谢博物馆的工作人员。

Muzea laboranto: Ni dankas la disciplinajn vizitantojn, sen kies kunago ni ne povus tiel bone plenumi nian taskon. Sen vizitantoj, nia laboro signifus nenion.

博物馆馆员：我们感谢循规蹈矩的观众，不是他们协作我们就不能很好地完成工作任务。没有观众，我们的工作也就没有什么意义。

A: Jen estas kelkaj skulptaĵoj kaj pentraĵoj, vere belegaj. Ĉu mi rajtus fari fotojn?

甲：瞧，有几座雕塑和绘画，真好看极了。我可以照相吗？

B: Por tion fari vi devas aĉeti apartan bileton.

乙：要照相得单另买票。

A: Do, mi aĉetu bileton por fotado.

甲：那我买张摄影的票好了。

B: Ĉe la enirejo troviĝas butikoj de memoraĵoj. Tie oni vendas albumojn kaj ilustritajn poŝtkartojn pri la muzeo kaj ĝiaj gravaj eksponaĵoj.

乙：进口处有个卖纪念品的商店。那儿卖关于这座博物馆及其重要展品的画册和图画明信片。

A: Ĉu ankaŭ trinkaĵon oni vendas tie? Mi iom laciĝis kaj soifas.

甲：也卖饮料吗？我有点累，也有点渴。

B: Ankaŭ mi bezonas ripozon. Do ni daŭrigu la rigardadon post ripozo.

乙：我也要休息休息。就等休息之后再看看吧。

备用词语

faksimilo 摹本, stando 摊位, originalo 原作, vitrino 玻璃橱, enkadrigi, kadri 加框, gipsa reprodukto 石膏复制品, ekspertizi 鉴定, determini la tempon 鉴定年代, fotokopio 影印本, bronzaĵo 青铜器, trikoloraj porcelanaĵo de Tang-dinastio 唐三彩, bludeseĝnaj porcelanaĵoj 青花瓷, terakotaj figuroj de soldatoj kaj ĉevaloj 兵马俑, arkitekturo ĉinstila 中式建筑, gotika 歌德式的, romantika 罗马式的, baroka 巴洛克式的, grafikaĵo 图表, etiketo 标签, unika 独一无二的, prifosado 发掘, giĉeto 窗口, kiosko 商亭, historia heredaĵo 历史遗产, dinastio 朝代, mezepoko 中世纪

38. FOTADO 照相

A: Bonan tagon, sinjorino! Ni volas, ke vi nin fotu.

甲: 日安女士! 我们要照相。

B: Bonan tagon! Vi estas bonvenaj.

乙: 日安! 那好嘛。

A: Bonvolu montri al ni specimenojn de viaj laboraĵoj.

甲: 请把样品给我们看看。

B: Jen albumo. Kaj grandformatajn fotojn vi povas vidi en la apuda ĉambro.

乙: 这是相册。隔壁房间有大幅照片。

A: Unue, faru por mi foton individuan, en sidpozo.

甲: 先给我照一张个人的坐相。

B: Ĉu vi volas helan aŭ malhelan fonon?

乙: 您要亮的背景还是暗的背景?

A: Mi preferus havi dekoracion, se taŭgan vi havus.

甲: 要有合适的布景, 我愿意要布景。

B: Ni havas dekduon da dekoraciaj pentraĵoj. Vi povas elekti laŭ via gusto.

乙: 我们有十二种画的布景, 可任您挑选。

A: Ĉu spegulon kaj kombilon vi havas?

甲: 您有镜子和梳子吗?

B: Jes, vi povas tion trovi en la tualetejo. Ankaŭ diversajn kostumojn ni havas por la klientoj. Ĉu vi ŝatus esti fotita en kostumoj de nacimalplimulto aŭ antikvuloj?

乙: 有, 在化妆室里。我们还给顾客备有各种服装。您不想穿少数民族服装或者古装照相吗?

A: Ne, dankon! Lanlan kaj Ŝaŝa, ĉu vi volus fotiĝi en taja kostumo?

甲: 不, 谢谢! 兰兰、莎莎, 你们想穿傣族服装照相吗?

L kaj Ŝ: Jes, ni kune fotiĝos kiel tajaj fratinoj.

兰兰和莎莎: 想照, 我们照一张傣族姐妹的合影吧。

B: Ĉu buston aŭ la tutan figuron?

乙: 照半身还是照全身?

A: Profilon de mia busto.

甲: 照半身侧像。

B: Bonvolu sidiĝi sur la tabureto. Rigardu al la horloĝo sur la tablo.

乙: 请坐在小凳子上面向桌子上的时钟。

A: Ĉu tiel?

甲：这样对吗？

B: Jes. Mi enfosikigu la kameron. Iom levu la kapon. Bone! En ĝusta pozo! Ne moviĝu! Fino!

乙：好的。我来对好光。请把头略抬一点。好！姿势很好！不要动！照完了。

A: Nun fotu la knabinojn kaj poste nin ĉiujn kune.

甲：现在照姑娘们吧，然后我们再合影。

B: Ĉu koloran aŭ nigrablankan foton vi deziras?

乙：您照彩色还是黑白照片？

Ĉ: Koloran.

丙：彩色的。

B: Ĉu negativon por fari kolorajn kopiojn aŭ diapozitivon por magia lanterno vi volas?

乙：您要洗印彩照的负片还是要放映幻灯的正片？

Ĉ: Negativon. Mi volas fari grandigitajn kopiojn.

丙：负片。我要放大的彩照。

B: Bone.

乙：好的。

A: Kiam la fotoj pretos?

甲：相片什么时候好？

B: Ni rivelos ilin morgaŭ, do vi povos veni morgaŭ posttagmeze, se vi volas rigardi la negativojn.

乙：我们明天冲洗，您要看底片可以明天下午来。

A: Grandigu mian foton. Mi volas ses kopiojn en formato de 4 per 6 coloj.

甲：我的照片请您放大，我要6张4乘6寸的。

Ĉ: Iom tro malhelaj estas ĉi tiuj kopioj.

丙：这几张色调太暗了。

A: Sur la negativo estas makuleto. Ĉu vi povus fari retuŝon?

甲：底片上有斑点。您可以修一下吗？

B: Jes, mi provos, kaj vi ricevos la novajn kopiojn post morgaŭ.

乙：是的，我可以试一试，后天可以拿到新加印的相片。

A: Bonvolu enmeti bobenon de filmo al mia fotilo.

甲：请将我的相机装上胶卷。

B: Tiu ĉi filmo estas iom pli multekosta, tamen ĝi taŭgas por foti sen forta lumo.

乙：这胶卷贵一点，不过能够不用强光拍照。

A: Mi perdis la kovrilon de mia lenso. Ĉu vi povus trovi por mi novan?

甲：我的镜头盖丢了，您能给配个新的吗？

B: Bedaŭrinde ni ne havas tian. Bonvolu vin turni al la magazeno kontraŭ nia butiko.

乙：很遗憾我们没有这种镜头盖。请到对面百货商店看看吧。

备用词语

superekspone 曝光过久, subekspone 曝光不足, la obturatoro (obturilo) funkcias malbone 快门失灵, malgrandigi 缩小, kapti scenon 抢镜头, foti sin mem 自拍, filtrilo 滤光镜, plako 照相底版, kodako 手相机, kaseto 暗盒, kamero 暗箱, aperturo 光圈, eksponmetro 曝光表, emulsio 乳剂, obturilo 快门, fulmolampo 闪光灯, obturila rapideco 快门速度, fotostudio 照相馆, rivelado 显影, kopio 加印照片, fiksado 定影, lenso 镜头, tripiedo 三脚架, fotisto

摄影师, *sentivo de filmo* 感光灵敏度, *pozitivo* 正片, *negativo* 负片, *stativo* (带重底座的) 支架, *instrukcio (uzindiko)* 说明书

39. EKSKURSO PERBICIKLA 骑车郊游

A (Alaŭdo): Ne tiel rapidu, Bovo! Mi ne klare vidas la vojon...

云 (云雀): 牛牛不要这么快, 我看不清路.....

B (Bovo): Ne timu! La aŭtovojo ja ne havas kavegojn—vi ne stumblos aŭ falos!

牛 (牛牛): 别怕! 公路没大坑, 您不会摔跟头。

C (Cervo): Estas tre agrable bicikli nokte. Kredeble ni atingos Badaling frumatene, kaj povos tie vidi la belan sunleviĝon.

鹿 (小鹿): 晚上骑车真舒服。想必一早我们就到八达岭了, 还能在那儿观看美丽的日出呢。

B: Se ni biciklos tiel malrapide, certe la suno aperos tie antaŭ nia alveno.

牛: 咱们要这样慢慢悠悠地骑, 不等骑到太阳就出来了。

C: Preferinde rapidi nokte; estos varme post la sunleviĝo.

鹿: 最好夜里骑快点; 太阳出来可就热了。

B: Kaj ni devos bicikli supren en la montaro!

牛: 而且在山里要骑上坡路。

C: Certe estos penige.

鹿: 一定更费劲。

B: Atentu, fervoja kruciĝejo!

牛: 当心, 铁路交叉点!

A: Ho ve! Mi falis!

云: 哎呀! 我摔倒了!

C: Kio?! Kiel vi falis!

鹿: 什么?! 您怎么摔倒了?

A: La antaŭa rado eniĝis en sulkon de la kruciĝejo je turniĝo de la stirilo!

云: 车把一扭, 前轮进到交叉路口的沟里去了!

B: Ĉu vi vundiĝis?

牛: 伤着了吗?

A: Ne. Sed la rado iom tordiĝis!

云: 没有。可是轮子有点扭啦!

B: Mi riparu ĝin. Ho, la pneŭmatiko difektiĝis! Najlo truigis la bendon!

牛: 我来修一修。啊, 车带坏了! 钉子给外带扎了个眼。

C: Mi kunportas kaŭĉukan gluon kaj aliajn necesajojn por ripari aertubon. Jen, prenu!

鹿: 我带有胶水和其它补胎用品。这不是, 拿着!

B: Mi deprenis la pneŭmatikan bendon kaj la aertubon. Bonvolu lumigi vian postlampon, ke mi riparu la aertubon.

牛: 我把外带和内胎取下来了。请开着您的手电, 让我来补。

C: Jen, smirga papero. Purigu la parton de la truo. Jen, kaŭĉuka gluo.

鹿: 这是砂纸。把有洞的地方擦干净。这是胶水。

A: Riparita? Mi enpumpu aeron.

云: 修好啦? 我来打气。

B: Ni daŭrigu la bicikladon. Ni pedalu iom pli rapide!

牛：接着骑吧。我们再蹬快点！

C: Oni diras, ke la Dek Tri Maŭzoleoj troviĝas proksime de ĉi tie. Ni povus ilin viziti revenvoje.

鹿：据说十三陵离这儿不远。回来的时候咱们可以去看看。

A: Vidiĝas silueto de la montaro! Elkrepuskiĝas!

云：群山的暗影呈现出来了！天亮了！

B: Ni malfruiĝis. Komenciĝos suprenirado. Pedalu pli energie!

牛：咱们迟了。要走上坡路了。再加点油！

C: Kiel altaj rokaj gigantoj! Rigardu la montkreston! Tie vidiĝas kelkaj homfiguroj!

鹿：好高的石崖呀！瞧那山脊！那儿有几个人影！

B: Ruĝas aŭroro! Baldaŭ leviĝos la suno kaj fariĝos varme. Rapidu!

牛：红霞！太阳就要升起，天会热起来了。快骑！

A: Mi jam ŝvitas! Tia serpenta vojo ĉiam supren!

云：我出汗啦！这路弯弯曲曲，一个劲往上！

C: Eĉ Alaŭdo ne povas transflugi tiajn montojn!

鹿：连云雀也飞不过这样的山去！

A: Ĉu Cervo povas libere kuri tie ĉi?

云：难道小鹿能在这里自由地驰骋吗？

B: Post la 80-kilometra biciklado, certe vi fariĝos pli forta.

牛：骑过了这八十公里路，你们一定会更壮实。

C: Nia ekskurso estas ankaŭ bona sporto.

鹿：我们的郊游也是很好的体育活动。

A: Kio estas tiu konstruaĵo?

云：那建筑是什么？

B: Ĝi estas blankmarmora teraso, historia konstruaĵo kun altvaloraj ŝtonaj gravuraĵoj. Ni ripozu tie kaj havu matenmanĝon.

牛：那是一座汉白玉的高台，它有着宝贵石刻的历史建筑。我们就到那儿休息休息，进早餐吧。

C: Bone. Do ni jam atingis Jurong-Pasejon. Restas nur ok kilometroj.

鹿：好吧。那么我们到达居庸关了。只有八公里路了。

A: Mi sternu mian pluvmantelon, ke ni metu la manĝaĵojn sur ĝin. Bela pikniko en tia pitoreskejo!

云：我把雨衣铺上，把吃的东西放在上边。风景如画，漂亮野餐！

C: Tiel krutas la vojo, ke ni devas piediri, anstataŭ bicikli!

鹿：路这么陡，骑不了车，得走路！

A: Rigardu, tie serpentas la Granda Muro! Giganta drako sur la montkresto! Kiel malfacile estas konstrui ĝin el brikoj sur la krutaĵoj!

云：瞧啊！蜿蜒的长城！好一条山梁上的巨龙！悬崖峭壁，用砖修起来该有多不容易呀！

B: Oni diras, ke kaprojn oni uzis dum la konstruado por porti la brikegojn supren.

牛：据说修长城的时候人们用山羊驮大砖上去的。

C: Certe oni multege ŝvitis por ĝin konstrui.

鹿：修长城一定流了许许多多汗水。

B: Kompreneble multe pli ol ni. Kvankam ni havas gigantajn maŝinojn por konstruado, tamen niaj taskoj estas eĉ pli malfacilaj ol tiuj de la antikvuloj. Ni devas rapide modernigi la patrolandon, ke ĝi havu konstruojn multe pli grandiozajn ol la Granda Muro.

牛：当然比咱们流得多。虽然我们有巨大的建筑机械，可是我们的任务比古人的更艰难了。

我们得迅速使祖国现代化，使它有比长城更加宏伟的建筑。

A: Jen, kia svarmo de homoj! Kiel buntaj homamasoj!

云：瞧那拥挤的人群！五颜六色的人群啊！

C: Ni jam alvenas al la celloko! Ĉiuj grimpas supren, supren, supren! Ni lasu la biciklojn sur la placo kaj aliĝu al la grimpantoj.

鹿：到达目的地啦！大家都在往上爬呀爬呀！咱们把车子放在广场上，也参加攀登的行列吧。

A: Supren! Supren! Al la plej alta punkto!

云：上啊！上啊！往最高点上啊！

C: Tian spiriton devas havi la juna generacio de la granda ĉina nacio! Hura, ni triumfis! Ni atingis la montpinton!

鹿：伟大中华民族的青年一代应该有这种精神！万岁！我们胜利啦！我们到了顶峰！

A: Jam estas tempo veturi hejmen.

云：到回家的时候了。

B: Ni havas pli facilan vojon, tamen ni estas iom lacaj.

牛：路更好走，可是我们有点累了。

A: Ho, kiel rapide kaj plezure! Kvazaŭ rajdante motorciklon!

云：多快，多惬意呀！就像骑摩托！

B: Gardu vin de akcidento! Biciklante malsupren ne bremsu la antaŭan radon, alie vi transkapiĝus kaj perdus la vivon!

牛：当心出事！骑车下坡不要捏前闸，不然您会翻筋斗丧命！

C: Ĉu ni vizitu la Maŭzoleojn?

鹿：咱们去游十三陵吧？

A: Mi tre laciĝis.

云：我累得很。

B: Do ni vizitu ilin alifoje.

牛：那我们就下次再游吧。

备用词语

karsta regiono 熔岩地区, kaverno 洞, stalagmito 石笋, stalaktito 钟乳石, ŝtonarbaro 石林, subtera rivero 暗河, akvofalo 瀑布, fonto 泉, rojo 小溪, ravino 峡谷, kanjono 大峡谷, montgorĝo 山峡, klifo 峭壁, valo 山谷, groteska roko 怪石, kaskado 叠瀑布, kunfluejo 汇流处, varma fonto 温泉, ermita groto 隐士的山洞, zigzaga ponto 曲桥, templo 庙宇, monumento 纪念碑, pagodo 塔, kiosko 亭, pavilono 阁, turo 塔楼, sonorilturo 钟楼, ruino de historia konstruaĵo 古迹遗址, gvatturo 瞭望台, teraso por fajrsignaloj 烽火台, arkponto 拱桥, skulptaĵo 雕塑, ŝtona statuo 石像, portalo 门楼, longa koridoro 长廊, Ŝtuparo al la Ĉielo 天梯, strategia pasejo 雄关, monaĥejo 修道院, bonzejo 寺院, bonzinejo 尼姑庵, nana 矮小的, ĉielskrapanta 摩天的, delikata 精致的, majesta 庄严的, impona 富丽堂皇的, mamuta 巨大的

40. FLUGHAVENO 机场

A: Je kioma horo ekflugos la pasaĝera aviadilo de la aerlinio de P. al A.?

甲：由 P 城到 A 城的航班几时起飞

B: Je la oka.

乙：八点起飞。

A: Do restas ankoraŭ tri kvaronoj. Ni sidiĝu sur la benko ĉe la fenestro por ripozi.

甲：那还有三刻钟呢。我们坐到窗边的长椅上休息休息吧。

B: Aŭskultu, jen oni anoncas prokraston de la flugo de via regula pasaĝera aviadilo. La veteraĉo ne permesas ekflugon je la ĝusta horo.

乙：您听，在通知你们的航班要推迟。天气恶劣不能按时起飞。

A: Bedaŭrinde! Kiam do ĝi ekfluos?

甲：真遗憾！那么几点起飞呢？

B: Eble je duonhoro pli malfrue. Certe oni anoncos denove.

乙：也许要晚半个小时。一定会再通知的。

A: Mi kunportas pentraĵon por la Asocio al s-ro N. Oni diras al mi, ke mi devas montri la ateston leteron de la Asocio al la doganejo.

甲：我给学会带的有一幅给 N 先生的画。说是得把学会的证明信拿给海关看。

B: Jes, tion vi devas fari dum kontrolado far doganistoj. Sen atestilo oni ne rajtas eksterlanden porti altvalorajn pentraĵojn. Oni devas pleniĝi deklaron pri siaj kunportataj objektoj. Jen estas formularo por vi.

乙：是的，海关人员进行检查时要拿给人家看。没有证明无权带珍贵的画到国外。需要填写旅客行李申报单。这是给您的申报单。

A: Kion do mi devas enskribi?

甲：我该填写什么？

B: Unue legu la rimarkigojn..

乙：请先读一读注意事项。

A: Oni ne rajtas eksterlanden porti armilojn, radioelsendilojn, altvalorajn animalojn kaj plantojn, juvelojn... Ho ve, mi kunportas jadan skulptaĵon por donaci al mia amiko! Kion mi faru?

甲：不能带出国外的有武器、无线电发射机、珍贵动物、植物、珠宝.....哎呀，我带着一件玉雕馈赠朋友！怎么办？

B: Restigu ĝin ĉe mi, mi ĝin donos al via filo.

乙：给我吧，我把它交给您儿子。

A: Bedaŭrinde, mi ne povos ĝin donaci al la amiko! La horloĝon, fotilon kaj transistoron mi jam enskribis. Ĉu ankaŭ la akordionon mi devas enskribi?

甲：我就不能把它送给朋友了，真遗憾！表、相机、半导体收音机都填上了。手风琴也要填吗？

B: Kompreneble.

乙：当然啦。

A: Finite. Kion mi faru nun?

甲：填完了。现在怎么办？

B: Prezentu ĝin al la deĵoranto, ke li kontrolu kaj stampu ĝin.

乙：把申报单交给值班员检验盖章。

A: Mi aŭdis, ke okazis perfortaj forkaptoj de pasaĝeraj aviadiloj. Kie tio povis okazi, se oni severe kontrolis la kofrojn kaj pakaĵojn de la pasaĝeroj?

甲：听说发生了许多劫持班机的事件。即对旅客的行李进行了严格的检查，怎么会发生那样的事呢？

B: Tio montras, ke la kontrolado kaj gardado ne estis sufiĉe bone plenumitaj. Multaj

kontrabandistoj ruze kaŝas juvelojn, horloĝojn, rarajn metiartaĵojn kaj pentraĵojn en muzikilojn, gipsofiguro, kalkanumojn...

乙：这表明检查和保卫工作做得不够好。许多走私犯狡猾地把珠宝、表、珍贵手工艺品、绘画夹藏在乐器、石膏像，甚至鞋跟之类的东西里！

A: Kiel do oni povas eltrovi la kaŝaĵojn?

甲：有什么法子找出夹藏的物品呢？

B: Per aparatoj kaj siaj spertaj okuloj kaj manoj la doganistoj tre lertiĝintaj en praktikado ofte sukcesas malkovri la kontrabandojn.

乙：海关人员在实践中变得眼灵手巧，用仪器和他们老练的眼睛和手常常可以侦破走私。

A: Oni anoncas, ke la pasaĝeroj donu siajn pakaĵojn. Mi devas iri nun. Do ĝis la revido!

甲：通知旅客托运行李啦。我得去啦，再见吧！

B: Ĝis! Zorgu vian pasporton kaj flugbileton!

乙：再见！当心护照和机票！

A: Jes. Dankon! Ĝis la!

甲：好。谢谢！再见！

C: Metu viajn kofrojn kaj valizon sur la transportan bendon! Ĉu vi havas ŝlosilojn kaj tranĉileton? Metu ilin sur la pleton! (Li komencas kontroli per sia aparato.)

丙：请把箱子皮包放到传送带上！有钥匙和小刀吗？放在盘子里！（他开始用仪器检查。）

Ĉ: Kio estas tio en la poŝo?

丁：衣袋里装的什么？

A: Ludilo.

甲：玩具。

Ĉ: Ludilo—pistoło versimila!

丁：玩具手枪像真的一样。

A: Por donaci al infano de mia amiko.

甲：是给我朋友的孩子的礼物。

Ĉ: Mi vidas, ke vi ne intencas fari malbonon. Dankon! Nun vi povas iri kun viaj objektoj.

丁：看您不像干坏事的。谢谢！现在您可以拿着您的东西走了。

A: Dankon!

甲：谢谢！

41. PILKLUDO 打球

A: Bonan matennon!

甲：您早！

B: Bonan matenon. Ĉu ankaŭ vi venas por korbopilka ludo?

乙：您早！您也是来打篮球吗？

A: Jes. Sed ni alvenas tro frue. Ni ludu tablotenison ĝis la aliaj venos, ĉu bone?

甲：是的。可是我们来得太早啦。我们在大家来到之前打打乒乓球好吗？

B: Bone. Sed mi ne estas lerta en tiu ludo.

乙：好的。可是我打不好。

A: Ankaŭ mi ne lertas; mi komencis ludi tablotenison nur lastjare.

甲：我也不行，去年我才开始打球。

B: Ni streĉu la reton!

乙：我们把网子紧一紧。

A: Kian batilon vi preferas?
甲：您喜欢什么样的球拍？

B: Batilon tegitan per grajnita gumo, kaj vi?
乙：我喜欢颗粒橡胶贴面的拍子，您呢？

A: Tian kun spongotavolo sub grajnita gumo.
甲：我喜欢海绵衬里的拍子。

B: Neniu servas kiel ludgvidisto por ni, do ni mem kalkulu la poentojn.
乙：没人给我们当裁判，那我们就自己计分好啦。

A: Ni komencu. Bonvolu fari serviron.
甲：开始吧。请您发球。

B: Ho, glitpilko. Mi gajnis unu poeton!
乙：哈，擦边球！我赢了一分！

A: Daŭrigu! Bonan tranĉfrapon!
甲：接着打吧！好个削球！

B: Vi estas pli lerta. La pilko aflugas de vi preskaŭ ĉiam nur unu centimetron super la reto!
乙：您打得更熟练。您的球总是高出球网只有一公分。

A: Ĉu vi foje vidis ludadon de nia ŝtata teamo en internacia ĉampionado?
甲：您看过我们的国家队进行国际锦标赛吗？

B: Jes, plurfoje, en televido. Ĝi gajnis la Pokalon Swajthling kaj ĝin tenis por jaroj.
乙：看过好几次，电视上。它得 Swajthling 杯，并保持了多年。

A: Niaj tablotenisistoj glorigis la patrolandon per oraj medaloj, kaj niaj flugpilkistinoj atingis eĉ pli brilajn sukcesojn.
甲：我们的乒乓球选手得了金牌为国争光，而我们的女排运动员甚至取得了更加辉煌的成就。

B: Vi jam gajnis la unuan seton. Jen alvenas gekamaradoj!
乙：您胜了第一局。瞧同志们来了！

A: Ankoraŭ mankas plejparto de la teamanoj. Nun ni povas komenci parludon kaj eĉ gean parludon.
甲：队员大都还没到齐。我们可以进行双打，甚至男女混合双打了。

B: Prefere ni lasu la kamaradinojn unue fari virinan solludon.
乙：还是让女同志们先进行女子单打吧。

A: La poentoproporcio (aŭ: poentostato): naŭ kontraŭ dudek unu. K-dino C gajnis la seton.
甲：比分是九比二十一。C 同志胜了这一局。

B: Por komenci novan seton, vi devas interŝanĝi la lokojn.
乙：开始新的一局你们须换位。

A: Jam ĉiuj korbopilkaĵaj teamanoj alvenis. Ni iru al la ludkampo!
甲：篮球队员到齐了。我们到球场上去吧。

B: Estas pli agrable ludi sur la subĉiela ludkampo.
乙：在露天球场打球更愉快。

A: Ni devas havigi al ni novan pilkon. La gumveziko de tiu ĉi difektiĝis kaj estis ŝanĝita, sed nun ankaŭ la kovrilo eluziĝas.
甲：我们得买个新球。这个球的球胆坏了换过了，可是现在球皮也用坏了。

B: Kiu servos kiel ludgvidisto kaj notisto de la matĉo? Kiu kiel tempomezuristo?
乙：谁当裁判和记分员？谁当计时员？

A: La teamestroj jam nomis k-doĵn Sun, Ma kaj Liu kiel ludgvidiston, notiston kaj

tempomezuriston.

甲：队长们已经指定孙同志、马同志和刘同志为裁判、记分员和计时员。

B: Ni jam povas komenci, do!

乙：那我们就可以开始啦。

Sun: K-do Nan, venu en la mezan cirklon. Atentu, ke la saltludistoj rajtas forbati la suprenĵetitan pilkon nur kiam ĝi ekfalas.

孙：南同志，请到圈里来。注意：跳球员要在抛起的球开始降落时才能打球。

A: Ne konduku sed tuj pasegu la pilkon! Eksteren!

甲：不要带球，快传！出界！

S: N-ro tri enludigu la pilkon per enĵeto!

孙：三号发球！

A: Ma kulpis kontraŭ la regularo per stumbligo!

甲：老马绊人犯规！

Sun: Du punĵetoj kontraŭ la eraro!

孙：犯规罚球两次！

A: Ni akiris du poentojn per punĵetoj!

甲：我们罚球得了两分！

L: Finiĝis la unua duontempo (aŭ tempduono). Signu per gongo la komencon de 10-minuta paŭzo!

刘：上半时接受。敲锣休息十分钟！

S: La dua duontempo finiĝis je egalstato, do ni devas longigi la matĉon je kvin minutoj.

孙：下半时打成了平局，那我们还得延长五分钟。

备用词语

ludotablo 球台, solludo 单打, parludo 双打, vira solluda matĉo 男子单打, miksa (gea) parludo 混合双打, lokŝanĝo 交换场地, La Internacia Tablotenisista Federacio 国际乒联, korbogolejo 球篮, ĵeti pilkon en la golejon 投篮, transdoni, pasigi la pilkon 传球, flanklinio 边线, bazlinio 底线, ludkampo 球场, mezlinio 中线, korbotabulo 篮板, korboringo 篮环, korbo 球篮, korboreto 篮网, punĵeta linio 罚球线, trejnisto 教练, ĉefludgvidisto 主裁判, vicludgvidisto 副裁判, morta tempo 停时, averti per tabuleto 出示警告牌, teknika eraro 技术犯规, korbopilko (basketbalo) 篮球, flugpilko (volebalo) 排球, piedpilko (futbalo) 足球, golfo 高尔夫球, servira rajto 发球权, decida seto 决胜局, blokado 拦网, ektuŝi la reton 触网, en unu seto eblas maksimume 6 ŝanĝoj 一局最多只能换人六次, dum la paŭzo la ludistoj ne rajtas paroli 暂停期间运动员不能讲话, taktika instrukcio 战术指导, golejo 球门, golulo 守门员, avanulo 前锋, halfo 前卫, arierulo 后卫, virtuoza sinĵeto 鱼跃, golej-areo 球门区, kiki 踢球, kapumi 顶球, libera pozicio 空当, dribli 带球过人, rabi la pilkon 抢球, punŝoto 罚球, punpunkto 罚球点, angulŝoto 角球, gollinio 球门线, finalo 决赛, ofsajdo 越位 teniso 网球, polo 马球, glacihokeo 冰球, hokeo 曲棍球, manpilkado 打手球, bazbalo 垒球, kriketo 板球, plumpilko 羽毛球, rugbeo 橄榄球, hokedisko 冰球, krurŝirmilo 护腿, brustŝirmilo 护胸, kapŝirmilo 护头, golula masko 守门员护面, malgranda puno (forlasi la ludkampon por 2 minutoj) 小罚, granda puno (5-minuta foresto el la ludkampo) 大罚, punbenko 受罚者的坐凳, bilardo 台球

42. ATLETIKAJ, GIMNASTIKAJ KAJ ALIAJ KONKURSOJ

田径、体操等比赛

A: Ĉu vi rigardis hieraŭajn konkursojn?

甲：昨天的比赛您看了吗？

B: Jes. En kuroj, marŝoj kaj altsalto atletoj el via urbo starigis novajn rekordojn.

乙：看了。在赛跑、竞走和跳高项目中，您市运动员开创了新纪录。

A: S-ro Liu estast re esperiga saltisto. Bedaŭrinde, li tordis al si piedon dum la svingodona alkuro.

甲：刘先生是个很有希望的选手。可惜他在助跑时扭了脚。

B: Antaŭe mi vidis lin fari stangosalton. Tre elegante li sin rulis trans la laton.

乙：从前我看过他的撑杆跳。他滚过横杆的姿势很优美。

A: La rezultoj de longosalto kaj trisalto ne estas tre kontentigaj.

甲：跳远和三级跳的成绩不十分令人满意。

B: Ankaŭ tiuj de la kurkonkursoj. Kaj en la 4 x 100-metra (kvaroble centmetra) vira stafeta ebenkuro aperis kelkaj promesplenaj sportistoj.

乙：赛跑的成绩也是一样。而且在男子四百米接力赛中有几个极有希望的选手。

A: Ŝajnas al mi, ke mankas al niaj kuristoj sufiĉe fortaj muskoloj kaj forta sano.

甲：我觉得我们的赛跑运动员肌肉缺乏力量，不够健壮。

B: Dum la maratona kuro mi rimarkis, ke iuj atletoj povas kuri sufiĉe rapide en la komenca stadio, sed mankas al ili forto por tiel rapidi longdaŭre.

乙：进行马拉松跑的时候。我发现有些选手在开始阶段跑得相当快可是缺乏长时间疾跑的力量。

A: Lerto kaj elano ne sufiĉas por venki en kurkonkurso, precipe longvoja konkurso.

甲：单是巧劲，猛劲是跑不赢的，特别是远距离的赛跑。

B: En vira lancĵeto, virina diskoĵeto kaj vira pezglob-ĵeto oni renovigis la rekordojn.

乙：在男子标枪、女子铁饼和男子铅球项目上，人们刷新了记录。

A: Ankaŭ en naĝo brilaj rekordoj estis starigitaj. Min forte impresis la 100-metra virina papilinaĝo, la 100-metra vira rapidnaĝo kaj la 200-metra vira mikснаĝo.

甲：游泳比赛也创了几项记录。百米女子蝶泳、百米男子速游和二百米男子混合游都给了我深刻的印象。

B: Vere promesplenaj sportistoj aperis en la plonĝokonkurso. Min mirigis la tordoplonĝo de K. Vertikale li enakviĝis preskaŭ sen plaŭdo. Tiel lerte li regis siajn movojn.

乙：跳水比赛出现了一些真正有前途的运动员。K先生的转体跳水动作真惊人。他笔直入水，几乎没有水花。他那样巧妙地控制了自己的动作。

A: Kredeble niaj plonĝistoj gajnos orajn medalojn ankaŭ en internaciaj konkursoj.

甲：很可能我们的跳水运动员还会在国际比赛中拿到金牌的。

B: Por kuraĝigi sportistojn en tiu branĉo, oni modernigis la instalaĵojn. Novaj plonĝoturoj kun bonkvalitaj trampolinoj estas starigitaj ĉe multaj naĝbasenoj.

乙：为了鼓励这方面的运动员，进行了设施的现代化。有许多游泳池建起了装有高质量跳水的跳台。

A: Ĉu vi ŝatas naĝi kaj plonĝi?

甲：您喜欢游泳和跳水运动吗？

B: Naĝi okupas la unuan lokon en mia sporta programo, tamen mi ne plonĝas. Somere mi naĝas

kutime en la maro kaj estas neeble tie fari plongon.

乙：游泳在我的体育活动中占首位，可是我不跳水。夏天一般我在海水里游泳，那儿不能跳水。

A: Foje mi plongis de sur roka bordo en riveron kaj preskaŭ rompis al mi la kranion. Feliĉe miaj kolegoj min savis de drono.

甲：一次我从石岸上往河里跳水，险些儿撞碎脑壳。幸好同伴们搭救才没有淹死。

B: Jen, ni alvenas al la gimnastika konkursejo. Ĉu ni eniru por spekti?

乙：啊，我们来到体操比赛场地了。进去看看吗？

A: Bone. Paraleladon oni faras.

甲：好的。在比赛双杠呢。

B: Samtempe tie iras virina ŝtupparalela konkurso.

乙：同时那儿在举行女子高低杠比赛。

A: La knabinetoflugadas en la aero kvazaŭ hirundo. Tiel fulmrapide, tiel elegante.

甲：那个小姑娘在空中飞翔，像一只小燕子。急如闪电，动作真优美。

B: Iuj movoj de la sportistinoj de ŝtupa paralelo similas al tiuj de reka gimnasto; ili sin svingas etendante kaj kurbigante la gambojn, rotacias ĉirkaŭ la stango, transkapiĝas en la aero.

乙：高低杠运动员有些动作与单杠动作相似；她们屈伸摆动、回环、空翻。

A: Kiel elasta estas ŝia korpo! Kiam ĝi frapiĝas kontraŭ la stango, ĝi tuj resaltas kiel risorto, tiel rapide kaj malpeze.

甲：她的身体多么富于弹性啊！一碰到杠子就像弹簧一样弹了回来，那样迅速轻盈。

B: Ŝi lertas ne nur en ŝtupparalelado sed ankaŭ en grundgimnastiko, tramlado kaj trabado.

乙：她不仅长于高低杠，而且也善于自由体操、跳马和平衡木。

A: Kio estas tramlado?

甲：什么叫跳马？

B: Tio estas salto trans senansan ĉevalon helpe de tramlilo.

乙：就是借助跳板跳越木马。

A: Ĉu oni faras ankaŭ konkurson de moderna gimnastiko?

甲：也要进行艺术体操比赛吗？

B: Jes. Jam elkulturiĝis sufiĉe granda nombro da sportistinoj de mangimnastikado. Kelkaj knabinoj ludas pilkon, ludrington, saltsnuron, rubandon, klabon k.t.p. kun movoj plenaj de ĉarmo kaj harmonio.

乙：是的。已经培养出了相当多的艺术体操运动员。有的女孩子表演的球操、圈操、绳操、带操、棒操等等，动作十分优美、和谐。

A: Ĉu hodiaŭ aŭ morgaŭ okazos la konkursoj de skermado, pafado, arkpafado kaj biciklado?

甲：击剑、射击、射箭和自行车比赛在今天还是明天举行？

B: Morgaŭ.

乙：明天。

备用词语

vego (kurejo) 跑道, startejo 起跑点, starto 起跑, tempomezuristo 计时员, stophorloĝo 秒表, stafeta bastoneto 接力棒, notisto 记录员, mallongdistanca kuro 短跑, mezdistanca kurkonkurso 中距离赛跑, 100-metra barierkuro 百米低栏, obstaklokuro 障碍赛跑, svingodona alkuro (de saltisto) 助跑, saltita longo 跳的距离, saltita alto 跳的高度, trisalto 三级跳, vira

lancoĵeto 男子标枪, virina diskoĵeto 女子铁饼, dekdisciplino por viro 男子十项全能, disciplinoj 项目, ĉevalo 鞍马, ĉevalado 鞍马运动, duringo 吊环, grundgimnasta spaco 自由体操场地, tapiŝo 地毯, kuseno 垫子, po-gimnastika individua konkurso 个人单项体操比赛, halterlevo (pezlevo) 举重, dumana etendo 双手挺举, dumana ŝiro 双手抓举, dumana puŝo 双手推举, unumana puŝo 单手推举, pezkategorio 重量级别, ŝtalstango 横杠, krompezoj 杠铃片, mondrekordo 世界记录, rompi (superi), krei (starigi) rekordon 破纪录, luktokonkurso 摔跤比赛, bokso 拳击, rajdokonkurso 骑马比赛, luktarto 武术, spado 剑, sapiro 教练剑, ŝako 象棋, vejĉio 围棋, egalrezulto 平局, finalo 决赛, partio 一局, malfermi partion 开局, intermovo 运子, elimini 吃子, ŝaki 将军, matigi 将死, bona manovro 着妙棋, sketi 溜冰, sketilo 冰刀鞋, rulsketilo 旱冰鞋, sketejo 溜冰场, hipodromo 跑马场, ĵokeo 赛马场的职业骑手, kajado 划皮艇, ĵudo 柔道, paraŝutado 跳伞, montgrimpado (alpinistiko) 登山运动, skiado 滑雪, sledado 雪橇运动, velado 帆船运动, surfotabulado 冲浪板运动, akvoskiado 滑水运动, aŭtado 汽车比赛, motorbicilado 摩托车运动, aerfusilo 气步枪, norma etkalibra fusilo 标准小口径步枪, norma pistolo 标准手枪, sportpistolo 运动手枪, pafo al kuranta apro 打跑猪, diskopafo 飞碟射击, 40-pafa kuŝa pafo 四十发卧射, stara pafo 立射, surgenua pafo 跪射, la plej interna cirklo 最内靶环, la plej ekstera cirklo 最外靶环, cirklovaloro 靶环值, celilo 标尺, celgrajno 准星, kartoĉujo 子弹囊, ŝargujo 弹仓, kolbo 枪托, tordoplonĝo 转体跳水, vira duremila unuopa remo 男子双桨单人划, vira unuremila okopa remo 男子单桨八人划, stiristo 舵手, artosketado 花样滑冰, 500-metra sketkuro 五百米速滑, glacidanco 冰上舞蹈, plonĝi rektakorpe, karpomove, kun suprentiritaj genuoj 直式、鱼跃式、蜷膝式、蹲式跳水, dorsonaĝo 仰泳, brustonaaĝo 狗刨, 爬泳, mikснаaĝo (kvarnaaĝo) 混合泳

43. EN KOMPUTEJO 计算机房

A: Delonge mi deziras viziti vian komputejon por akiri iom da scio pri komputilo (komputoro). Ĉu mi povus rigardi la aparatojn per la propraj okuloj?

甲: 好久我就想去你们计算机房获得一点有关计算机的知识。我可以亲眼看看你们的机器吗?

B: Vi estas bonvena, ĉar nun ni ne estas tiel okupitaj kiel kutime. Bonvolu demeti viajn ŝuojn kaj surmeti babuŝojn.

乙: 欢迎您来, 因为目前我们不像平时那样忙。请脱掉您的鞋子, 换上拖鞋。

A: Ĉu tio estas necesa?

甲: 有必要吗?

B: Jes, ni devas teni la laborejon senpolva, por ke la maŝinoj bone funkcii.

乙: 是的, 我们需要保持机房无尘, 好让机器顺利运行。

A: Kiel agrable estas ĉi tie. Ŝajne funkcias klimatizilo?

甲: 这儿真惬意。有空调吗?

B: Jes, ankaŭ tio garantias la laboradon de la komputiloj.

乙: 有, 这也是为了计算机的工作。

A: Kiom da specoj de komputiloj estas instalitaj en la komputejo?

甲: 这个计算机房装有几种计算机?

B: Nur unu speco, nome personaj mikrokomputiloj.

乙: 只有一种, 也就是个人小型计算机。

A: Mi aŭdis, ke estas hardvaro kaj softvaro de komputilo. Kion tio signifas?

甲：我听说有计算机硬件和软件。指何而言？

B: Hardvaro kaj softvaro estas vortoj prunteprenitaj el la angla lingvo. Per hardvaro oni nomas la aparatojn kaj akcesoraĵojn de komputilo; per softvaro oni nomas la programojn. Nova 《Komputada Baza Terminaro》 proponas uzi, anstataŭ ili, “aparataro” kaj “programaro”.

乙：“hardvaro”和“softvaro”是从英文里借用的词语。“hardvaro”（硬件）表示计算机及其外围设备，“softvaro”指的是运行程序。新出版的《计算机基本术语》建议用“aparataro”和“programaro”来代替它们。

A: Por kio oni uzas la klavaron antaŭ la televidilo? Ĉu por tajpado?

甲：电视机前面那个键盘是干什么用的？是打字用的？

B: Tio ne estas televidilo kaj ordinara klavaro por tajpado. Tiu aparato kun fluoreska ekrano ne estas televidilo, sed videbligilo. Ĝi estas unu el la periferiaj aparatoj de la komputilo. La klavaro estas ilo por enmeti aŭ diri informojn al la komputilo.

乙：那不是电视机和普通打字的键盘。带屏幕的机器不是电视机，而是显示器。它是计算机的外围设备之一。键盘是计算机输入和输出信息用的。

A: Kio estas periferiaj aparatoj?

甲：什么是外围设备？

B: Periferiaj aparatoj aŭ ekipaĵoj estas aparatoj ligitaj per buso al la regilo. Krom la videbliga aparato, ankaŭ la enmeta, eliriga, presa (printa), skana aparatoj kaj la memorilo estas periferiaj aparatoj.

乙：外围机器或外围设备指通过 buso 与主机连接的机器。除了显示器，还有输入输出器、打印机、扫描仪、存储器也是外围设备。

A: Buso ja estas granda veturilo. Ĉu tio estas necesa por interligi aparatojn?

甲：Buso 是大型车辆。需要用它来连接机器吗？

B: Buso ĉi tie ne signifas aŭtobuson sed kunligan linearon por komuna komunikado, datena administrado kaj datena eliro.

乙：Buso 在这里不是公共汽车，而是供沟通信息、进行数据管理、输出的连接线。

A: Nun mi komprenas. Ĉu vi povas demonstri al mi komputadon per tiu aparato?

甲：现在我明白了。您可以用那部机器给我演示演示吗？

B: Jes. Mi enmetu kelkajn liniojn de teksto kaj poste faru redaktadon.

乙：好。我输入几行文字，然后进行编辑。

A: Ĉu oni povas redakti per komputilo?

甲：可以用计算机进行编辑吗？

B: Jes. (Tajpas.) Rigardu, mi tajpas tekston, kaj la tajpitaj literoj tuj aperas sur la ekrano. Se mi mistajpis ion, tion mi povas rimarki per legado de la vortoj sur la ekrano kaj fari korekton.

乙：可以。（打字）瞧，我打字，打过的字母立刻在屏幕上显示出来。如果我打错了，我可以通过校读屏幕上的文字来发现并改正。

A: Ĉu oni ankaŭ povas forstreki kaj aldoni vortojn al la teksto?

甲：也能够删除和增加文字吗？

B: Jes. Oni povas facile forviŝi kaj aldoni vortojn, frazojn aŭ alineojn al enmetita teksto. Kaj post tio la teksto restos neta kaj tuj uzebla por preso.

乙：可以。很容易进行增删。而且增删之后文字很整洁，可以立即印刷。

A: Kiel oni povas uzi la enmetitan tekston por presado?

甲：怎样用输入的文字进行印刷呢？

B: Se vi bezonas nur kelkajn kopiojn, vi povas uzi periferian aparaton nomatan punktara presilo, kiu povas presi kopiojn de la teksto sur kontinua papero. Se vi bezonas centojn, milojn aŭ dekmilojn da kopioj, vi povas enmeti la tekston en (magnetan) diskon, per kiu oni povas pretigi ofsetan presplaton.

乙: 如果您只需要几份, 您可以用点阵打印机在连续打印纸上打印。如果您需要几百, 几千, 几万份, 您可以把文字拷到软(磁)盘上, 然后制成胶印版。

A: Vere mirinda estas la komputilo!

甲: 计算机真奇妙!

B: Efektive nenio mirinda estas en ĝi. Ĝi estas elektronika aŭtomato inventita antaŭ 50 jaroj, do aparato tre juna. Sed rapidege ĝi evoluas kaj nun ĝia kvina generacio jam maturiĝis. Kiel ajn lerta estas la komputilo, ĝi tamen ne povas superi la homan saĝon. Sen strebado de homoj ĝi ne povas estiĝi, por ne paroli pri evoluado.

乙: 实际上没有什么奇妙之处。它是 50 多年前发明的一种机器, 所以还很年轻。但是它发展得极为迅速, 现在它的第五代已经成熟。不论计算机怎样灵巧, 它却不可能超过人的智慧。没有人的努力, 它不可能产生, 更不用说发展。

A: Dankon pro via helpo! Tamen nur malklaran ideon nun mi havas pri la mirinda komputilo. Oni diras, ke per komputiloj oni povas starigi informan reton, kiu ebligas al ni akiri informojn el diversaj lokoj en la mondo ege rapide. Ĉu ankaŭ ĉe vi eblas tia komunikado per interreto?

甲: 谢谢您的帮助! 不过现在我对计算机才有一个模糊的认识。听说可以用计算机建立信息网, 从世界各地非常迅速地取得信息。您这儿也能借互联网传递信息吗?

B: Jes. Vi povas interŝanĝi informojn kun la tuta mondo en mirinda rapideco. Per interreto ni eĉ povas legi gazetojn kaj librojn kaj aŭskulti radioprogrameron.

乙: 可以。您可以借互联网以惊人的速度同全世界交流信息。借互联网我们还能够阅读刊物和书籍并收听广播节目。

A: Koran dankon por via klarigo. Sed ne decas longe vin ĝeni. Do, ĝis la revido!

甲: 衷心感谢您的说明。可是打扰您太长时间是不合适的。再见吧!

B: Pardonon, ke mi ne bone klarigis al vi la aferon! Ĝis la revido!

乙: 对不起, 我解释得不好。再见!

备用词语

programi 编程序, asembli 汇编, deĉifri 译码, voki 调用, deponi 转储, enmemorigi 存储, esplori 搜索, legi 读出, paki 压缩, testi 测试, 校验, transmeti 传输, dateno (datumo, donitaĵo) 数据, memorilo 存储器, bloko 程序块, oficeja komputoro 办公电脑, mikroprogramo 小程序, bitoko 字节, sistema programaro 系统软件, aplika programaro 应用软件, maŝina kodo 机器码, komputila lingvo 计算机语言, instrukcio 指令, kapacito 容量, karto 卡片, signovidigo 字符显示, akordebleco, konformeco 兼容性, tabla komputilo 台式计算机, portebila komputoro 便携式电脑, komputorreto 计算机网络, finaparato 终端机, dialoga finaparato 会话终端, kerno 磁芯, cirkvito KAJ “与”门, cirkvito NE “非”门, ambaŭdirekta tajpado 双向打印, duuma ĉelo 二进制单元, duuma signo 二进制字符, magnetbenda memorilo 磁带存储器, magnetdiska memorilo 磁盘存储器, centra memorilo 主存储器, ekstera memorilo 外存储器, diskofunkciigilo 磁盘驱动器, mola disko 软盘, malmola disko 硬盘, lumdisko 光盘, funkciigilo de lumdisko 光盘驱动器, regilo 控制器, mikroregilo 微控制器, konektloko 接口, forstreka signo 作废符号, retromova signo 倒退符号, banko 存储体, banka giĉeto 存储

44. DEBATO 辩论

A: Mi rimarkis kun ĝojo, ke nia klubo multe progresis en parolo de Esperanto dank' al praktika uzo de la lingvo en la klubo. Hodiaŭ ni okazigas tiun ĉi debatan ekzercon por akiri sperton pri diskutado. La temo por nia diskutado estas la internacieco de Esperanto. Kiu volas paroli la unua?

甲: 我高兴地看到, 通过实地运用, 我们俱乐部的世界语口语进步很大。今天我们举行这次辩论练习, 以取得讨论经验。我们的话题是世界语的国际性。谁先发言?

B: Mi. Esperanto estas internacia helpa lingvo. Ĝi estas dediĉita por uzado en internacia komunikado. Nun ĝi ludas pli kaj pli gravan rolon. En tiu senco ni povas diri, ke ĝi havas internaciecon, ĉar ĝi funkcias en internacia tereno. Sed ĝia vortaro, ĝiaj vortradikoj plejparte devenis de okcidentaj lingvoj. En konsidero pri tio, ni ne povas diri, ke ĝi havas larĝan internaciecon.

乙: 我发言。世界语是国际辅助语。它是国际交流的语言。现在它起着越来越重要的作用。在这个意义上说, 它具有国际性, 因为它用在国际领域。可是它的词汇, 它的词根大都来自西方语言。就这一点来看我们不能说它具有广泛的国际性。

C: Mi tute samopinias kun vi. Kvankam eĉ ni ĉinoj povas trovi en Esperanto nombron da tuj rekoneblaj vortoj kiel tanko, sofo, radaro, ĥolero, kafo, ĉokolado kaj lasero, tamen la plejparto de la Esperantaj vortradikoj estas fremdaj por ni. Por larĝigi la internaciecon de Esperanto, oni devas pliinternaciigi ĝian vortaron; oni devas enkonduki en ĝin vortojn el la ĉina kaj aliaj neeŭropaj lingvoj.

丙: 我完全同意您的意见, 虽然连我们中国人也能马上认识 tanko (坦克)、radaro (雷达)、ĥolero (虎烈拉)、kafo (咖啡)、ĉokolado (巧克力)、lasero (莱塞) 这些词语, 然而世界语的绝大部分词根对我们是陌生的。应该扩大它的词汇的国际性; 应该引入中文和其它非欧洲语言的词语。

Ĉ: Estas bone, ke Zamenhof zorgis pri la internacieco de la Esperantaj vortradikoj, ke ili estas rekoneblaj por la homoj, kiuj uzas denaske aŭ ellernis latinidajn lingvojn. La internacieco de la Esperanta vortaro estas neneigebla por la sciantoj de hindeŭropaj lingvoj. Estus tre bone, se oni povus havigi al Esperanto vortaron tuj rekoneblan por la tuta homaro. Tamen tio estas absoluta neebla.

丁: 柴门霍夫注意了词根的国际性, 使从小使用或者学习了拉丁语系语言的人能够认识它们, 这是好的。世界语词汇的国际性对于懂得印欧语系语言的人来说是不可否认的。如果能够使世界语的词汇对全人类一看便知, 当然很好。然而这根本办不到。

D: Unu el la plej gravaj karakterizaĵoj de la nacioj ja estas la naciaj lingvoj. Se la naciaj lingvoj ne diferencus unu de alia je vortaro, fonetiko kaj gramatiko, ili fariĝus unu sama lingvo, kaj tiam oni ne plu povus paroli pri internacieco!

戊: 民族的最主要的特征之一是民族语言。如果民族语言的词汇、语音、语法都没有区别, 它们就成了同一种语言, 那时也就无从谈论国际性了!

B: Kara, ne troigu! Mi volas nur rimarkigi vin, ke mankas al Esperanto sufiĉe da orientaj elementoj, por ke ĝi havu larĝan internaciecon.

乙: 亲爱的, 不要夸大其词! 我只是要请您注意世界语没有足够多的东方的成分, 来使它具有广泛的国际性。

Ĉ: K-do C proponis, ke oni enkonduku ĉinajn radikojn en Esperanton. Ĉu tio povas fari

Esperanton pli internacia? Tion nur pezigos, malfaciligos la lingvon.

丁：丙同志建议引入中国词根。这能够使世界语更国际化吗？这只能使语言变得更笨重、更难学。

D: La tuj-rekonebleco de vorto en Esperanto por unu nacio signifas samtempe fremdecon por alia nacio. En Esperanto estas pluraj vortoj por regnestro: reĝo, sultano, imperiestro, mikado, ĉaro kaj ŝaho. Ĉiuj ili estas fremdaj por ni ĉinoj. Ĉu ni enkonduku en Esperanton la ĉinan vorton gŭoŭang-o aŭ hŭangdi-o por plilarĝigi la internaciecon de la Esperanta vortato?

戊：世界语单词对一个民族的熟识就意味着对另一个民族的陌生。世界语有好几个国家元首的词儿：reĝo（国王）、sultano（苏丹）、imperiestro（皇帝）、mikado（天皇）、caro（沙皇）和 ŝaho（沙赫）。对中国人它们都是陌生的。是不是再给世界语的词汇引入 gŭoŭang-o（国王）或 hŭangdi-o（皇帝），以扩大其国际性呢？

A: Same kiel aliaj nenecesaj neologismoj, tio nur malfaciligas la lingvon.

甲：和其它不必要的新词一样，这只能增加语言的难度。

E: Mi opinias, ke la internacieco de Esperanto kuŝas ĉefe en la simpleco de ĝia fonetiko, la reguleco de ĝia gramatiko, la racieco de ĝia vortfarado, la fleksebleco de ĝia vortordo, la logikeco de ĝiaj...

己：我认为世界语的国际性主要在于它的语音的单纯、语法的规则性、构词的合理性、语序的灵活性、它的逻辑性.....

D: Ĝuste tion mi volus diri. Reguleco, racieco, logikeco, simpleco garantias al ni facilecon de la lingvo. Komuneco, racieco, reguleco kaj logikeco ja estas bonaj por ĉiuj nacioj.

戊：我正想谈这一点。规律性、合理性、逻辑性、简易性保证语言的容易。其共性、规律性、逻辑性对所有民族都是好的。

E: Dank' al ekzisto de la finaĵo "n", oni povas diri en Esperanto:

1. Mi amas vin.
2. Mi vin amas.
3. Vin mi amas.
4. Vin amas mi.
5. Amas vin mi.
6. Amas mi vin.

Ili ja estas ĉiuj eblaj ses vortordoj de tiu frazo en ĉiuj homaj lingvoj. Ankaŭ en tiu fleksebla, libera vortordo kuŝas la internacieco de Esperanto.

己：由于有词尾“n”，可以用世界语说：

1. Mi amas vin.（我爱你。）
2. Mi vin amas.（我把你爱。）
3. Vin mi amas.（你呀我爱。）
4. Vin amas mi.（你呀爱被我。）
5. Amas vin mi.（爱你被我。）
6. Amas mi vin.（爱我把你。）

它们是这句话在人类语言中所有的六种语序。在这个灵活的自由的语序中也有世界语的国际性。

A: Lia argumento ŝajnas paradokso por momento, sed post konsidero ĝi fariĝas komprenebla kaj akceptebla.

甲：他的议论乍听起来有些奇怪，但是考虑一下之后就成为可以理解可以接受的了。

B: Post la diskuto nun mi vidas, ke la internacieco de lingvo estas iom komplika afero. Tre gravas

ja por ni teni la simplecon de Esperanto, ĉar facileco ja estas gravega kvalito por internacia helpa lingvo.

乙：经过讨论，我认识到语言的国际性是件有点复杂的事情。保持世界语的简易性对我们很重要，因为容易学是国际辅助语的重要品质。

A: Erara estas la opinio de eŭropaj esperantistoj, kiuj senskrupule enkondukadas nenecesajn neologismojn de la angla, franca kaj aliaj okcidentaj lingvoj, opiniante, ke ili estas “internaciaj”. Ĉu videobendo estas pli oportuna ol vidbendo? Kial uzi la vorton “oftalmologo” se “okulisto” diras tute la samon? Ni devas observi la 15-an regulon de la Plena Gramatiko de Esperanto enkondukante fremdajn vortojn.

甲：欧洲的世界语者毫无顾忌地从英、法等西方语言引进不必要的新词，认为它们是“国际化”的，这种意见是错误的。videobendo 比 vidbendo 有什么优越性呢？为什么要用 oftalmologo 呢，既然它和 okulisto 是一个意思？我们应该按照世界语语法大全第十五条文规引入新词。

C kaj Ĉ: Ni samopinias kun vi.

丙和丁：我们同意您的意见。

备用词语

konsenti 同意, klarigi 说明, ekspliki 解释, ĝusta rezono 正确的推理, prava 对的, pruvi 证明, trafaj argumentoj 击中要害的论证, konsiderinda 值得考虑的, inda 值得的, valora opinio 有价值的见解, refuti 反驳, logika konkludo 合乎逻辑的结论, malkonsenti 反对, rifuzi 拒绝, malakcepti 不接受, kompromisi 妥协, sofismo 诡辩, erariga rezono 使人误入歧途的推理, trompi per truko 耍花招骗人, artifiki 施展计谋, kontraŭdiro 矛盾, konvinki 说服, absurda 荒唐的, sensecaĵo 无稽之谈, venke rebati 成功地反击, forblovi la ŝajne ĝustajn argumentojn 把看似正确的辩解一扫而光, nelogikaĵo 不合逻辑 (的意见), blinde palpante rezoni 摸索推理, misrezoni 错误推理, kritiki 批评, forĵeti eraran opinionon 放弃错误见解, senco implicita 言外之意, senco eksplicita 讲明的意思, nedisputebla 无可争辩的, eksplodi 发火, koleri 生气, aplombe 镇静地, trankvile 安详地, kviete 安静地, senekscite 平心静气地, vikle diskuti 活跃地议论, kriaĉi ĝisraŭke 力竭声嘶地大喊大叫, protesti 抗议

45. PERFEKTIGO PER PRAKTIKO 以实践求完善

A: Kion vi legas, kamaradino?

甲：同志，您在读什么？

B: Gvidlibro pri konversacio.

乙：会话指南。

A: Vi tre diligentas, ofte legas eĉ dum la vesperkunsidoj.

甲：您真勤奋，晚上也常常阅读。

B: Sed malrapide mi progresas en konversacio! Ankaŭ vi balbutadis antaŭe, sed nun vi parolas flue. Kiel vi atingis tian sukceson?

乙：可是我的会话进步很慢。您以前说话也是结结巴巴，可是现在讲得流利了。您是怎样成功的呢？

A: Per praktiko.

甲：通过实践。

B: Antaŭe mi jam aŭdis, ke por progreso necesas praktiko. Mi tamen ne kuraĝas paroli... precipe kun lertuloj.

乙: 以前我就听说, 要进步就得实践。可是我不敢说话.....特别是不敢和熟练的人讲话。

A: Ne kuraĝas? Kion do vi timas?

甲: 不敢? 您怕什么?

B: Fari erarojn.

乙: 怕错。

A: Nur tiu ne eraras, kiu nenion faras. Via letero skribita al mi montris, ke vi jam havas fundamentan scion pri Esperanto kaj kapablas ĝin uzi. Ne timu! Ni ofte faras erarojn eĉ en uzado de la gepatra lingvo, do nature ni ne povas paroli en Esperanto tute senerare.

甲: 啥也不做, 才不会错。您写给我的信表明您已经有了世界语的基本知识, 会使用它。不要害怕。就是使用我们的母语我们也常常搞错, 讲世界语当然不会完全没有错误。

B: Mi timas precipe pri tio, ke mia prononcado estas neĝusta. Kiel oni povas ĝuste elparoli la konsonantojn r, ĥ, ĉ, ĝ, ŝ...?

乙: 我特别害怕的是我的发音不正确。怎样才能正确发出辅音字母 r, ĥ, ĉ, ĝ, ŝ 的音呢?

A: Vi jam povas ĝuste elparoli r, kvankam ne tre lerte. Ripete vin ekzercu, kaj vi parolos pli flue kaj pli facile post kelkaj semajnoj. Ĥ tute identas kun la hanlingva h en la latiniga sistemo.

甲: 您已经会正确发 r 的音, 不过还不熟练。您反复练习, 过几个星期就读得更流利更轻松了。字母 ĥ 的读音完全和汉语拼音的 h 一样。

B: Ĉu vere? Kaj ĉ, ĝ, ŝ? Ĉu ili identas kun ch, zh, sh?

乙: 真的吗? ĉ, ĝ, ŝ 呢? 它们和 ch, zh, sh 一样吗?

A: Ne.

甲: 不一样。

B: Do kun q, j, x?

乙: 那么和 q, j, x 呢?

A: Ankaŭ ne. Atente legu klarigojn pri prononco de ĉ, ĝ, ŝ en lernolibro kaj ilin elparolu ĝis lertiĝo. Certe vi sukcesos.

甲: 也不一样。请仔细阅读课本关于 ĉ, ĝ, ŝ 发音的说明, 一直练到熟练为止。您一定会成功的。

B: K-do Sun diras al mi, ke erare mi elparolas b, d, g. Ĉu ankaŭ vi tiel opinias?

乙: 孙同志说我的 b, d, g 发音不对。您也认为是那样吗?

A: Jes. B, d, g estas voĉaj konsonantoj. Ĉar mankas al la ĉina lingvo tiuj voĉaj konsonantoj, multaj ĉinaj esperantistoj elparolas b, d, g kiel p, t, k sen forta elspiro.

甲: 是的。b, d, g 是浊辅音。因为汉语没有这些浊辅音, 许多中国世界语者把 b, d, g 读成不送气的 p, t, k。

B: Kiel do mi korektu mian eraron?

乙: 那我如何来改正自己的错误呢?

A: Faru same kiel pri ĉ, ĝ, ŝ. Cetere vi ekzercu vin per voĉlegado de jenaj vortoj: bindi, pinto; bordo, porto; pego, beko; dento, tendo; bendo, penton; bato, pado; sendi, senti.

甲: 照 ĉ, ĝ, ŝ 的办法进行。此外, 请练习朗读下列词语: bindi, pinto; bordo, porto; pego, beko; dento, tendo; bendo, penton; bato, pado; sendi, senti.

B: Mi rimarkis, ke multaj akcentas la prefikson mal- en malamiko, malatenti, malsanulo kaj similaj. Ĉu tio ne estas eraro?

乙: 我注意到, 许多人重读 malamiko, malatenti, malsanulo 之类词语中的前缀 mal-。这不

是错误的吗？

A: Kvankam la ĉefakcento ĝenerale falas sur la antaŭlastan silabon de la vortoj el du aŭ pli ol du silaboj, tamen la vortoj kaj vortelementoj povas ricevi logikan akcenton sur ceteraj silaboj. Ĉar la prefikso mal- havas gravan sencon, nature ĝi ricevas certan logikan akcenton. Ĝusta uzo de logikaj akcentoj estas tre grava.

甲：虽然两个和两个以上音节的词的主要重音在倒数第二音节上，可是词和词素可以在某些音节上有逻辑重音。因为前缀 mal- 有重要的意思，当然它可以有一定的逻辑重音。正确使用逻辑重音很重要。

B: Kiel oni povas ĝuste difini la logikan akcentojn de la frazoj?

乙：如何来确定句子的逻辑重音呢？

A: Unue bone komprenu la signifon de la frazoj kaj eltrovu la gravajn vortojn en ili. Ĝuste tiuj emfazendaj frazeroj devas ricevi akcenton logikan. Ekzercu vin per voĉlegado kaj vi lertiĝos en tio.

甲：首先要弄清句子的含义，找出其中的重要词语。正是这些句子成分应该有逻辑重音。

B: Ni devas lerni de la oratoroj kaj lertaj deklamantoj, ĉu ne?

乙：我们应该向演说家和熟练的朗诵家学习，不是吗？

A: Jes. Ĉu vi havas kasetojn de paroloj de tiaj personoj? Oni diras, ke la jugoslaviaj esperantistoj parolas modele.

甲：是的。您有这种人的录音带吗？据说南斯拉夫的世界语者发音标准。

B: Ĉu vere? Bedaŭrinde mi ne havas kasetojn.

乙：真的吗？可惜我没有盒磁带。

A: Mi kopios kelkajn por vi. Klopodu por perfektigo per praktiko.

甲：我给您复制几盘。要努力通过实践完善读音。

(Fino)

1980. 12. 《世界》初稿。2001 4 月 18 日修订
2001 07 28 再次修订